

Esperanto-movado  
en landoj de Eŭropa unio  
ĉirkaŭ la jaro 2010

Redaktis:  
Zlatko Tišljar

Teknike aranĝis:  
Mario Vetrih

Eldonis:  
Eŭropa Esperanto-Unio

Bruselo 2013



## Enhavo

Enkonduko.....	5
La Aŭstra movado.....	7
Belga Esperanto-movado.....	9
Brita Esperanto-movado.....	13
Esperanto en Bulgario.....	15
Esperanto-movado en Ĉeĥio .....	19
La Esperanto-movado en Danio.....	25
Esperanto en Estonio.....	31
La Finnlanda movado.....	33
La Francia Esperanto-movado.....	37
Germana Esperanto-asocio.....	45
La esperantista movado en Grekujo.....	51
Esperanto-movado en Hispanio.....	57
Esperanto-movado en Hungario.....	61
Irlanda Esperanto-movado .....	63
Pri la situacio de Esperanto en Italujo.....	67
Kroatia Esperanto-movado.....	71
Esperanto-movado en Latvio.....	77
Esperanto en Litovio.....	81
Esperanto en Luksemburgio.....	85
Malta Esperanto-societo 50-jaraĝa .....	89
Esperanto en Nederlando .....	93
Pola Esperanto-asocio – sojle je ĝeneralaj ŝanĝoj .....	97
Portugala Esperanto-movado.....	105
Rumania Esperanto-movado.....	111
Esperanto en Slovakio.....	117
Slovenia Esperanto-movado.....	121
Esperanto en Svedio.....	125



## Enkonduko

En la jaro 2010 Renato Corsetti proponis aperigadon de artikoloj pri unuopaj landaj movadoj en Eŭropa Bulteno kiun mi redaktas. Mi entuziasme akceptis la proponon kaj startigis la serion. Ekde julio 2010 ĉiu numero aperigis unu artikolon. Tamen en kelkaj numeroj ĝi ne aperis, aparte ĉe la fino (en 2013) pro malfacileco trovi artikolantojn en kelkaj landoj. Sed la projekto tamen sukcese finiĝis en majo 2013. Kolektigis 27 artikoloj pri Esperanto-movadoj en ĉiuj EU-landoj krom en Kipro, kie la movado nur en tiu ĉi jaro (2013) ekaperetis. Ni havas informon pri okazigita unua E-kurso en tiu lando.

Nun ni aperigas komence en formo de e-libro ĉiujn tiujn artikolojn laŭ la alfabeto listo de la landaj nomoj kaj kredas ke ĝi estos grava superrigardo de la E-movado en EU ĉirkaŭ la jaro 2010 kaj oni povos kompari la staton kun la situacioj en la estonteco.

Oni povas vidi en pluraj landoj descendan evolulinion kaj ofte pesimismom en la opinioj de verkintoj, ja en nia epoko la E-movado malkreskas.

Laŭ mi tio estas nur ŝajna fenomeno ĉar ne temas pri malkresko de la Movado sed pri kompleta ŝanĝo de la socia funkciado kadre de nova informadika epoko. Se oni entajpas al guglo la vorton Esperanto, ĝi tuj trovas 100 milionojn da trafoj! Tio montras ke Esperantistoj ege vigle funkcias en la reto – ideala medio por ili, sed ke samtempe ŝrumpis la klasika organizmodelo kiam la E-movado funkciis ĉefe en societoj kaj kluboj. Ĝuste tial ĉi tiu libro estas grava, ĉar ĝi estas turnpunkta dokumento: kia estis la movado en la fino de klasika vivanta socio komparata kun la postaj virtualaj socioj.

*Zlatko Tišljar*



## La Aŭstra movado

Esperantistoj ekzistis en la Aŭstro-Hungara Monarkio tuj post la apero de la krea verko de doktoro Zamenhof en la jaro 1887.

Sed la unua organizita vivo kadre de la nova lingvo fondiĝis antaŭ 110 jaroj (en 1901), kiam la unua aŭstra (tiele!) Esperanto-klubo inauguriĝis en la ĉefurbo de Moravio, Bruenn-Brno. La centjariĝo estis solene celebrita antaŭ 10 jaroj en la malnova gotika urbodomo de Brno ĉeeste de geesperantistoj de ambaŭ landoj.

Aŭstrio kontribuis al la tutmonda E-movado ĝis nun 4 Universalajn Kongresojn (1924, 1936, 1970, 1992), pli ol kiu ajn unuopa lando de la mondo. Post la Unua Mondmilito kaj la disfalo de la Aŭstro-Hungara Monarkio la akcenton pri la E-o movado donis la laboristaj esperantistoj, kies ano Franz Jonas en la sesdekaj jaroj elektiĝis prezidento de Aŭstrio.



La dividiĝo politika en Aŭstrio montriĝis ankaŭ en la Esperanto-sfero: La burĝdevena Hugo Steiner sukcesis krei la "Internacian Esperanto-Muzeon Vieno" en 1927, kiu eniris la korpuson de la Aŭstria Nacia Biblioteko en la jaro 1929, tiamaniere efektive "eternigita". Ĝi transvivis la nazian tempon preskaŭ sendamaĝe. Post la Dua Mondmilito rekolektiĝis la iamaj batalantoj, sed restis reeĥoj de la divido politika, kio kondukis al skismo: la refondita post la milito AEF (Aŭstria Esperantista Federacio) spertis en la sesdekaj jaroj proponojn de la pli junaj membroj sub gvido de dipl.ing. Hermann Schalk kaj kunuloj de la Viena Esperanto-Junularo, nome de novaj konceptoj pri subteno amasa de la afero de Esperanto.



La intertempe aĝiĝinta estraro de AEF ne povis akordiĝi kun la "junuloj", kaj sekve de tio kreiĝis AEM (Aŭstria Esperanto MSidejo poŝta estis la Internacia Esperanto-Muzeo, kie la sekretario Herbert März estis kunlaboranto. La direktoro de la Esperanto Muzeo d-ro Walter Hube deklaris al mi kiu petis lin pri kontribuo al la 100-jara jubileo de Esperanto, ke li


tiam ne plu estos aktiva pro pensiĝo kaj ne plu intencas iele kontribui al la afero. Tio instigis min demandi al la ministerio pri sciencoj pri la posteula proceduro. Montriĝis, ke estis intenco, nuligi la Esperanto-Muzeon kiel apartan kolektaĵon kaj enigi ĝin en la ĝeneralan Nacian Bibliotekon. Mi protestis, konstatante, ke ekzistas kandidatoj por postsekvi sinjoron Hube kaj tio finfine kondukis al oficiala alvoko de kandidatoj, je kio la nuna direktoro de la muzeo Mag. Herbert Mayer anonciĝis. Estis aliaj kandidatoj, inter ili la plenmerita magistrino Helga Farukuoye, kiu poste dungigis kiel scienca kunlaborantino, kiu prizorgis la diĝitigon de la trezoro de la Esperanto-muzeo sub la titolo "Trovanto".

La Muzeo estas unika en la Esperanta mondo, ĝi estas centro de esplorado kaj scienca komunikado kaj organizas ankaŭ rilatajn konferencojn kaj simpoziojn. Sendube ĝi estas, nun de kelkaj jaroj sub nova tegmento en la palaceto Mollard en Herrengasse, centra punkto de aktivecoj de esperantistoj, ĉiam rilate al la celo de la Muzeo.

AEF renomiĝis antaŭ nelonge. Nun anstataŭ "Esperantista" staras "Esperanto". AEM mortis pro morto de sia proponintaro. Nun nova skipo manaĝas la federacion. AEF estas atingebla per sia retadreso: [aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at).

En la sesdekaj jaroj fondiĝis forta junulara grupo en urbo Graz, kie fondiĝis ankaŭ Aŭstria E-Junularo. Organizinte plurajn internaciajn aranĝojn kaj E-kursojn la agado de AEJ kulminis en 1971 kiam en Graz estis organizita TEJO-kongreso. En la sama urbo en 1987 okaze de la 100-jariĝo de Esperanto okazis konferenco de Neŭtrala E-Movado kiun tiutempe prezidis Ivo Lapenna.

Multa laboro estas farata interrete. Tamen okazas ankaŭ personaj renkontiĝoj (Vienaj kunvenoj monate), en 2008 julie okazis interregiona renkonto en Wörgl (Tirolio). Aktivado ekzistas nun aparte en Graz (kie pastro d-ro Florian Mayer celebris primican meson en Esperanto je la 6a de aŭgusto), sed ankaŭ en aliaj lokoj de Aŭstrio.



*Hans Michael Maitzen*



## Belga Esperanto-movado

La Ĝenerala Kunveno de "Belga Esperanto Federacio" (BEF) por 2011 okazis en Loverval la 26-an de marto 2011. Loverval situas 5 km sude de Karloreĝo (Charleroi). BEF estas la belga organizo agnoskita de UEA (ĉar UEA nur agnoskas naciajn organizojn) sed ĝi fakte estas reale senpova kaj estas nur kupolo de la tri regionaj memstaraj grupoj kiuj efektive aktivas en Belgio: FEL en nederlandlingva Flandrio, APE en franclingva Valonio, kaj EBG en dulingva Bruselo.



Se FEL, APE, kaj EBG funkcias kiel "asocioj sen profitaj celoj" (ASPC) kun leĝaj statutoj, BEF estas nun fakta asocio, kvankam ĝi ankoraŭ principe sekvas la statutojn de la epoko kiam BEF ankaŭ estis ASPC. Fakte en Belgio ne plu estas interese ekzisti kiel tutnacia organizo, ĉar nur regionaj organizoj rajtas ricevi subvenciojn: FEL de la flandra registaro, APE de la valona registaro kaj EBG de la Franclingva Komunumo. Konsiderante tion oni povas demandi ĉu BEF havas alian celon ol servi kiel nacia reprezentanto por UEA. Feliĉe ne! Ĉar la jarkunveno de BEF estas la sola oficiala okazo por ĉiuj belgaj grupoj kune kunveni kaj interŝanĝi informojn pri iliaj propraj agadoj. En 2011 partoprenis la Ĝeneralan Kunvenon de BEF 18 aktivuloj kaj 15 petis senkulpigon. Konsiderante ke ĉiuj membroj rajtas partopreni kaj ke ni sendis 50 paperajn kaj 140 retajn kunvokilojn, tio tamen iomete pruvas la moderan intereson de la belgaj esperantistoj por BEF. Sed la 18 ĉeestantoj tamen bone reprezentas la diversajn

grupojn de la tri regionoj de Belgio kaj la intervenoj permesas bonan informadon pri la nuna stato de la esperantista movado en Belgio, kvankam kelkaj grupoj ne estis reprezentataj.

Komence de la kunveno la protokolo de la pasinta Jarkunveno en Ostendo kaj la raporto de la kasisto Eric Baert estis akceptataj post kelkaj negravaj rimarkoj.

La nova prezidanto de FEL Marc Cuffez kaj la prezidantino de BEF Flory Witdoeck, informis pri la nunaj agadoj en Flandrio, precipe por la grupoj de Ostendo, de Gento kaj de Antverpeno. La plej grava agado estas ke FEL decidis organizi tradukadon por la lernado de Esperanto kadre de la projekto "Springboardtolanguage", kiu estas konsultebla sur la reto. Ili esperas ricevi oficialan subtenon de la flandra registaro. FEL regule eldonas sian paperan revuon "Horizontaal" kaj sian retan revuon "Vertikale" por la aktivuloj.



Nome de la nova estraro de APE Jean-Pol Sparenberg parolis pri la nuna revigligo de la valona asocio kaj pri la renoviga eldonado de la grupa revuo "Esperanto en Marche". Valère Doumont informis pri la venonta printempa kunveno en Mozet (PeKo).

Nome de la brusela Grupo EBG la prezidanto Angelos Tsirimokos informis pri la kunvenoj kaj prelegoj en Bruselo substrekante ke la grupo organizas kursojn je du niveloj. La redaktoro Paulo Branco prezentis la belaspektan revuon "Aktuala" kiu estas libere elŝutebla je la retadreso: <http://sites.google.com/site/ebgaktuala/>.

Nome de la fervojistoj (BEFA) Lucien De Sutter klarigis la nunajn malfacilaĵojn de BEFA : Pro la fakto ke pli ol la duono de la kunvenaj ĉeestantoj ne plu estas fervojistoj, la fervojistaj instancoj (SNCB-NMBS) ne plu volas doni subvenciojn kaj pro tio tiu grupo petas nun monhelpon de BEF por aĉeti instrumaterialojn. BEF konsentis donacon de 200 euroj, ĉar efektive la plej grava rolo de la kaso de BEF estas helpi la helpopetantajn grupojn, ĉar BEF ne plu havas proprajn agadojn.

Por ILEI Marc Cuffez rimarkigis ke ekzistas membroj nur en Flandrio. Necesus ankaŭ varbi instruistojn en Valonio kaj en Bruselo.

Pri la rilatoj de BEF kun UEA kaj EEU informis Flory. Ŝi substrekiis la gravajn agadojn de la estraro de EEU, kaj la bonajn rezultojn, kadre de la instancoj de Eŭropa Unio (EU). Ŝi ankaŭ informis pri siaj personaj agadoj en Afriko, precipe en Kongolando.

Fine de la kunveno, la asembleo unuanime aprobis la agadon de la estraro kaj konsentis ke ĝi senŝanĝe pluestras.

*Claude Glady*



## Brita Esperanto-movado

Esperanto-Asocio de Britio (EAB) estas la plej granda [Esperanto-asocio](#) en tiu ĉi lando. Ĝi fondiĝis en [1976](#) kiel registrita bonfara asocio surbaze de [Brita Esperanto-Asocio](#). EAB tiel estas la heredanto de la iama BEA, kiu fondiĝis en 1904, kaj rigardis la jaron 2004 kiel ĝia propra centjariĝo.

Ekde 2001 la sidejo de EAB troviĝas en la vilaĝo [Barlastono](#) (angle: Barlaston), kelkajn kilometrojn sude de la urbo de [Stoke-on-Trent](#), en [Okcidentmezlanda Anglio](#). Ĝi havas rilaton kun la apuda [Wedgwood Memorial College](#), kiun ĝi uzas por kursoj kaj kunvenoj. La Biblioteko Butler (kiu enhavas la kolekton de Montague Butler) ankaŭ troviĝas en la samaj konstruaĵoj.

EAB eldonas du revuojn:

- EAB Ĝisdate - (pli ofte konata kiel ĝia angla nomo "Update") kiu enhavas novaĵojn kaj diversajn artikolojn kaj en Esperanto kaj la angla;
- [La Brita Esperantisto](#) - literatura kaj kultura revuo, tute en Esperanto.

EAB ankaŭ eldonas la Manlibron (angle: Handbook) kiu enhavas informojn pri diversaj esperantistoj kaj grupoj.

EAB organizas ĉiujarajn britajn E-kongresojn.

Junularo estas organizita en Junularo Esperantista en Britio (JEB).

Ekzistas ankaŭ sekcio de SAT en Britio (SATEB).

Aparta agado okazas ankaŭ en regionaj E-organizoj:

Orienta Esperanta Federacio, Okcident-mezlanda Esperanta Federacio, Sud-orienta Esperanta Federacio, Kimra Federacio kaj Esperanta Asocio de Skotlando.

Dum la lastaj kelkaj jaroj famas la laboro de grupo de instruistoj sub la gvido de Angela Tellier kiuj startigis eksperimentan instruadon de Esperanto en kelkaj britaj elementaj lernejoj kun la celo montri ke tio helpas al pli rapida lernado de aliaj fremdlingvoj sub la nomo Saltbreto al Lingvoj (Springboard to Languages).

<http://www.springboard2languages.org/home.htm>

Ekzistas ankaŭ speciala grupo por informado pri Esperanto al politikistoj Esperanto-Lobby. <http://esperantolobby.wordpress.com/>

La nuna prezidanto de EAB, post la prezidado de fama lingvisto (fonetikisto) profesoro John Wells, estas Paul Gubbins.

Se oni volas prognozi la estontecon de Esperanto en Britio (la lando de la angla lingvo) - laŭ progreso lastatempa - la futuro bonaŭguras en Britio. Esperanto ja ne mortis en nia lando!

Lastatempe en la Universitato de Newcastle fondiĝis nova studenta Esperanto klubo. Aliaj tiaspecaj universitaj kluboj ekzistas jam en Surrey, Durham, Bristol kaj Sheffield. La plej lasta nomita en Sheffield rezultis pro iniciato de Max Marzec, studento de Dennis Keefe, Profesoro pri Komerco en Nankina Universitato, Ĉinio.

Max organizis la plej grandan internacian lingvo festivalon iam-ajn okazintan en nia lando. Esperanto estis unu el la ĉefaj lingvoj kaj profesoro John Wells estis kaj ĝia honora patrono kaj gastparolanto. Kelkaj parlamentanoj ĉeestis la inaŭguron. BBC raportis kaj televide kaj radie spite al la samtempa tertremo en Japanio.

Alia pozitiva fenomeno pri la rezultoj de nia informado estas ke ĝi kreskis kaj kvante kaj kvalite. (Ne forgesu ke historie Lord Reith, la fondinto de BBC malpermesis eĉ mencion de la vorto "Esperanto" en ĝiaj programoj.) Unu ekzemplo de multaj BBC televidaj programoj estas la multvidata programo "The One Show". Lokaj radio-dissendoj ankaŭ abundas.

Aliaj rezultoj vidiĝas per unu paĝo, entute pri Esperanto en "The Times" kaj duon paĝo en "The Sun". "The Sun" estas la plej legata nacia ĵurnalo en Britio.

Okaze de la "Eŭropa Tago de Lingvoj" ni sendis al Britaj Membroj de la Eŭropa Parlamento, presitan kopion de "Malkovru Esperanton". Ni retis samtage al ĉiuj britaj parlamentanoj kaj informis pri agado de "Esperanto Lobby". Je la "Internacia Tago de la gepatra lingvo" ni simile agis kaj informis al britaj parlamentanoj pri neceso defendi la rajtojn de minoritataj lingvoj. Ni rete sendis al ili la jutuban videon por informi ke Esperanto jam havas reprezentigon en la Unuiĝintaj Nacioj.

Britio estis pioniro - kune kun Italio - de la parlamenta agado kaj nacie kaj eŭropskale. Tiu tradicio daŭras.

*Brian Barker*

## Esperanto en Bulgario

Observante la historion de la E-movado en Bulgraio oni povus konstati, ke ĝi estas inter la plej malnovaj landaj movadoj kaj faris la unuajn paŝojn tuj post la apero de la unua lernolibro de la internacia lingvo Esperanto gajninte multajn entuziasmajn adeptojn en la lando. Ĝi aperis dum 1888-ajaro. Per sia modela, senlacal aboro launuaj veteranoj de la E-movado en Bulgario: Miroslav Bogdanov, Hristo Popov, Georgi Oreŝkov k.a. Edukis multajn fidelajn batalantojn, kies agado por Esperantodonis tiajn rezultojn, ke nun Bulgario estas unu el la landoj kun bone organizita E-movado.

La komenca agado pri Esperanto en Bulgario estisfarita ded-ro Miroslav Bogdanov, kiu insiste kaj tre lerte utiligis la ĝeneralan gazetaron por publikigi en ĝi propagandajn artikolojn pri Esperanto. Samtempe li preparis lernolibron por bulgaroj kaj eldonis ĝinen 1889-a jaro. Krome li fondis en Sofio la kvaran laŭvice en la mondo Esperanto-klubon, post tiuj en Nurnbergo, Petrogrado kaj Moskvo. Li iniciatis ankaŭ la eldonadon dedulingva revuo "Mondlingvisto", kiu estis la dua en la mondo E-revuo tuj post "La Esperatisto" en Nurnbergo.

La dua laŭvice bulgara E-klubo fondiĝis en urbo Veliko Tarnovo kaj nomiĝis "Flamo". Ĝi komencis eldonadon de propra revuo "Lumo" kaj fariĝis inicianto por fondo de tutlanda E-organizaĵo. Inter la unuaj esperantistoj en la urbo estis la granda bulgara verkisto, kleriko kaj sociaganto Vasil Drumev, mitropolito Kliment.

Post V. Tarnovo estisfonditaj E-kluboĵen Plovdiv, Kazanlak, Ruse, Karlovo, Stara Zagora, Pazarĝik kaj urboĵen Bulgario.



La 18-an de aŭgusto 1907 en Veliko Tarnovo okazis la 1-a tutlanda Kongreso kaj estis fondita Bulgara E-Ligo. La Kongreson partoprenis 26 oficiale rajtigitaj delegitoj el 14 lokaj E-organizoĵ kaj multaj gastoj el proksimaj kaj malproksimaj lokoj, kie ekzistis ankaŭ neorganizitaj esperantistoj. D-ro L.L.Zamenhof estis elektita kiel honora prezidanto de la Bulgara E-Ligo. Oni sendis al li telegramon: "La unua bulgara

E-Kongreso kunsidanta en Veliko Tarnovo sendas sian gratulon al Vi, estimata Majstro! Vivu Vi por la feliĉo de la homaro! De la Kongresa Estraro". Krom tio oni sciigis al d-ro L.L.Zamenhof, ke li estas elektita kiel honora prezidanto de la Bulgara Esperantista Ligo. Zamenhof respondis per la letero: "Al Bulgara Esperantista Ligo mi sendas koran saluton kaj deziron de la plej bonaj sukcesoj. La titolon de honora prezidanto mi danke akceptas. Via Zamenhof. 24.10.1907".

Tuj post la fondiĝo de BEL komenciĝis aktiva agado en la lando por popularigo de Esperanto kaj fondo de lokaj E-kluboj. La movado establiĝis paŝon post paŝo. En Sofio estis fonditaj Studenta E-grupo kaj Gelernanta E-Ligo en kiuj spertiĝis kapablaj esperantistoj, estontaj asociaj gvidantoj kiel ekzemple Atanas D. Atanasov-ADA, kiu verkis la plej bonan lernolibron de Esperanto por bulgaroj, Ivan H. Krestanov kiu kompilis "Antologion de la bulgara prozo kaj poezio", Nikola Aleksiev, Hristo Gorov, Violin Oljanov, Ivan Sarafov, Asen Grigorov k.a. eminentaj esperantistoj, konataj ne nur inter la bulgaraj esperantistoj, sed ankaŭ al la monda esperantistaro. Grava merito de la Studenta E-grupo estis la altiro por subteno de Esperanto fare de elstaraj bulgaraj sciencistoj. Iuj el ili eĉ estis malamikoj de Esperanto, sed konatiĝinte kun ĝi ili transformiĝis en aŭtoritatajn adeptojn de la internacia lingvo. La populara en Bulgario prof. d-ro Ivan D. Ŝiŝmanov eĉ faris publikan prelegon en la Universitato je la temo: "Ĉu estas ebla internacia helplingvo?" (1912). La prelego aperis en kelkaj eldonoj kaj konservas sian valoron ĝis hodiaŭ.

Dum 1912 Bulgara E-Ligo (BEL) reorganiziĝis akceptinte la nomon Bulgara E-Societo kaj ekde 1928 estiĝis Bulgara E-Asocio (BEA).

Kiel la internacia, tiel ankaŭ la bulgara E-movado konas periodojn de konsiderindaj sukcesoj, sed tamen same periodojn de regreso kaj krizo.



*Kiel regreso kaj krizo oni povus mencii la periodon de 1939-1955 j.*

Poste komenciĝis la renovigo de la E-movado en Bulgario. Gravan rolon por popularigo de Esperanto havis E-gazetaro eldonita en Bulgario: "Bulgara esperantisto", "Nuntempa Bulgario", "Ripozoj en Bulgario", "Paco", "Scienca mondo". En 1958-a jaro estis fondita Bulgara E-teatro kies spektakloj estas konataj al la esperantistaro. Denove estis



organizita fakultativa instruado de Esperanto en mezgradaj lernejoj. En kelkaj bulgaraj Universitatoj estis organizita ankaŭ la fakultativa instruado de Esperanto. Elkreskis novaj talentaj originalaj aŭtoroj kaj tradukistoj kiel Georgi Mihalkov/Julian Modest, Venelin Mitev, Georgi Idakiev, Penka Papazova, Nikolaj Uzunov k.a, kiuj vice kun siaj malnovaj kolegoj Hristo Gorov, Violin Oljanov, Canko Murgin k.a estiĝis konataj al la monda esperantistaro. En Pisanica estis konstruita kaj funkciis ĝis la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento la konata por la esperantistaro Internacia E-Kursejo. En 1956 kelkpersona grupo de esperantistoj: Cv. Cvetkov, M. Danĉev, Iv. Bataklijev, L. Gajdarov. N. Ganev, B. Leonov, N. Arnaudov k.a kolektiĝis en la rozĝardenoj ĉe Karlovo fondinte la "Feston de la rozo". Unue tio estis nur tradicia E-aranĝo, sed poste la ŝtato proklamis ĝin "Nacia festo de la rozoj" kaj Folkloro festivalo kun partopreno de folkloraj ensembloj kaj estiĝis amase vizitata Festo de bulgaraj kaj eksterlandaj gastoj.

En Bulgario estis organizitaj Universalaj Kongresoj de Esperanto: en Sofio 1963 kaj en Varna 1978, TEJO-Kongresoj en Vraca 1963 kaj en V. Tarnovo 1978, renkontiĝoj de la esperantistoj loĝantaj en la balkanaj landoj, seminarioj k.a. naciaj kaj internaciaj E-aranĝoj.

Al la evoluo de la E-movado en Bulgario dum la 60-aj kaj 70-aj jaroj de la pasinta jarcento kontribuis la aktiva agado de Bulgara E-Junularo (BEJ), ĉefe la agado de la studenta E- societo "Vela Peeva" en Sofio. Post la elekto de Bojidar Leonov kiel Prezidanto de Studenta Tutmonda E-Ligo (STELO) li organizis kaj gvidis la Internaciajn E-Laborbrigadojn en Bulgario. La funkciuloj de la junulara E-movado P. Todorov, N. Uzunov, B. Leonov, D. Jdrakov k.a iniciatis kaj organizis la Naciajn junularajn E-Festivalojn, kiuj ĝis la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento estis tradiciaj regule organizitaj kulturaj E-aranĝoj.

Malgraŭ la problemoj kunligitaj kun la monda financa krizo kaj la malbona financa stato de la bulgara popolo, BEA daŭre strebas aktivigi sian agadon organizante E-kursojn en lokaj E-societoj, organizante diversajn E-aranĝojn kunlaborante kun neesperantistaj fakaj kaj sociaj organizaĵoj. Aktiva estas la agado de la E-societoj en

Razgrad, Karlovo, Galabovo, Pazarĝik, Velingrad, Plovdiv k.a. Tradiciaj jam estiĝis EKRA en Razgrad, AE-PA en Karlovo k.a. E-aranĝoj kaj renkontiĝoj.



Bona estas la kunlaboro de BEA kun AIS-San Marino, ILEI, ISAE, IF-EF, SAT k.a. Asocia membro de UEA. Kune kun Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista-TOLE, kies sidejo estas en Karlo-

vo, IKUE, KELI estis organizitaj ekumenaj E-aranĝoj - la religiaj seminarioj: "La religio kontraŭ la terorismo kaj militoj", "La rolo de la religio por evoluo de la homa kulturo kaj civilizacio", "La rolo de religio por la edukado de la juna generacio". La seminariojn partoprenis reprezentantoj de la bazaj religioj en la mondo. kristana, muzulmana kaj budhisma. La reprezentantoj de la diversaj religioj prezentis antaŭ la oficialaj instancoj en Bulgario, ke sendepende de sia religia apartaneco, ĉiuj kredantoj agas kontraŭ la terorismo, militoj kaj ĉiuj religioj kontribuis por la evoluo de homa kulturo, civilizacio, eduko de juna generacio obei la noblajn principojn de la religia etiko kaj moralo.

Dum jardekoj estas la kunlaboro de E-societo Karlovo kun la neesperantista scienc-teknika asocio en Bulgario (STA) kaj Domo de Tekniko Karlovo, kie funkcias Internacia E-Centro por patent-scienc-teknika informado kaj patentaj esploroj. La regiona Estraro en Karlovo de STA akeceptis Esperanton kiel oficiala kontaktlingvo en la fakaj kontaktoj inter la fakuloj.

La kunlaboro de BEA kun AIS-San Marino realiĝas per la komuna agado kun AIS-Bulgario, kies sidejo estas en Karlovo. Ekde 2001 en Karlovo funkcias Internacia Universitato Karlovo – AIS-Klerigejo, kies oficiala studadlingvo estas Esperanto. En la komenco de 2011-a jaro ĝi ricevis ŝtatan licencon de Nacia Agentejo por profesia edukado: Internacia E-Centro por profesia edukado "ESPERINFORM " Karlovo, kies oficialaj studadlingvoj estas Esperanto kaj bulgara lingvo kaj kies studentoj post la fino de sia studado uzinte Esperanton kiel studadlingvon rajtas ricevi por 10 profesiaj fakoj dokumentojn agnoskeblajn en ĉiuj landoj de EU.

Post la 62-a BEA-Kongreso en Sopot 2010 estiĝis kiel bazaj prioritatoj en la programo por la agado de BEA:

- aktiviĝo de la rektaj kontaktoj kun LA kaj FA de UEA,
- aliĝo de BEA al EEU,
- aktiviĝo de la instrua agado organizanta E-kursojn por la loĝantaro, lernantoj, studentoj,
- subteno al la agado de Internacia Universitato Karlovo kaj Internacia E-Centro por profesia edukado,
- kunlaboro kun FA de UEA, AIS-Bulgario kaj neesperantistaj fakaj organizaĵoj por praktika apliko de Esperanto en la profesia kaj socia agado,
- kontaktoj kun radio, televido kaj gazetaro por propagando de Esperanto,
- aktiviĝo de junulara E-agado,
- renovigo la organizado de la Festivaloj pri E-kantado, recitado kaj oratoraj konkursoj
- renovigo de la agado en urboj, kie estis E-societoj por krei novajn E-societojn.

Tuj post la Kongreso la Estraro de BEA komencis realigi la agadon surbaze de la akceptitaj prioritatoj.

En 2011 en Karlovo okazis la I-a Internacia Festivalo de E-kanto, recitado kaj oratora konkurso. En 2012 okazis la II-a Festivalo. La Festivalojn partoprenis bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj. Tiamaniere post pli ol 30 jaroj estis renovigita la tradicio de la iama junulara E- movado en Bulgario.



*Ekde 2012-a jaro BEA jam estas membro de la granda europa familio aliĝinte al EEU.*

Grava prioritato en la agado de BEA estas la praktika apliko de Esperanto en la profesia kaj socia agado. Jam dum 3 jaroj BEA, kune kun AIS- Bulgario, Internacia Universitato Karlovo, Scienc-teknika Asocio en Bulgario organizas la Internaciajn Simpoziojn "Apliko de Esperanto en la Profesia Agado" AEPA. La simpoziojn partoprenis eminentaj bulgaraj kaj eksterlandaj profesoroj, sciencistoj, fakuloj pri diversaj profesiaj fakoj, reprezentantoj de Bulgara Akademio de la sciencoj, Scienc-teknika Asocio en Bulgario, universitatoj, pluraj oficialaj instancoj en Bulgario, televido, radio, gazetaro. La simpozioj estis organizitaj de la esperantistoj, sed dediĉitaj ankaŭ al fakuloj, kiuj ne estas esperantistoj, ĉar oficiala lingvo estas Esperanto, sed laborlingvoj – la naciaj lingvoj de ĉiu partopreninto, kiu ne estas esperantisto kun certigita rekta interpretado nacia lingvo-Esperanto-nacia lingvo povus prelegi, partopreni la diskutojn, profesiajn kontaktojn kun samfakuloj. Tiamaniere la simpozioj plenumis sian bazan celon - prezenti al la oficialaj instancoj, ke Esperanto ne estas nur lingvo por amikaj kontaktoj, babilado kun geamikoj dum la internaciaj E-aranĝoj, sed povas esti kaj devas esti aplikata kiel oficiala kontaktlingvo en la fakaj seminarioj, profesiaj kontaktoj inter la monda fakularo!

*prof. Bojidar Leonov, prezidanto de BEA*



## Esperanto-movado en Ĉeĥio

La ĉeĥa Esperanto-movado konsistas el pluraj sendependaj organizaĵoj, kiuj bone kaj harmonie kunlaboras. Mi do ĉi tie strebos prezenti al vi koncize ĉiujn (alemaŭ tiujn al mi konatajn) kun prezento de iliaj ĉefaj agadoj.

Sendube la plej grava kaj ankaŭ la plej multnombra estas Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA). Ĝi konsistas el individuaj membroj, tamen ene de ĝi laboras kaj lokaj kluboj de Esperanto, kaj kelkaj fakaj sekcioj. Ĝi ankaŭ eldonas kvarfoje jare presitan organon „Starto” kaj neregule (laŭbezone) „ĈEA-ret-komunikoj” (kiuj estas senpage sendataj al ĉiuj interesatoj, ne nur al la membroj, ankaŭ eksterlanden). ĈEA mastrumas propran bibliotekon kaj libroservon proponanta literaturon en Esperanto al siaj membroj, organizas ĉiun trian jaron kongreson, en kiu estas elektata nova komitato de ĈEA, kaj en la jaroj inter la kongresoj organizas konferencojn kun simile riĉa programo, krom la balotoj.



Inter la aktivecoj de ĈEA menciindas ankaŭ aparta okupiĝo pri komputila klerigado de la membraro, kontribuado al Vikipedio, komputila prilaboro de historio de la enlanda movado, ciferecigado de Esperanto-literaturo kaj kantotekstoj, kreado de plurmediaj dokumentoj en Esperanto kaj esperantigado de oficialaj urbaj kaj turismaj retejoj (ĝis nun 15 - en tiu fako plej verŝajne Ĉeĥio okupas la unuan lokon en la mondo).

ĈEA estas kolektiva membro de Universala Esperanto-Asocio (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio estas Lucie Karešová, komitatano A por Ĉeĥio Libuše Hýblová), sed ankaŭ de Eŭropa Esperanto-Unio. La sekcioj de ĈEA estas samtempe ĉeĥaj sekcioj de koncernaj internaciaj Esperanto-asocioj: pedagogia sekcio agas ene de ILEI, sekcio de nevidantoj ene de LIBE, katolika sekcio ene de IKUE kaj kristana sekcio ene de KELI.

Sur la foto estas la nuna komitato de ĈEA. Malantaŭe de maldekstre: sekretario Pavel Polnický, vicprezidantoj Jiří Tomeček kaj Petro Chrdle, antaŭe prezidanto Jana Melichárková, prezidanto de Kontrola grupo Libuše Dvořáková, kaj komitat-membroj Libuše Hýblová, Pavla Dvořáková kaj Miroslav Malovec.



Ĉeĥa Esperanto-Junularo: La junulara Esperanto-movado tradicie ludas en Ĉeĥio gravan rolon. Tuj dum sia fondiĝo la nuna ĈEA kreis junularan sekcion, kiu estis eĉ bone reprezentita en la komitato de TEJO. Ĝia agado estis riĉa, tamen la junaj esperantistoj forgesis pri la necesa varbado inter eĉ pli junaj. Do post kiam la kerno de la membroj de la junulara sekcio en naŭdekaj jaroj transiris la aĝlimon, la sekcio devis esti nuligita. Sed venis novaj aktivaj junuloj, kiuj lernis Esperanton plejparte per Interreto, kaj en junio 2005 ili fondis junularan asocion, ĉi-foje jure memstaran, kun la nomo Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ). Nun en ĝi membras proksimume 100 gejunuloj, ĝi estas kolektiva membro de TEJO kaj vigele aktivas. La plej videbla de la agadoj de ĈEJ estis la organizo de la Internacia Junulara Kongreso en 2009 en Liberec (organizita komune kun GEJ kaj PEJ), kiu altiris en Ĉeĥion 343 junajn esperantistojn el 5 kontinentoj. Sur la dekstra bildo estas la fonda prezidanto Dagmar Chvátalová kaj la dua prezidanto kaj nuna komitatano de TEJO Marek Blahuš, sur la maldekstra foto la nuna prezidanto Dan Mrázek.

Krom la menciitaj ĈEA kaj ĈEJ ekzistas en Ĉeĥio ankaŭ aliaj jure memstaraj Esperanto-Asocioj, el kiuj necesas menci i unuavice Asocion de Esperantistaj Handikapuloj (AEH),

kiu agas plejparte kunlabore kun la Esperanto-Klubo de Stanislav Schulhof en Pardubice kaj havas ankaŭ multajn

eksterlandajn membrojn. Ĝi eldonas organon „Informilo” kun ties kompletiga gazeto „Antaŭen” kaj organizas regulajn lingvajn seminariojn, kutime dufoje jare tutsemajnan en Skokovy kaj unufoje monate sabatan en Prago. La prezidanto estas Pavel Nechvíle. Sur la foto partoprenintoj de la buskaravono al UK en Bjalistoko organizita de AEH.

Alia menciinda memstara Asocio estas ĈeFEA (Ĉeĥa Fervojistia Esperanto-Asocio), kiu origine agis kiel



Marek Blahuš. Daša Chvátalová

fervojista sekcio de ĈEA kaj jure memstariĝis en la jaro 2009. Ĝi estas samtempe ĉeĥa sekcio de IFEF. En la jaro 2011 ĝi organizis en Liberec Internacian Fervojistan Kongreson. La ĉeĥaj esperantistoj daŭre apartenas al la kernaj agantoj ene de IFEF: nun Jindřich Tomíšek plenumas la funkcion de ĝia ĉefdelegito, Ladislav Kovář gvidas ĝian fake-aplikan grupon de faka sekcio kaj redaktas Fervojfakajn kajerojn, Zdeněk Polák kaj Jaroslav Matuška laboras en Terminara komisiono.



Ĉiuj tri asocioj, kvankam jure memstaraj, proksime kunlaboras kun ĈEA. Krom ili ekzistas pluraj neformalaj grupoj de esperantistoj, ĉefe en Prago kaj Brno. Kaj mi kuraĝas ĉi tien envicigi ankaŭ la civitanan societon „E-lingvo”, kvankam ĝi en la statuto uzas eĉ ne unufoje la terminon „Esperanto” kaj parolas pri „eŭrolingvo”, tamen ĝia celo, nome eblo de internacia interkompreniĝo helpe de neutrala (do ne-nacia) lingvo, kongruas kun tiu de la Esperanto-movado.

La muzeo de Esperanto en Svitavy estas mastrumata de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed mi dediĉas al ĝi specifan lokon, ĉar temas ja pri elstara ekstermovada afero, kiu tre bone servas al la plej bezonata ago: disvastigado de informoj pri la historio, sed ankaŭ pri la nuna stato kaj ebloj de la internacia lingvo Esperanto. Ĝi estas lokita en la Ottendorfer-biblioteko, unu el la plej belaj historiaj domoj en Svitavy, kaj ĝi bone kunlaboras ne nur kun la posedanto de la domo (la urbo Svitavy pere de la Urba muzeo kaj galerio) sed ankaŭ kun la Urba muzeo en Česká Třebová, kiu posedas riĉan Esperanto-kolekton, sed ne disponas pri ekspoziciejo. Cetere, la plej admirata eksponato en la Esperanto-muzeo Svitavy, nome la busto de L. L. Zamenhof (videbla pli supre meze de la komitatanoj de ĈEA) estas pruntedonita tien el Česká Třebová. Ankaŭ kun la ceteraj Esperanto-muzeoj kaj bibliotekoj en la mondo ĝi estas en bonaj rilatoj.

La Esperanto-muzeo ne estas nura deponejo kaj ekspoziciejo de Esperanto-antikvaĵoj, sed ĝi strebas esti viva edukejo, danke al la riĉa Esperanto-biblioteko, danke al komputilo por esplorantoj ekipita per utilaj datenoj (interalie per granda elektronika

Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta vortaro) kaj danke al plurmedia inform-panelo kun tuŝekrano servanta ĉefe por vizitantoj.

Fine de la prezento de Ĉeĥa Esperanto-Movado mi nomu la ĉeĥajn reprezentantojn en internaciaj Esperanto-organizaĵoj. Krom tiuj pli supre menciitaj en UEA, TEJO kaj IFEF, Miloslav Šváček, prezidanto de Katolika sekcio de ĈEA, plenumas jam duan elektoperiodon funkcion de prezidanto de IKUE kaj Pavel Polnický, prezidanto de Kristana sekcio de ĈEA funkcion de sekretario de KELI.

Parolante pri Esperanto-movado en Ĉeĥio necesas menci i ankaŭ Kongresan kaj klerigan agentejon KAVA-PECH kaj samnoman eldonejon, kiu apud



la ĉeĥa, angla kaj germana lingvoj uzas pro profesiaj celoj samrajte ankaŭ Esperanton. Ĝi vigle aktivas ankaŭ por esperantistoj, kaj inter pli ol 130 libroj sub la propra ISBN eldonis 57 en Esperanto. Krome ĝi produktas librojn laŭmende por klientoj el pluraj landoj (FR, DE, ES, NL, SE, KR) inter ili ankaŭ la librojn en Esperanto.

Esperanto-Movado vi trovos ĉe [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz), pri Esperanto-libroj kaj aranĝoj de KAVA-PECH ĉe [www.kava-pech.cz/esperanto](http://www.kava-pech.cz/esperanto).

*Petro Chrdle*



# La Esperanto-movado en Danio

## Historia superrigardo pri Esperanto en Danio

La unua danlingva lernolibro pri Esperanto aperis jam en 1890 en Flensburg (norda Germanio), kaj en 1897 ekestis la unua klubo en la urbeto Nykøbing Sjælland. La ĝenerala opinio tiutempe tamen estis ke Esperanto estas nur nova speco de Volapuko, kaj la movado ne multe prosperis.



*Frederik Skeel-Gjörling  
(1876-1910)*

Tio ŝanĝiĝis kiam la dana lingvisto Vilhelm Thomsen en 1902 faris paroladon okaze de la naskiĝtago de la reĝo. En ĝi li konkludis, ke la angla estas aktuale la plej taŭga nacia lingvo por internacia uzo, sed se internacia planlingvo havas ŝancon, tiam Esperanto estas la ideala kandidato. La parolado estis presita kiel artikolo en 1904 kaj havis efikon ankaŭ en Finnlando, kie ĝi aperis en finna traduko. Kvankam Thomsen tiutempe estis konata kiel la plej elstara lingvisto, ne



*Margrethe Noll (1874-1962)  
kaj Lorenz Friis (1904-1985)*

nur de Danio sed de la tuta mondo, la artikolo poste estis praktike forgesita, ĉar Thomsen restis strikte neŭtrala en la polemiko inter idistoj kaj esperantistoj.

En 1904 aperis ankaŭ lernolibro kaj vortaro de la pioniro Frederik Skeel-Gjörling, tradukisto el Aalborg. Ili estis partoj de la "Kolekto aprobata de d-ro Zamenhof", kaj tial povis aperi en la normala kopenhaga eldonejo Fred. Høst & Søn. La "Kolekto aprobata" tamen baldaŭ ĉesis, kaj Skeel-Gjörling aperigis la unuajn tradukojn el dana literaturo (fabelojn de H.C. Andersen) ĉe la esperantista eldonejo Möller kaj Borel en Berlino.

En la sekvaj jaroj novaj grupoj ekkreskis kiel fungoj kaj la grava ĉefurba taggazeto Politiken tiom interesiĝis ke ĝi aranĝis kurson kun 350 lernantoj. Skeel-Gjörling estis vokita al Kopenhago por instrui ĝin, kaj la 2-an de januaro 1908 estis fondita en Kopenhago la Konversacia Esperanto-Klubo (KEK) ankaŭ hodiaŭ la plej grava esperanto-klubo de Danio. Nur kvar tagojn poste delegitoj de la diversaj grupoj kunvenis por fondi la landan asocion Centra Dana Esperantista Ligo (CDEL). La saman jaron oni organizis en Kopenhago postkongreson por la 4-a UK en Dresden, kaj tiuokaze havis la honoron gastigi L.L. Zamenhof.

La unua entuziasmo tamen baldaŭ malplivarmiĝis. La fama profesoro Otto Jespersen transiris al Ido, kaj kvankam malmultaj sekvis lin, tio estis bato al la prestiĝo de

Esperanto. Tamen eĉ pli forte frapis la movadon la akcidentaj mortoj de du junaj kaj kapablaj aktivuloj: la 28-jara "animo" de KEK, f-ino Marie Schröder en 1909, kaj 34-jara Skeel-Gjörning en 1910. Dum multaj jaroj la plej grava aktivulo estis f-ino Margrethe Noll, kiu pro siaj persisto kaj fideleco al Zamenhof gajnis la kromnomon "patrino de la dana Esperanto-movado".

Dum dudeko da jaroj la dana movado iom vegetis, sed en 1929 la juna instruisto Lorenz Friis spertis la faman Cseh-instruiston Tiberio Morariu gvidi ferian kurson por instruistoj, invitive de CDEL. Tio spronis lin aranĝi la unuajn Internaciajn FERIAjn Esperanto-kursojn por komencantoj, progresantoj kaj instruontoj, kiuj baldaŭ famiĝis en la tuta Esperanto-movado. Ili okazis ĉiujare ĝis 1975, plej ofte en la Internacia Altlernejo en Helsingør. La entreprenema Friis ankaŭ eldonis librojn sub la marko "Dansk Esperanto-Forlag" (Dana E-eldonejo), interalie tre bezonatan grandan vortaron Esperanto-danan. Ne mankis la rezultoj: CDEL duobliĝis de 18 kluboj kun 674 membroj en 1934 al 39 kluboj kun 1.236 membroj en 1935.

Samjare ekestis Dana Laborista Esperanto-Asocio (DLEA). Ĝi organizis SAT-kongresojn en Kopenhago 1939 kaj en Århus 1947 kaj 1960. La nazia okupado dum la dua mondmilito apenaŭ tuŝis Esperanton; ene de la lando la esperantistoj povis agi sufiĉe libere, kvankam estis rezistantoj almenaŭ inter la laboristoj. Inter la membroj de DLEA estis du internacie konataj, nome Poul Thorsen (1915-2006) kiel aŭtoro kaj Paul Neergaard (1907-1987) kiel sciencisto. DLEA estis malfondita en 1992.

Tuj post la milito oni formis "Komunkomitaton de Danaj Esperanto-organizoj", kie CDEL kaj DLEA decidis pri komunaj projektoj. Interalie oni sukcese instigis la ministerion pri eksteraj aferoj eldoni Esperantan version de oficiala filmo pri Danio. En 1948 estis fondita Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA) kiel sekcio de IFEF kaj ĝi aliĝis al la komuna komitato. DEFA ankoraŭ ekzistas, kaj la terminara laboro de kelkaj ĝiaj membroj estis tre aprezata de IFEF.

Tamen, malkonkordo komencis malkonstrui la aferojn. En 1953 CDEL retiris sin el la komuna komitato, kaj samjare kelkaj, kiuj ne kontentis pri la kultura nivelo en KEK, fondis en Kopenhago Komunan Klerigan Klubon (KKK). Tio vole-nevole kreis – aŭ aktualigis – malfacile ponteblan dividon inter intelektuloj kaj neintelektuloj en la dana Esperanto-movado. KKK fondis en 1954 eldonejon *KOKO*, ĉe kiu aperis pluraj gravaj tradukoj kaj originalaĵoj. Dum la 1970aj kaj 1980aj jaroj pli-malpli la samaj homoj funkciigis la eldonejon *Perspektivo*, kiu eldonis interalie la revuon *Horizonto* kaj kelkajn gravajn broŝurojn de Ivo Lapenna.

Komence ne estis tro grandaj problemoj; fakte, dum kvarona jarcento la perspektivoj ŝajnis brilaj. En 1956 okazis la 41-a UK en Kopenhago, organizita de KEK. En 1959 KKK organizis la monde plej solenan festadon de la centjariĝo de Zamenhof kaj tri jarojn poste la 47-an UK. Multaj politikistoj esprimis favoran opinion pri Esperanto, kaj la ministro pri internaj aferoj 1957-1960, Søren Olesen, eĉ mem estis esperantisto. En 1961 la ĝenerala sekretario de UEA Ivo Lapenna faris tre sukcesan prelekturleon en 12 porinstruistaj seminarioj, parolante en Esperanto kun interpretado de Sven Ziegler. La prelekturleo estis subvenciita de la ministerio pri edukado kaj Lapenna, irinte danki por la subvencio, faris tre bonan impreson al la ministro K. Helveg-Petersen. El tio poste

rezultis la t.n. Skandinavia Propono al Unesko, laŭ kiu estus starigota komisiono "por objektive konsideri en kiuj sferoj ekzistas bezono por internacia lingvo". Mallonge, la ĝenerala sento estis, ke per iom da penado la fina venko estos atingebla "en ĉi tiu generacio". En 1970 oni povis konstati ne malpli ol tri gravajn Esperantajn eldonejojn en Danio: krom tiu de Friis kaj KOKO estis *tk* de Torben Kehlet, inter kies titoloj troviĝas ekzemple la granda romano *La granda kaldrono* de John Francis el 1972.



Tamen interna malkonkordo fiaskigis la klopodojn por starigi regulan instruadon en iuj seminarioj post la prelekturono de Lapenna. Ankaŭ la Skandinavia Propono definitive abortis en 1968, tamen ĉi-foje ŝajne ne kulpis danoj. Malrapide, sed nerenverseble la membronombro faladis. La membronombro de CDEL kulminis en 1959, kaj tiu de KEK jam en 1949.

La 1970-ajn karakterizis pli-malpli febraj klopodoj renversi la evoluon. CDEL ŝanĝis sian nomon al la nuna Dana Esperanto-Asocio (DEA), kaj de tiam ĝia membreteco (nun nomata *Esperanto en Danio*) estas ĉiam nur en Esperanto. En 1975 unufoje tutlanda junulara organizo aliĝis al DEA, KEK organizis UK en Kopenhago, kaj KKK forpasis kun sia "animo" s-ino Kirsten Zacho. En 1978 la estro de la Progres-partio Mogens Glistrup proponis parlamentan rezolucion, laŭ kiu la registaro proponu al UN internacian konvencion pri Esperanto kiel unua fremdlingvo en la bazlernejoj de la membroŝtatoj. Ĝi kompreneble ne estis akceptita, tiom pli ke la Progrespartio estis tre kontestata de la aliaj partioj.

La sekvaj jardekoj estis pli sobraj. La centjaran jubileon en 1987 preparis precipe Preben Bagger per traduko de "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" de John Wells kaj per verkado de la libro "Sprog og sprog imellem" ("Inter la lingvoj"), kiu temas pri lingva kaj kultura politiko laŭ esperantista vidpunkto. Entute utila kaj pozitiva laboro,

sed neniu havis iluziojn pri ĝia efiko. Junularaj grupoj venadis kaj velkadis, sed iom post iom novaj homoj (ne ĉiam junaj) komencis domini la scenejon. En 1990 Eckhard Bick, enmigrinta el Germanio, eldonis tre bezonatan novan Esperanto-danan vortaron.

La historion de Esperanto en Danio karakterizas multe da ondado, kaj ni hodiaŭ estas bonŝance en leviĝo. Dana Esperanta Junulara Organizo de jardeko ekzistas kiel sekcio de TEJO, kaj ĝi nuntempe precipe aktivis somere en la fama rokfestivalo de Roskilde, kie oni kunvenigas gejunulojn el multaj landoj kaj instruas Esperanton al la neesperantistoj. Siatempe danaj gejunuloj trifoje okazigis la Kulturalan Esperanto-Festivalon (KEF). Ankaŭ estas reorganizita sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

DEA, prezidata de Ileana Schröder ekde 2003, uzas multe da energio por rilatoj ekster la movado. La reciproka membreco en la dana UN-asocio, kiu datiĝas de 1960, nun denove estas zorge flegata, kaj estas starigataj novaj rilatoj al ekzemple la Dana Socia Forumo kaj porpacaj organizoj, ĉar DEA konscias pri la graveco de rilatoj ekster la movado por ke la movado estu agnoskata. Tial, kiam mono kaj fortoj permesas, DEA montras sin ankaŭ en librofoiroj, sanfoiroj, kulturaj noktoj ktp. En 2010 aperis nova dana-Esperanta vortaro de Bick kaj Jens S. Larsen, konsultebla ankaŭ rete ĉe vortaro.dk. Jam en 2005 UEA aljuĝis trofeon Fyne al DEA, agnoskante la evoluon. Provizora krono de la laboro estis okazigo de la Universala Kongreso de Esperanto en 2011 en Kopenhago.

En la nova jarmilo ni ankoraŭ vidis eruptojn de konfliktoj, sed pli kaj pli evidentiĝas ke estas tri ŝlosiloj de sukcesa organiziĝo: konkordo, konkordo kaj konkordo. Dum dudek jaroj la Esperantovivo en Danio dependis de individuaj iniciatoj, sed el tio rezultas nur la absolute necesa minimumo por ekzisto. DEA konscias ke necesas pli altaj ambicioj, kaj iam ili estos atingitaj.

*Jens S. Larsen*

## La nuna stato

Dana Esperanto-Asocio estas la ĉefa aganto de la dana esperanto-movado, kiu konsistas el individuaj membroj kaj lokaj kluboj. Ni havas lokajn grupojn en Kopenhago, Næstved, Ålborg kaj Århus. Nombro de la membraro estas 230. DEA eldonas kvinfoje jare presitan revuon "Esperanto en Danio", neregule (laŭbezone) Novaĵleteron al membroj kaj retejon kun informoj sendataj al membroj kaj eksterlandaj interesitoj. DEA organizas ĉiujare ĝeneralkunvenon kun kultura programo kaj elekto de la estraro. Inter la servoj de la asocio menciindas la libroservo kiu recenzas kaj aktivigas liverante literaturon al la membroj.

DEA estas membro de Universala Esperanto Asocio. Ĉefdelegito estas Arne Casper, komitatano A Ileana Schröder kiu estas ankaŭ reprezentanto de DEA ĉe Eŭropa Esperanto Unio.

DEA konscias pri la graveco de rilatoj ekster la movado, kaj aktivis en la dana UN-Asocio, partoprenas en diversaj aranĝoj kiel Socia Forumo, Pacaj marŝoj, foiroj ktp. Certe la plej grava lastatempa agado de DEA estis la laboro por organizi la 96-an

Universalan Kongreson en Kopenhago en 2011. La estraro de DEA eniris tutnombro en LKK-on.



La sekcioj de DEA kiuj estas samtempe ankaŭ sekcioj de koncernaj internaciaj organizoj estas la junulara sekcio DEJO kaj la dana ILEI sekcio.

Dana Esperanta Junulara Organizo: aranĝas precipe renkontiĝon dum la fama somera muzika festivalo de Roskilde, kiu allogas multajn eksterlandajn junulojn, ĉar ĝi estas la plej populara muzika evento en Norda Eŭropo por gejunuloj. La unua renkontiĝo okazis en 2007 kaj ĉiusomere la nombro de partoprenantaj esperantistaj gejunuloj plu kreskis al 120. La celoj de la projekto estis siatempe vigligi la junularan esperantan movadon kaj krei novajn rilatojn kun gejunuloj de aliaj landoj. Bedaŭrinde dum la historio de tiu sekcio okazis kelkfoje ke ĝi malaperis pro manko da novaj junuloj. La nuna sekcio estis fondita en 2004. La ligilo inter DEA kaj la junulara sekcio estas ke la prezidanto de DEJO estas membro de la estraro de DEA.

ILEI sekcio: estis denove fondita en januaro 2006. La sekcio organizas kursojn dum la jaro kaj ofte invitas spertajn eksterlandajn instruistojn por oferti semajnfinajn kursojn al la membraro. Sekciestro estas Bent Jensenius. Ankaŭ la ILEI konferenco kaj la simpozio pedagogia okazis en Kopenhago en 2011.

Alia memstara Asocio estas DEFA (Dana Esperatista Fervoĵista Asocio) kiu estas la dana sekcio de IFEF, kies prezidanto estas Jan Niemann. Eĉ se nombre malgranda, DEFA tre aktivas kaj organizas monatajn kunvenojn kun faka programo kaj partoprenas en la terminara laboro de IFEF.



Kelkfoje okazas neformala kunlaboro inter diversaj aktoroj, kiel okaze de KEF (Kultura Esperanto Festivalo) kiu estas organizata kiel aparta projekto. Cetere DEA uzas multe da energio kaj tempo al plivigliĝo kaj plifortigo de la dana movado, kaj povas konstati ke la malnombriĝo de la membraro kiun oni spertis antaŭ kelkaj jaroj ĉesis kaj ŝanĝiĝis al pozitiva evoluo. Alia granda kelkjara defio de DEA estis eldono de Dana-Esperanta vortaro eldonita en aprilo 2010 kaj lanĉita dum la jarkunveno.

*Ileana Schroeder*

## Esperanto en Estonio

Esperanto atingis Estonion baldaŭ post la apero. Kiel la unua esperantisto, jam en 1891 lernis E-on Jaan Tenisson, antaŭa volapukisto. La unua E-kurso por estonoj aperis en la gazeto "Postimees" ("Poŝtisto").

En la komenco de la 20-a jarcento aperis jam kelkaj lernolibroj. Dum pli ol dek jaroj la movado okazis nur kiel lernado kaj renkontiĝoj de unuopuloj el malvasta rondo de tiutempa estona intelektularo. La unua publika kurso de Esperanto okazis en 1907. En la sama jaro oni sukcesis ricevi permeson por fondi la unuan oficialan E-organizaĵon Revela Esperantista Grupo. Ĉe la lulilo de la grupo estis kelkaj verkemuloj, aktivuloj kiuj restis longe gvidantoj de la movado. Ekde 1908 oni komencis eldoni revueton "Estlanda Esperantisto".



La pasinta jarcento ne estis por Esperanto senhalta antaŭeniĝo. Tion bremsis du tuthomaj katastrofoj - la du mondmilitoj, politikaj malpermesoj, ekonomiaj depresioj, interhomaj misrilatoj. Tamen la nobla ideo ne pereis, ĝi progresis kaj evoluis. Ne estas multaj movadoj travivantaj pli ol jarcenton kaj restantaj vivkapablaj spite al ĉiuj malfacilaĵoj. La plej vigla agado en Estonio okazis en 70-aj kaj 80-aj jaroj de la pasinta jarcento. Ĉiujare aperis tradukoj de niaj klasikuloj, Esperanto estis en kelkaj mezlernejoj kiel fakultativa lernobjekto. Tiama estona klerigministro Ferdinand Eisen estis esperantisto kaj favoris nian agadon. Bona ekzemplo pri fruktodona agado estas Tartua Esperanto Societo kun ĝia gvidanto Madis Linnamägi. Li agadis en akademiaj rondoj ĉe la Tartua universitato kaj samtempe organizis somerajn renkontiĝojn por lernantoj. En Tallinn nia plej eminenta movadano tra jardekoj estis Jaan Ojalo.

En la 90-aj komencis denove stagnado, jam la trian fojon. Okazintaĵoj de la komenco de 90-aj jaroj, transiro al la merkatekonomio venigis okcidentan kapitalon. Sed ĝi

neniam venas sola, ĝi kunportas sian lingvon, amaskulturon kaj senlaborecon. La angla lingvo tuj okupis gvidlokon en la klerigsistemo, negoco kaj en ĉiuj vivofakoj. Ĝi okupas la ĉefan lokon surstrate, superante la lokan nacian lingvon. Kono de la angla donas esperon ricevi laboron bonokaze ekster la hejmlando. Esperanto ne donas monon, ĝia praktika uzado dume nur postulas elspezojn, ĉu aĉetado de libroj, veturo al renkontiĝoj, kongresoj. Sed esperantistoj neniam kaj nenie apartenis al ekonomiaj prosperuloj, ili estis kaj estas simplaj oficistoj, kleruloj kun malaltaj enspezoj. Estas malfacile reklami lernadon de Esperanto sen ĝia praktika uzado Kelkfoje oni demandis per kio ni pravigu daŭrigon de la agado en niaj malgrandaj kluboj kaj rondoj, se la nura nobla ideo pri frateco, egaleco kaj demokratio neniom valoras?

Novan evoluetaĵon montris aperoj de grandaj vortaroj E-naciaj kaj nacia-esperantaj en la komenco de la 21-a jarcento. Ni kredas, ke la interreto havas pozitivan influon al niaj agadoj. Ni sukcesis konservi tradicion de someraj Baltiaj Esperanto Tagoj, kion laŭvice organizas Litovio, Latvio kaj Estonio. Parolante pri la nuna situacio ni devas bedaŭrinde denove uzi la vorton stagnado. Jam dum kelkaj jaroj ne okazas E-kursoj por plenkreskuloj, pro kio la vicoj de esperantistoj ne kreskas, sed



malkreskas pro maljuniĝo. La kvanto de konsciaj esperantistoj preskaŭ falis al la nivelo de la iama Revela Esperantista Grupo. Unuopaj lernantoj ne donis alkreskon al la organizita movado Estas fakte, ke la tekniko evoluas pli rapide ol intelekta kulturo de la homaro. La mondon regas grandaj potenculoj kun sia lingvopolitiko kontraŭ kio estas apenaŭ iom konkurenckapabla paca kaj demokratia idearo de Esperanto. Kaŭzoj de la krizo ne kaŝiĝas en la internacia lingvo, sed ekster ĝi. Ni ne estus veraj esperantistoj, se ni ne vidus post tiu ĉi pesimisma fono ankaŭ ion esperigan. En tiuj kondiĉoj la estona Esperanto-movado apogas sin al la internacia movado, al ties sukcesoj kaj progreso. Evoluo estas tajdosimila: sukceson ofte sekvas stagno aŭ eĉ malsukceso, kiun siavice sekvas sukceso. Misrikolton en unu regiono povas paraleli rikoltabundo en alia regiono. Tamen ni esperu, ke la tempo subtenas Esperanton. Ne konvenas paroli pri misrikolto. Ni fosu nian kampon, semu nian semon.

*Tõnu Hirsik, Estona Esperanto Asocio*



## La Finnlanda movado

Esperanto venis al Finnlando, kiu tiutempe apartenis al Rusa Imperio, jam tuj post la ekesto de la lingvo. La unuaj gazetaraj artikoloj, kiuj referencis al la Unua libro, aperis jam en 1887 kaj unuaj finnlandanoj lernis Esperanton jam en 1887 kaj 1888.

Laŭ apero de gazetaraj artikoloj Esperanto disvastiĝis aparte rapide ekde 1904. La unua finnlingva lernolibro aperis en 1902 kaj la dua en 1904. Pli frue finnoj lernis Esperanton tra sved- aŭ germanlingvaj lernolibroj. La fondiĝo de Esperanto-societoj komenciĝis kun la socia aktivado post 1905. Ankaŭ la blindula Esperanto-agado, kiu estis grava parto de finnlanda Esperanto-agado, komenciĝis jam tiam. La unua Esperanto-societo en Helsinko estis fondita en 1905 kaj la Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) estis fondita en 1907, kiam komencis aperi ankaŭ la unua esperantlingva gazeto en Finnlando. Post la sendependiĝo de Finnlando en 1917 Esperanto komencis vigle disvastiĝi en la lando. Dum unu jaro 1918-1919 estis venditaj tri mil lernolibroj de Esperanto. Esperanta Finnlando, plene en Esperanto, havis en 1920 preskaŭ 800 abonantojn en Finnlando. En 1922 okazis la 14-a Universala Kongreso en Helsinko, unu el unuaj internaciaj kongresoj en sendependa Finnlando. Tamen post la kongreso la splitiĝo al neŭtrala kaj laborista movado disigis la fortojn. Kiel la tria kolono funkciis Esperanto-Instituto de Finnlando, kies gvidanto Vilho Setälä restis ekster la konfliktoj kaj povis agi kun ŝtata subvencio. Ĝenerale la agado restis malpli aktiva ol antaŭ la kongreso en 1922. Finnlanda esperantisto, profesoro G.J. Ramstedt estis la unua ambasadoro de Finnlando en Japanio, kaj li profitis pro kontaktoj kun esperantistoj en Japanio kaj povis ankaŭ subteni esperantan agadon en Japanio.



Esperanta agado pli vigliĝis en 1930-aj jaroj kaj post la milito. La apero de esperanta traduko de Kalevala estis ebla en 1964 kun ŝtata subvencio. Unuiĝo en Esperanto-movado okazis en 1960-aj jaroj, kiam la laborista movado forvelkis. Antaŭaj aktivuloj de laborista esperanto-movado plu agis en EAF. Vilho Setälä (1892-1985) estis aktiva esperanto-instruisto kaj disvastiganto de Esperanto kaj fondis en 1955 Fondumon Esperanto kies kapitalo ebligas ankaŭ nuntempe subtenadon de esperanta agado. Setälä estis inter 1955 kaj 1965 ankaŭ prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Aktiva agado rezultis ankaŭ internaciajn kongresojn, tiujn de SAT en 1958 en Helsinko, de fervojistoj en Helsinko en 1960 kaj la pinto de aktiva agado estis la Universala kongreso en 1969 en Helsinko. Poste okazis ankoraŭ du kongresoj de SAT en 1972 en Kuopio kaj en 1982 en Iisalmi, kvankam tiam la laborista Esperanto-asocio ne plu agadis. Fervojista kongreso okazis en 1979 en Turku kaj Internacia junulara kongreso en Rauma en 1980.

Esperanto ĝuis vastan popularecon en popolkleriga libertempa lernosistemo ĝis la 1980-aj jaroj, kiam aliaj lingvoj fariĝis pli popularaj. Ekzemple komence de 1970-aj

jaroj Esperanto estis same multe studata kiel la itala aŭ la hispana kaj ankoraŭ en komenco de la 1980-aj jaroj Esperanto estis inter la 15 plej studataj lingvoj.

La membronombro de EAF atingis sian pinton en 1984, kiam EAF kaj ĝiaj membro-organizaĵoj havis entute 722 membrojn. Novaj membro-societoj fondiĝis, inter ili la junulara sekcio FEJO en 1977.

En 1980-aj jaroj EAF akiris sian propran oficejon en Helsinko, kiu helpis en organizo de agado. La unua oficejo estis en duone subtera kelo sed en 1997 kun helpo de testamenta donaco la asocio akiris novan, pli grandan oficejon. La asocio havas 10 membrasocietojn (el kiuj tri fakaj: instruista, blindula, junulara) en ĉefaj urboj kaj krome ekzistas neformalaj Esperanto-grupoj en preskaŭ same multe da urboj.

La forvelko komenciĝis en 1990-aj jaroj, kiam la oficialaj kursoj fariĝis malpli oftaj kaj la membronombro komencis malgrandiĝi. Organizaĵoj malfacilaĵoj kaŭzis eĉ la portempan malfondon de la asocia gazeto Esperanta Finnlando en 1987. La nova gazeto tamen startis jam en 1989 kaj povis travivi ĝis nun la ŝanĝon de pluraj ĉefredaktoroj. La organizo de Universala Kongreso en 1995 en Tampere ne multe turnis la negativan evoluon. Kelkaj lokaj membrasocietoj estis malfonditaj, same kiel la fervojista Esperanto-societo. Okazis ankaŭ Kultura Esperanto-festivalo en Helsinko en 2000 kaj 2005.



La manko de organizitaj kursoj en oficiala libertempa lernosistemo estas problemo kiu limigas alvenon de novaj membroj, kvankam daŭre aperas aktivaj individuoj. En multaj urboj la kvanto de membroj fariĝis malgranda kaj la aĝiĝo de membroj kaŭzis naturan malkreskon de membraro. En Esperanto-societoj la agadon gvidas ofte grandparte samaj personoj kiel jam antaŭ 30 jaroj. La membronombro malkreskas preskaŭ ĉiujare kaj estis en 2011 nur iom pli ol 300. Post la Universala kongreso en Tampere en 1995 ankaŭ la Esperanto-societo de Tampere povis akiri propran oficejon. Tamen la maljuniĝo kaj malkresko de la membraro kaŭzas daŭran minacon al la agado de esperantistoj.



Somera kurso, unue dum 30 jaroj (1968-1997) en somera universitato de Jyväskylä, poste en monaĥejo Valamo kaj ekde 2013 en popola instituto en Orivesi restis preskaŭ la sola regula Esperanto-kurso. Kursoj estas aranĝitaj de Esperanto-kluboj, plejparte ekster la oficiala libertempa lernosistemo, kiu kaŭzas malfacilaĵojn en informado pri kursoj. La malapero de Esperanto-kursoj estas unu el la gravaj kialoj por malkresko de la membraro. Informa agado funkcias relative bone, aparte okaze de naciaj aranĝoj, vintraj kaj aŭtunaj tagoj kiuj kutime okazos diversloke, ankaŭ en lokoj kie ne ekzistas esperantistoj.

Esperanto ĝenerale ĝuas pozitivan renomon en Finnlando, sed malmultaj emas eklerni ĝin. La nivelo de Esperanto-agado kaj de esperantistoj tamen kreskis, pri kio atestas ekzemple apero de novaj lernolibroj, esperanta rokgrupo Dolchamar kaj la aktivado de finnlandaj esperantistoj en internacia nivelo. Ankaŭ apero de libroj en (i.a. tradukoj el finnlanda literaturo) aŭ pri Esperanto estis dum lastaj jardekoj relative ofta.

*Jukka Pietiläinen*



## La Francia Esperanto-movado

Enkonduke necesas emfazi la longan tradicion de forta movado en Francio ekde la unua Universala Kongreso en Bulojno ĉe Maro (1905), ĝis la plej granda UK post la jaro 1990 (Montpeliero 1998).



Riĉa, abunda, ampleksa movado kun grava specifaĵo kompare al la plej multaj landaj movadoj estas ne unu sed almenaŭ 2 grandaj landaj asocioj: Esperanto-France kaj SAT-Amikaro. Ne eblas diri kiu estas la ĉefa organizaĵo ĉu unu aŭ la alia.

La franca Esperanto-movado konsistas el pluraj organizaĵoj kaj ejoj. Konsiderante, ke krom tiuj 2 ĉefaj asocioj ekzistas pluraj aliaj movadoj menciindaj.

Kvankam la aŭtoro de ĉi tiu artikolo estas franco kaj esperantisto de 1999, estas al li malfacile priskribi la francian Esperanto-movadon, tiom abundan kaj ampleksan, kia ĝi estas. La sekva superrigado ne pretendas je kompleteco, mi anticipe petas pardonon al tiuj kiujn mi eventuale forgesis mencii.



## 1. UFE - Espéranto-France, landa asocio de UEA

Pli ol 100-jara, la Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), nomiĝas nun Esperanto-France en la franca.

Komitatanino A en la Komitato de UEA estas Claude Nourmont.

Ĉefdelegito: Renée Triolle.

La asocio estas administrata de la Komitato, konsistanta el 16 reprezentantoj de la individuaj membroj, elektitaj por 2 jaroj, kaj ĉirkaŭ 15 reprezentantoj de la kontraktintaj asocioj, ĉu regionaj, ĉu fakaj (FET, FKEA, GEE, JEFO). La Komitato elektas ĉiujare el inter siaj membroj la Estraron.

Ĉefaj agadoj kaj servoj: administra sidejo, libroservo, landa kongreso, Eksteraj Rilatoj kaj Informado, informbulteno, aperas reta bulteno „Esperanto Aktiv“, revuo „Le Monde de l'Espéranto“, kulturo kaj eldonado ekz. „La Eta Princo“.

La landa kongreso okazas ĉiujare en malsama urbo, en 2010 ĝi estis komuna kun GEA-kongreso, en Kaiserslautern. En 2011, aprile, ĝi okazis kadre de la Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo en Seto, kunorganizata kune kun SAT-Amikaro, la Franca Fervojista E-Asocio kaj la tiea regiona federacio, Langvedoko-Rusiljono.

Sidejo: 4 bis rue de la Cerisaie, Paris 4a



Ĉefaj fortoj de UFE: produktado de modernaj informiloj kaj revuoj, aktivado pri Eksteraj Rilatoj, dissendado de Gazetaraj Komunikoj, tutlanda reto de regionaj kaj lokaj asocioj.

Malfortoj: manko de homfortoj por kelkaj necesaj agadoj, ne sufiĉa landa identeco de la asocio.

La okazinta plijuniĝo de la gvidantoj ne certigis haveblon de disponeblaj aktivuloj nek tutan transigon de la spertoj. La membraro malpli grandiĝas ĉiujare jam de jaroj. Estis pli ol 630 membroj en 2009.

Projektoj nunaj de la asocio : IREM 2011, interasocia (kun SAT-Amikaro) petskribo pri Esperanto al bakalaŭra sistemo, renovigo de la elektrokonduka-sistemo en la sidejo

## 2. Regionaj federacioj kaj lokaj kluboj

Aparte notindas, ke UFE kontraktis kun 11 regionaj asocioj, nomataj « regionaj federacioj », el la 15 ekzistantaj regionaj asocioj.

Tiuj 11 regionaj federacioj estas: Aŭvernjo, Nordfrancio, Bretonio, Francilio, Langvedoko-Rusiljono, Sudpireneoj, Orientfrancio, Rodanalpo, Provenco, Piktovio-Ĉarento, Centrokcidentio.

La 4 nekontraktintaj regionaj asocioj estas : Akvitanio, Limoĝio, Franĉkonteo, Normandio.

La regionaj asocioj estas nomataj Federacioj, ĉar ili mem kunligas lokajn kaj departamentajn asociojn (klubojn kaj grupojn). Tiuj estas pli malpli aktivaj. Vidu la kompletan liston je la ligilo suba. Ĝenerale la regionaj federacioj havas propran bultenon kaj/aŭ retliston, organizas kongreson, renkontiĝojn, gastigas prelegantojn ... La kluboj estas ĉirkaŭ 130 en 75 departamentoj, laŭ la repaĝo listiganta ilin.

Jen la regionaj asocioj ordigitaj laŭ malkreska nombro de lokaj kluboj : 22 Bretonio, 17 Rodanalpo, 14 Provenco, 10 Akvitanio, 10 Orientfrancio, ĉ. 10 Sudpireneoj, 9 Langvedoko-Rusiljono, 8 Francilio, 5 Nordfrancio, 6 Centro, 5 Burgonjo, 4 Piktovio-Ĉarento, 3 Normandio, 2 Aŭvernjo, kun necesa atentigo, ke grandeco de regionoj kaj aktiveco de kluboj tre varias. Tute subjektive ni nomu kelkajn aktivajn klubojn, laŭ nia scio, kaj laŭ alfabeto de ilia regiono:

Alzaco-Loreno: Strasbourg, Thionville, Metz, Nancy, ...

Bretonio: Vannes, Rennes, Saint-Brieuc ...

Centrokcidentio: Angers, Nantes, Saint-Nazaire, Le Mans, Orléans, Tours, Espéranto-Indre.

Francilio: Bondy - Espéranto, Espéranto Val-de-Seine (77), Verda Stelo - Espéranto 94, ...

Langvedoko-Rusiljono: Montpellier, CBE Béziers, Nîmes, ...

Nordfrancio: Lille-Villeneuve-Espéranto, Arras, Dunkerque, Amiens,

Provenco: Aix-en-Provence, La Ciotat, Marseille, EKEM (Manosque), Rodanalpo : Bourg-en-Bresse, KoToPo (Lyon), CERL (Lyon), Romans, Grenoble, Annecy, Oyonnax...

Sudpireneoj: CEEA Ariège, Toulouse, Espéranto 65

En nekontraktintaj regionaj asocioj :  
Akvitania: Languo Esperanto 64 (Pau), GEP (Perigordo), Bordeaux,  
Burgonjo: Dijon, Quétigny, Auxerre  
Champagne-Ardenne: Troyes  
Normandio: Hérouville

Ne eblas paroli pri aktivado en Francio forgesante ekziston de franclingva novaĵ-bulteno aperanta 6-foje jare, Esperanto-Info.

Necesas ankaŭ menciigi kelkajn regionajn renkontiĝojn, organizatajn surloke, sendepende de landaj asocioj: Pluezek, Mediteranea E-Semajno en Agay, Internacia Esperanto-Semajno en Seto, Nordfrancia E-renkontiĝo (Stella-Plage) ...



### 3. SAT Amikaro, franclingva sekcio de SAT

La asocio SAT-Amikaro celas disponigi Esperanton aparte al homoj por kiuj la lingvo havas utilon socian, pedagogian, kulturen kaj praktikan. Ĝia membraro altas ĉirkaŭ 680 homoj, el kiuj dudeko en Belgio kaj Svisio.

Ĉefaj agadoj kaj servoj : administra sidejo, libroservo, ĉiumonata revuo La SAGO, organizado de t.n. « SAT-Amikara kongreso » ĉiujare, eldonado de lernolibroj, libroj, instruado, interalie en ĝia pariza sidejo; radio-elsendo en Radio Libertaire en Parizo.

Sidejo : 132-134 boulevard Vincent Auriol, Paris 13a.



Nunaj projektoj : dokumentfilmo pri Esperanto, montrata laŭplane dum IREM 2011, interasocia petskribo (vd supre) pri bakalaŭreco.

Interasocia strukturo inter UFE kaj SAT-Amikaro estas la Franca Esperanto Instituto (FEI), kiu respondecas pri preparado kaj aranĝado de ekzamenoj plurnivelaj.

En Parizo troviĝas cetere ankaŭ la sidejo de SAT, la Sennacia Asocio Tutmonda.

#### 4. Fakaj asocioj

JEFO, junulara sekcio de UFE, landa sekcio de TEJO

Ĝiaj nunaj ĉefaj agadoj : organizi someran renkontiĝon FESTO, eldoni poŝ-kalendarojn. Ĝi eldonadis revuon "JEFO Informas", nun ne plu.

FFEA (Franca Fervoĵista Esperanto-Asocio), franca sekcio de IFEF

Fondita en 1949, FFEA estas aliĝinta sekcio kaj de la Arta Unuiĝo de Francaj Fervoĵistoj (UAICF) kaj de la Internacia Federacio de Esperantistoj Fervoĵistoj (IFEF).

Ĉiujare ĝi organizas kongreson, partoprenas la internacian kongreson, aranĝas staĝojn, kursojn, aktivadojn en diversaj urboj, eldonas bultenon. Ĝi havas ĉirkaŭ 400 membrojn, kiuj membras ofte ankaŭ en aliaj landaj kaj lokaj asocioj.

Sidejo : 9 rue du Château Landon, Paris 10a.



FET (Fédération Espérantiste du Travail) [=Federacio Esperantista pri Laboro]

Ĝi estis fondita en 1936, dum la "Popola Fronto".

Temas pri asocio de laboristoj, kies ĉefa agado estas organizi Esperanto-budon en la Homara Festo, ĉiujare en septembro. Ĝi eldonis revuon "Le travailleur espérantiste", ekde 1912, nun ne plu.

## EDE-France, unua landa sekcio de Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE)

Politika partio por-esperanta fondita en 2003. Ĝi partoprenis la EU-balotojn en 2004 en Francio, en 2009 en Francio kaj Germanio.

Ĉefaj rezultoj: 25 000 voĉoj en 2004 en Francio, ĉ. 40 000 voĉoj en Francio kaj Germanio en 2009

## FKEA (Franca Katolika Esperanto-Asocio), franca sekcio de IKUE

Ĝi organizas diservojn (mesojn, en Eo) dum diversaj renkontiĝoj kaj propraj aranĝoj. Ĝi havas ankaŭ informbultenon elŝuteblan en sia retejo. En somero 2010 la kongreso de IKUE okazis en Parizo.

## GEE (Groupe des Enseignants d'Espéranto), franca sekcio de ILEI TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) estas faka asocio, kies sidejo estas en Alzaco.

## Eurokka / Vinilkosmo

Fama muzikeldonejo, kies sidejo estas en Donneville, apud Tuluzo. Vidu la aneksaĵon.

## 5. Kulturcentroj

Ne eblas fini la superrigardon sen paroli pri kelkaj Esperanto-kulturcentroj en Francio : Kastelo Grezijono (en Baugé).

Ĝi organizas somerajn staĝojn, ofte gastigas E-kongresojn kaj eventojn, malofte ne-Esperantajn eventojn.

Adreso: Kulturdomo de Esperanto, Château de Grésillon, FR-49150 Baugé, Francujo  
Kvinpetalo (en Bouresse)

Kvinpetalo estas la staĝejo, kulturcentro kaj studocentro de Societo Yvonne Martinot (SYM). Ĝi estis fondita en 1985. Dum preskaŭ dudek jaroj la centron estris kaj mastrumis Georges Lagrange kaj Suzanne Bourot. Ĝi organizas staĝojn pri la lingvo Esperanto, pri la E-kulturo kaj pri diversaj fakoj. Okazas tie ekzamensesioj.

Kvinpetalo enhavas, krom sia propra ampleksa biblioteko, la librojn postlasitajn de du elstaraj francaj esperantistoj, Gaston Waringhien kaj Roger Bernard. Ĝia libroservo proponas al la staĝanoj la plej novajn eldonitaĵojn, kaj Lego-Klubo proponas analizojn kaj diskutojn pri tiuj eldonaĵoj. Kvinpetalo organizas perkorespondan kurson kvarnivelan.

Adreso: 15 rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse  
Gravegas ankaŭ la Nacia Esperanto-Muzeo en Gray

Nacia Esperanto-Muzeo estas samtempe:

- Riĉa biblioteko kun 6000 titoloj de libroj aŭ broŝuroj en aŭ pri Esperanto.
- 1400 titoloj de gazetoj, revuoj, bultenoj malnovaj kaj nuntempaj.
- Dokumentejo kaj arkivejo de multaj lokaj kaj regionaj asocioj aŭ de malaperintaj samideanoj, prezento kaj ekspozicio de multnombraj objektoj E-rilataj, filatelaĵoj (kongresaj stampoj), E-poŝtmarkoj, bondezirkartoj ktp.

Adreso: Maison pour tous, FR-70100 Gray

Ligilaro: UFE: <http://esperanto-france.org>

Interfederacia konferenco: <http://federacioj.online.fr/federacioj/mapo.htm>

SAT-Amikaro: <http://www.esperanto-sat.info/>

Lokaj asocioj: <http://esperanto-panorama.net/francio/>

Regionaj asocioj:

en Bretonio <http://esperanto.bretonio.free.fr/kontaktoj-fr.html>

Nordfrancio <http://esperanto.nord.online.fr/eo/kluboj/index.htm>

Rodanalpo <http://rodanalpa.federacio.free.fr/articles.php?lng=eo&pg=16>

Orientfrancio <http://esperantofranceest.chez.com/groupes.htm>

Francilio <http://francilio.org/-Associations?lang=fr>

JEFO: <http://esperanto-jeunes.org>

FET : <http://www.fetesperanto.org>

IREM: <http://esperanto.sete2011.free.fr/>

FFEA: <http://ifef.free.fr/afce.htm>

FKEA: <http://fkea.fr/>

EDE Francio: <http://www.e-d-e.org/-FR-Francio->

TAKE: <http://take.esperanto.free.fr/unikodo/take.htm>

Espéranto-Info: <http://www.esperantoinfo.info/>

Pluezek <http://www.pluezek-esperanto.net/>

Grésillon: <http://gresillon.org/>

Kvinpetalo: <http://www.kvinpetalo.org/>

Nacia Esperanto-Muzeo en Gray: <http://www.naciaesperantomuzeo.fr/nacia.html>

Kontribuoj de francaj esp-istoj al la originala Eo-kulturo [Komento el Libera Folio]

Krome, ni ne forgesu :

- unu el la plej, aŭ eble eĉ la plej populara nuna kantisto en Esperantio, Jomo,
- diversaj kantistoj kaj muzikistoj talentaj: FaMo, Francis Soghomonian, Jacques Yvart (kiu ne nur brile esperantigis Brassens), Ĵak Le Puil, Morice Benin, Duoble Unu, Initials DC, Kore,
- la jam menciita koruso Interkant [http://www.dailymotion.com/video/xamstm\\_koruso-interkant-en-preghejo-de-bou\\_music](http://www.dailymotion.com/video/xamstm_koruso-interkant-en-preghejo-de-bou_music) kaj la bretona koruso Meven,
- la unua hiphopa grupo en Esperanto, la Pafklik <http://www.ipernity.com/home/lapafklik>, kies ano Platano plu repas sole,
- pli nova, tre talenta pianisto-kantisto Gijom <http://www.ipernity.com/home/lilioakvo>,

- la ĉefa muzikeldonejo en Esperantio, el Tuluzo, Vinilkosmo <http://www.vinilkosmo-mp3.com/>,
- kaj certe mi plurajn forgesis, eĉ se mi provis mencii ĉefe la nuntempajn artistojn.

Plie, la francoj estas la plej multnombraj inter la sukcesintoj de la nova KER-ekzameno. Malmultaj landoj povas konkurenci tian riĉan kulturen panoramon. Francio estas unu el plej fortaj Esperanto-landoj en la mondo.

La supre skizata kaj jam aludita bunteco de la franca Esperanto-movado certe estas forto, kiu kontribuas grave al la monda E-movado. Sed ĝi konsistigas ankaŭ gravan defion: kiel utiligi tiun diversecon kaj mobilizi ĝin cele al grandaj tutlandaj agadoj por Esperanto. Tio okazis kelkfoje: je la manifestacio por lingva diverseco Europa Bunto en 2004, la interasocia renkontiĝo en Bulonjo ĉe Maro en 2005, la partopreno de EDE en la EU-balotoj en 2004 kaj 2009... sed ne sufiĉe laŭ mi por maksimume sukcesigi la poresperantan agadon en Francio.

*Aleks Kadar*

## Germana Esperanto-asocio

Tiu ĉi prezento de Germana Esperanto-Asocio (GEA) ne estas superrigardo pri ties historio, sed dokumentas la staton de GEA komence de la 10aj jaroj de la 2a jarmilo. Por ke ĝi estu fidinda fonto por postaj generacioj, la aŭtoro rezignas ajnan plibeligon aŭ gloradon de atingoj, personoj aŭ instancoj, sendepende de tio, ĉu ili estas objektivaj glorindaj aŭ ne, kvankam konfesinde jam la elekto de menciataj temoj estas iom subjektiva kaj kvankam ĉiu raporto spertas ioman influon de la raportanto. Tiu lasta estas d-ro Rudolf Fischer, prezidanto de GEA ĝis 2013 kaj aktivulo, kiu konas la Germanan Esperanto-movadon sur ĉiu tavolo laŭ propraj spertoj. Jen lia raporto.



*Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo, landa ligo de GEA, dum ekskurso en Sundern-Stockum, la vilaĝo kun la plej multaj Esperanto-objektoj de la mondo (2010)  
Foto: Hedwig Fischer*

Antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj mi lernis Esperanton, nur kelkajn jarojn poste mi komencis labori por GEA. Por prijuĝi la nunan staton de GEA, mi tial ĉefe komparas ĝin kun la stato de antaŭ 35 jaroj. Tiutempe la nombro de kotizantaj membroj estis sub 1.000, sed ne precize konata, ĉar lokaj grupoj anoncis la koncernajn datumojn nur bloke. La memstare aganta Germana Esperanto-Junularo (GEJ) estis tiutempe malgranda grupo de ĉ. 35 membroj, sed jam ekzistis la ĉiujara Internacia Seminario. Precipe en la 80-aj jaroj floris la movado en Germanujo. Ĉirkaŭ la jubilea jaro la nombro de (regule pagantaj) membroj trovis sian kulminon (ĉ. 1.600), sed poste ĝi ĝis nun konstante ŝrumpis, ĉiujare al nuntempe 869. Same GEJ spertis grandan periodon kun pli ol 300 membroj ĝis la defalo al nun 103 fine de 2010.

Ĉiam la homoj volas nur nombrojn por mezuri staton aŭ sukceson. Ĉu tio ne estas misgvida? Ni komparu aliajn aspektojn. En la 70-aj jaroj GEA havis ege malmultajn aktivulojn, kiuj faris tutlandan laboron. Sed ekzistis relative densa reto de lokaj grupoj kun vigla verda vivo, preskaŭ sendependa de GEA. La Germana Esperanto-Kongreso, iam la sola tutlanda aranĝo, dum la lastaj jaroj iĝis pli grava, ĉar GEA kongresis kune kun najbaraj asocioj aŭ kun Eŭropa Esperanto-Unio. En la 80-aj jaroj fondiĝis la Germana Esperanto-Biblioteko en la urbo Aalen, naskiĝis "Esperanto aktuell", ekiĝis la unua centra membro-administrado per komputilo, eksplodis la partoprenantaro de la Internacia Seminario, aldoniĝis la Internacia Festivalo, okazis unuafoje la Printempa Semajno Internacia, laboris vigla estraro kun multaj komisiitoj, ĉiuj honor-oficaj.



*GEA-stando kun aktivuloj dum la "movada foiro" kadre de la UK en Rotterdam (2008), Foto: Hedwig Fischer*

La 90-aj jaroj vidis la unuiĝon de GDREA kun GEA<sup>1</sup>, sed la kresko de la membraro estis nur portempa. Post la 100-jara jubileo de Esperanto ankaŭ tiuj, kiuj longe revis pri la "fina venko", perdis tiun esperon kaj direktis sin al realisma disvastiĝo kaj praktika uzo de Esperanto, al scienca esploro de planlingvoj (fondo de "Gesellschaft für Interlin-

<sup>1</sup> Skizan superrigardon pri la historio de Esperanto en GDR donas Detlev Blanke en "der esperantist" 26(1990) n-ro 146, p. 121-137.

guistik") aŭ al simpla ĝuemo. El "samideano" iĝis "kliento", kiu postulas servojn kaj amuziĝon.



### *Unu el tabuloj enire al Esperanto-urbo Herzberg am Harz*

Tio gvidis al la nuna situacio. Ankoraŭ ekzistas la triŝtupa organiza sistemo de aktivado, nome loka grupo, (federaci)landa ligo kaj tutlanda asocio. Sed en la epoko de la Interreto ne plu estas bezono de hejma Esperanto-klubo por ekzerci Esperanton, kaj tial la lokaj grupoj en Germanujo forvelkas. Por la landaj ligoj restas la bezono, organizi regionajn aranĝojn kaj alparoli la kulturministeriojn, kiuj en Germanujo pli-malpli memstare fiksas klerigan sistemon sur federaci-landa nivelo. Sed (kiel jam ĉiam) mankas aktivuloj, kiuj transprenas tiun laboron. Nuntempe funkcias landaj ligoj nur en 11 el 16 federaciaj landoj. Sarlanda Esperanto-Ligo ĉiam sekvis separismeman kurson. La ligoj de Berlino kaj Brandenburgio kuniĝis, tiuj de Bremen kaj Bavarujo estas antaŭ malfondiĝo. Same suferas la fakaj ligoj. Praktike ankoraŭ nur la landaj sekcioj de la instruistoj (ILEI) kaj de la ekumenaj Kristanoj (KELI) aktivas, la iame fortaj sekcioj de la naturamikoj kaj de la fervojistoj en Germanujo estas en agonio.

Kompreneble: ĉiam jam Esperanto-organizoj floris kaj velkis kaj refloris, depende de la fakto, ĉu subite aperis novaj motoroj. Sed la nuntempa klara ĝenerala tendenco estas, ke la daŭran ŝrumpon ne kompensas la gajnoj. Ĉar ankaŭ ekster la Esperanto-movado en partioj, sindikatoj, eklezioj kaj asocioj estas same, ne temas pri krizo de Esperanto, sed pri krizo en la socio: ĉiam malpli da homoj engaĝiĝas por iu celo. Sed ekzistas

aliflanke ankaŭ pozitivaj signaloj. GEA mem ne malbonfartas, sed la pozitiva evoluo havas aliajn akcentojn.

La estraro de GEA estas pli granda ol antaŭ 30 jaroj, mezume pli juna kaj ankaŭ pli aktiva. Sekve multaj taskoj, kiujn en antaŭaj tempoj transprenis la lokaj grupoj, nuntempe faras la estraranoj mem. Ekzemple Germana Esperanto-Kongreso sen subteno de unu-du estraranoj ne plu estas imagebla. La kunlaboro kun GEJ jam pro tio pliboniĝis dum la lastaj jaroj, ĉar postenuloj de GEJ senprobleme transiris al GEA por plulabori tie. La membro-datumbankoj kuniĝis, la GEJ-revuetu "kune" estas integrita parto de "Esperanto aktuell".

Regionaj kaj tutlandaj aranĝoj trovas bonan eĥon. GEA lanĉas novan aranĝon: Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA). Sed ne nur GEA kaj GEJ, ankaŭ privatuloj ekster GEA ofertas ĉiujare plurajn internaciajn kunvenojn kiel la Internacian Festivalon (Hans-Dieter Platz) kaj Novjaran Renkontiĝon (Lu von Wunsch-Rolshoven/EsperantoLand). Ekde kelkaj jaroj la turisma urbeto Herzberg ĉe montaro Harz nomas sin "Esperanto-urbo". Tie aktivas Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, kiuj zorgas por tio, ke Esperanto estu tie ĉie videbla kaj renkontebla, eĉ la urbestro lernis Esperanton. Kursoj okazas en pluraj lernejoj klasoj, kaj viglas la ĝemelaj kontaktoj al la Pola urbo Gora helpe de Esperanto. GEA havas en Herzberg sian klerigan centron (ICH), kie s-ino Kóródy, modeste pagata de GEA, organizas klerigadon de Esperanto-instruistoj, surbaze de la ILEI-regularo.



Konfesinde GEA nur malfacile trovas honor-oficajn aktivulojn: Iuj ne havas tempon pro profesia streĉo, aliaj ne havas monon pro senlaboreco. Nuntempe GEA pagas du dungitojn kaj unu helpanton. Tamen ĝi havas ekde du jaroj oficejon en Berlin kaj tial estas trovebla en la ĉefmetropolo de Germanujo. Antaŭ nelonge la membrokunveno draste altigis la GEA-kotizojn, sed la membronombro ne ŝrumpis pli ol kuintime, forfalas ĉefe familianoj. Rezulte GEA havas pli da financaj fortoj por sia origina celo: plivastigo de Esperanto.

Al tiu celo relative juna GEA-estraro nun volas pliplugi la kampojn, sur kiuj estis kelkaj progresoj dum la lastaj jardekoj:

- Plusubteno de la kleriga centro de GEA en Herzberg,
- lanĉado de pliaj kursoj en universitatoj, kie la pordoj por Esperanto estas pli malfermitaj ol en la antaŭaj tempoj,



- pli ofta apero en ne-Esperantaj medioj (precipe Interreto, alternativaj grupoj kaj kampanjoj, sed ankaŭ sociaj kaj politikaj instancoj).

Oni povas jam konstati, ke Esperanto akiris certan renomon en progresema tavolo de la socio. Nia lingvo staras por idealo de humanisma, vivinda mondo, al kiu homoj ju pli sopiras, des pli malentuziasmigas ilin la potenculoj de politiko, ekonomio kaj religio. La Esperanto-movado devos oferti al ili familian etoson, tion montras la ankoraŭ florantaj aranĝoj.

Sed ankaŭ ekster tiuj rondoj de simpatiantoj intertempe pli multaj homoj konstatas, ke la ekzisto kaj funkcio de Esperanto estas fakto: Firmaoj baptas varojn per Esperantaj nomoj, posedantoj de ret-paĝoj petas tradukojn, kulturaj instancoj invitas al partopreno en agadoj, la gazetaro bonvole raportas, kaj ĉie ajn, kie temas pri versioj en laŭeble multaj lingvoj, oni provas aldoni "memkompreneble" ankaŭ Esperanton.

GEA estas preta kaj kapabla, uzi tiujn eblojn kaj helpi, ke Esperanto plifortigu sian rolon de memkomprenebla, ĉarma kultura ornamaĵo en la socio. La financoj de GEA estas stabilaj, la revuo "Esperanto aktuell", ĝuste kun nova redaktisto, aperos plu regule. GEJ refortiĝas per novaj aktivuloj, kiuj bone kunlaboras kun GEA. Oni do povas pozitive resumi: Malgraŭ la problemo de postulema klientaro kaj mankantaj aktivuloj, GEA vidas certan sukceson de sia agado. Eĉ se la membronombro ŝrumpis, tio ne nepre validas por la klientaro: Esperanto en Germanujo ne estas en danĝero.

*Rudolf Fischer*



## La esperantista movado en Grekujo

La greka esperantista movado aperis nur kelkajn jarojn post la apero de Esperanto mem.

En Ateno, en 1904, la unua aktiviĝis d-ro Emanuil Dragumis, kiu post propono de Zamenhof mem iĝis membro de la Lingva Komitato, fondita dum la 1a Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer.

En 1906, en Samoso, la greka insulo, tiama aŭtonoma regiono estanta sub turka hegemonio, d-ro Anakreon Stamatiadis starigis kaj organizis la Samosan Esperantistan Societon.

Tiu Societo estis la unua greka E-asocio kaj la unua verko de A. Stamatiadis, kiu, poligloto, persono perfekte edukita en famaj francaj universitatoj pri diversaj scienc-fakoj, estis tiam eminenta medicindoktoro, nomumita ĉefkuracisto de la princolando kaj ĝenerala direktoro de ties Centra Hospitalo.



La organizita en Samoso movado, malgraŭ la unuaj malfacilaĵoj, iom-post-iome plifortiĝis.

En 1909 estis eldonita la unua greka E-revuo, la "Greklingva Esperantisto", oficiala organo de la Samosa Esperantista Societo, kiu estis senpage presita, zorge de la princolanda presejo.

D-ro Stamatiadis, kiel familia kuracisto kaj intima amiko de la princo-reganto de Samoso influis lin tiel, ke la 8-an de oktobro 1910, estis deklarita la princa decido, laŭ kiu Esperanto estis oficiale enkondukita en la stud-programo de la duagrada edukado de la lando, kiel devige instruata leciono.


Tio estis kaj estas ĝis nun unika atingo, do Grekujo estas la unua kaj la sola lando, en kiu estis laŭ ŝtata decido instruita Esperanto, en la publikaj lernejoj.

Dume, en la cetera lando unuopaj esperantistoj en diversaj urboj aktiviĝis kaj organizis grupojn, koteriojn, kursojn de Esperanto.

En Grekujo, la unua libro en Esperanto estis eldonita en 1907. Temis pri la "Fundamento de Esperanto" de L.L.Zamenhof, tradukita en la grekan.

Sekvis, en 1908, instrulibro kun elementa dulingva vortaro, ankaŭ traduko de franca instrulibro.

La unuan vere grekan instrulibron de Esperanto verkis kaj eldonis A.Stamatiadis.



Post la unua mond-milito, en 1920, A.Stamatiadis kun aliaj grekaj esperantistoj loĝantaj en Konstantinopolo, fondis en tiu granda urbo de Turkujo grek-esperantistan asocion kun la nomo "Konstantinopola Esperanto-Asocio, BIZANTIO".

La unua klopodo por la starigo de E-asocio en Ateno ne estis sukcesa. Estis fondita (19/3/1924) la asocio "Novhelenan Esperanto-Societo", kiu tamen malaperis post ne-longe.

En 1925 estis eldonita en Samoso nova revuo, nomita "Samosa Esperantisto".

Unu jaron pli poste A.Stamatiadis transloĝiĝis en Ateno, kie li kolektis, kunvenigis kaj organizis la disajn atenajn esperantistojn, kun kiuj li fondis (1926) Helenan Esperanto-Asocion, la centran, vivantan ĝis nun esperantistan organizon de Grekujo, ekde la komenco membro de UEA kiel Landa Asocio de Grekujo.

En 1927 estis fondita en Ateno alt-nivela societo, celanta la kunordigadon de la instru-programoj, surbaze de la zamenhofaj indikoj, kun la nomo "Helena Esperanto-Akademio", kiu pli poste estis ŝanĝita al "Helena Esperanto-Instituto"

**ΑΝΑΨΥΚΤΙΚΑ-ΚΑΦΕΔΕΣ**

Coca Cola	330 ml	180	
Coca Cola Light	330 ml	180	
FANTA	παρσοφύλ.	330 ml	180
	μπαρσοφύλ.	330 ml	180
SPRITE	330 ml	180	
AMBITA	παρσοφύλ.	250 ml	180
	μπαρσοφύλ.	250 ml	180
PERDIER	200 ml	250	
	330 ml	430	
Επιρροημένο νερό	500 ml	130	
	1500 ml	250	
ΑΜΕΤΕΛ	330 ml	340	
ΧΑΛΒΕΝ	330 ml	260	
ΚΡΑΣΙ ΛΕΥΚΟ ΚΑΜΠΑ	375 ml	600	
	750 ml	1100	
Ουζο	200ml	300	
Ουζακι		700	
Nes καφέ		200	
ΕΜΗΛΙΝΕΣ		180	
ΕΓΓΛΙΝΕΣ		200	
ΕΣΠΕΡΙΔΑ		200	
ΚΑΡΑΜΕΛΑ		280	
ΣΟΚΟΛΑΤΑ		290	
ΤΟΙΣ		190	

**Esperanto**  
ΓΕΥΣΤΙΚΕΣ ΑΠΟΣΤΟΛΕΣ

**Esperanto**  
9249302 και 304  
Α. ΣΥΤΡΩΝ ΑΙ. ΑΓ. ΠΑΡΕΔΕΣ 14. ΠΡΩΤΗ ΔΙΑΝΟΜΗ, 10ημ. 5μ.μ.

**9249302 και 304**  
ΠΡΩΤΗ ΔΙΑΝΟΜΗ: 10 ημ. 5 μ.μ.

En 1929 aperis en Ateno la organo de Helena Esperanto-Asocio, la periodaĵo "La Internacia Lingvo", kiu estis eldonata ĝis la fino de 1936.

Tuj poste aperis la dumonata revuo "Helena Esperantisto", kiu estis eldonata ĝis la fino de 1952.

Post la starigo de Helena Esperanto-Instituto kaj en la kadro de la funkciado de Helena Esperanto-Asocio estis fonditaj en Ateno la "Atena Studenta Esperanto-Grupo" (1928), kaj pli poste la "Helena Virina Esperanto-Grupo", organizoj kun ne longa vivdaŭro.

En la daŭro de la lasta jardeko antaŭ la dua mond-milito, la

esperantista movado en Grekujo floris.

En 1930 estis kreitaj 47 asocioj en samnombraj grekaj urboj, dum en Ateno, ĉirkaŭ la centra forto de Helena Esperanto-Asocio, aktiviĝis ankoraŭ sep esperantistaj kluboj kaj grupoj.

Granda sukceso de la esperantista agado en tiuj jaroj estis la sinsekvaj oficialaj cirkulejoj, eldonitaj de la ministerio pri la Publika Klerigado, per kiuj estis permesata la

fakultativa instruado de Esperanto en la lernejoj de la meza edukado kaj en la Pedagogiaj Institutoj de la lando.



Du jarojn post la fondo de Helena Esperanto-Asocio estis kreita la dua granda greka esperantista asocio en Tesaloniko, kun la nomo "Esperanto-Unio de Tesaloniko".

Tiu asocio estis frukto de la iniciato kaj fervora agado de la brila esperantisto, d-ro Ioanis Spataris, universitata profesoro, kiu oferis multon al la E-movado en la norda Grekujo.

La preskaŭ 20-jaran brilan, progresan iradon de la greka E-movado

ĉesigis perforte la dua, tute katastrofa por Grekujo, mondmilito.

La elliberiĝon de la ruinigita lando sekvis kruela, multjara interna milito, tiel, ke dum preskaŭ dek jaroj la greka E-movado, kiel ankaŭ multo simila, velkis.

En la mezo de la jardeko de 1950 komenciĝis nova periodo de iom-post-ioma progreso, kiu tamen limiĝis ĉefe en Ateno kaj en Tesaloniko. En la ceteraj urboj de la lando restis nur unuopaj esperantistoj kaj tre malmult-membraj grupoj..

Dum tiu periodo, de la nova florado, Helena Esperanto-Asocio lokiĝis en grandega apartamento, en la centro de Ateno, posedanta akcept-salonojn, oficejon, bibliotekon, instuĉambrojn, kafejon, eĉ modestajn gastoĉambrojn.

Esperanto estis instruata ĉiutage, kaj en la vasta klubejo okazis diversaj publikaj aranĝoj, prelegoj, ekspozicioj, bankedoj k.a.

Brilaj momentoj de la agado de Helena Esperanto-Asocio estis la organizado:

- de la oficiala Universala Esperanto-Postkongreso de UEA okazinta en Ateno en 1973,
- de la 61a Universala Esperanto-Kongreso de UEA okazinta en Ateno en 1976,
- de la 32a Universala Esperanto-Kongreso de T.E.J.O., okazinta en Tesaloniko en 1976,
- de la 2a Balkana Esperanto-Kongreso, okazinta en Ateno en 1984.

Krome estis organizitaj multaj aliaj tre interesaj aranĝoj, kiel la granda, tre riĉa E-ekspozicio, kiu estis prezentita okaze de la 100jara jubileo de Esperanto en 4 salonoj kaj estis inaŭgurita de la oficiale ĉeestinta direktoro de la ministerio pri kulturo.

Notinde, ke en la daŭro de preskaŭ kvin jaroj (1981-1985) la Helena Esperanto-Asocio posedis alt-nivelan 40-membran koruson, kiu partoprenis multajn, publikajn, solenajn, ĥor-prezentadojn, en kiuj ĝi kantis en Esperanto.

Lasta revuo de Helena Esperanto-Asocio estis dumonata "Nia Verda Informilo", kiu aperadis de 1978 ĝis 1980.

Ĝis 1987 la instuado de la lingvo en la asociaj kursoj estis farita helpe de la malnovaj lernolibroj verkitaĵoj de A.Stamatiadis: "Gramatiko, Ekzercaro, Historio kun Vortaretoj Esperanta-Greka kaj Greka-Esperanta", "Elementoj de la Internacia Lingvo Esperanto kun Vortaro Esperanta-Helena", "Gramatiko kaj Ekzercaro de la Internacia Lingvo Esperanto", "Nova Gramatika Libro", "Vortaro Helena-Esperanta kun radikaro Esperanta-Helena".



Temis pri bonegaj lernolibroj, tamen bazitaj en tre malnova, ne plu alloga instrumetodo.

En 1987 aperis la nova, moderna, granda (672-paĝa) lernolibro "La Internacia Lingvo Esperanto - metodo de instuado-meminstruado", de Spiros Sarafian.

Temas pri helpilo precipe utila laŭ tio, ke ĝi povas esti uzata de memlernantoj.

Multe pli poste, en 2008, estis eldonita plena, tre

granda (3voluma, 1642paĝa) Greka-Esperanta Vortaro kaj same plena unuvoluma Esperanta-Greka Vortaro, de la sama aŭtoro.

En 1996 aperis eble la plej impona en la mondo libro pri Esperanto.

Temas pri la greklingva, 786-paĝa, verko de Kostas Kiriakos "Esperanto, la lingvo de la Espero", kiu enhavas kaj pritraktas la tuton de Esperanto, la strukturon de la lingvo, la detalan historion, la evoluon kaj atingojn de la esperantistaro en la daŭro de la unuaj cent jaroj, la internacian E-movadon, la ideologion, ĉion koncernantan la grandan aferon de Esperanto.

La komenco de la 21a jarcento trovis Grekujon en stato necerta, duba, ne tute stabila laŭ la ekonomio kaj la noveŭropa orientiĝo. La longa, tre multekosta preparado de la Olimpikaj Ludoj de 2004 kaj la eniĝo de la lando en la eŭropan zonan de la komuna monunuo, la teruraj, katastrofaj politikaj-militaj eventoj en proksimaj mondpartoj, eĉ en

la balkana najbaraĵo, iom-post-iome ŝanĝis negative la ekvilibron, skuis ĝis dekadenco multon, ankaŭ la grekan E-movadon, kiu grade komencis malfortiĝi.

Multaj monsubtenantoj, volontuloj, aktivuloj baldaŭ perdiĝis, la luksa asocia klubejo estis anstataŭita de modera duĉambra oficejo, la ĉiaspecaj aranĝoj ne plu estis eblaj.

En tiaj cirkonstancoj, la grekaj esperantistoj ne estis ankoraŭ pretaj sekvi kaj partopreni la rapidan invadon de la tutmonda esperantistaro en la interreton.

La unuaj paŝoj en tiu ĉi kampo estis faritaj per la eldono de monata Elektronika Informilo pri la Esperanta Movado, nomita "Esperantujo".

La apero de tiu periodaĵo, en preskaŭ 3000 adresoj, daŭris ses jarojn (2002-2007), ĝis la neatendita, subita forpaso de ties kreinto kaj prizorganto Aleksandros Fragias.

Malgraŭ la negativaj cirkonstancoj de la kriza periodo, en la jaro 2006 estis eldonitaj gravaj, tre interesaj verkoj, nome la granda "Historio de Herodoto" kaj tri filozofiaj verkoj de Platono, "La Apologio de Sokrato", "Kritono" kaj "Fedono", tradukitaj en Esperanton de Spiros Sarafian.

La terura ekonomia krizo, kiu la lastajn jarojn violence batis Grekujon, devigis la grekan E-movadon perdi multon ankoraŭ, sian lastan, moderan ejon, grandan nombron de membroj, kotizantoj, aktivuloj, amikoj, do, reveni en la staton de la unuaj postmilitaj jaroj.

Tamen, nun estas la interreto, kaj tie rifuĝis la greka E-movado, kiu, per sia grandioza greklingva retpaĝo [www.esperanto.gr](http://www.esperanto.gr) kaj du kolektivaj facebook-lokoj daŭrigas la agadon pri la informado de la greka publiko rilate al Esperanto kaj la tutmonda movado kaj atingoj. Samtempe ĝi partoprenas konstante la tutmondan agadon, kontaktante ĉiujn samideanojn kaj ĉeestante al ĉia aktiveco.

Plej lasta atingo de la greka E-movado estas la impona (400-paĝa) libro, "125 jaroj de Esperanto", eldonita okaze de la ĉi-jara tutmonda festado por la 125 jaroj de Esperanto, verkita de la kreinto de la asocia retpaĝo Kostas Kiriakos.

Ĉiam celante unue la informadon de la greka publiko pri la afero de Esperanto, ankaŭ tiu ĉi greklingva verko kombinas la plej interesan materialon de la retpaĝo kun la plej freŝaj, allogaj novaĵoj kaj la ĵus lastaj eventoj, atingoj, programoj.

*Spiros Sarafian*





## Esperanto-movado en Hispanio

Esperanto havas longan historion en Hispanio, sed ofte kompleksan kaj ne ĉiam stabilan. Ĝi alvenis tre baldaŭ post la publikigo de la Unua Libro, malgraŭ la relativa izoliteco de la lando en tiu periodo, kaj rapide naskiĝis kluboj kaj agadrondoj. La unua klubo, laŭdire sepa en la mondo, fondiĝis en Malago (Málaga). Ĉefan disvastigon akiris la lingvo en ĉiuj regionoj de la mediteranea marbordo, kiuj kune kun Madrido ankoraŭ restas relative la plej fortaj eĉ nun. En Valencio kaj Murcio kreiĝis la unuaj regionaj asocioj, kaj ankaŭ, en 1903, la unua tuthispania asocio.

Mallonge post tio kreiĝis propra asocio por Katalunio, kie de la komenco aktivadis tre viglaj homoj. La kunlaboro inter la kataluniaj aktivuloj kaj tiuj en la cetero de Hispanio trapasis fazojn tre variajn, tre ofte en apartaj asocioj, kvankam ne mankis okazoj de komuna organizado en la propaganda flanko. Bona ekzemplo estas la kvina Universala Kongreso, okazinta en Barcelono en 1909, en tre malfacilaj sociaj kondiĉoj.

La jardekoj de 1920 kaj ĉefe de 1930 estis la oraj jaroj de la esperanta movado en Hispanio. Ĝi altiris homojn el ĉiuj sociaj tavoloj kaj ideologioj, kvankam la organiza flanko ne ĉiam estis glata, se diri iom milde. Okazis konfrontiĝoj inter diversaj asocioj, dum grava parto de la movado, ĉefe tiu ĉirkaŭ la anarkiistaj medioj, preferis organiziĝi aparte. La kultura parto ne speciale elstaris internacie, sed estis sufiĉe vigla, kaj foje ekzemplodona, kiel evidentigas la "Kataluna Antologio" eldonita en 1925, spegulo por similaj iniciatoj en aliaj landoj kaj lingvoj.

Sed en 1936 komenciĝis intercivitana milito, kiu daŭris ĝis 1939, kaj rompis la ĝeneralan fluon. Dum la milito Esperanto estis uzata de diversaj medioj kun propagandaj celoj, ĉefe en la flanko kiu apogis la legitiman registaron, kaj kun kiu probable simpatiis plimulto de esperantistoj. Krom la partopreno de diversaj eksterlandaj esperantistoj en la respublikanaj trupoj, menciindas la publikigo de propagandiloj, inter kiuj la revuo "Popola Fronto" fariĝis ekzemplo de batalanta prozo.

Post la fino de la milito, la aktivadoj por Esperanto preskaŭ komplete ĉesis. La lingvo mem ne estis malpermesita, sed diversaj ĉikanoj kaj la ĝenerala socia kaj politika etoso kreis akutajn malfacilaĵojn, kiujn nur per granda peno kaj elstarinda sindediĉo, la restanta esperantistaro sukcesis venki. En 1947 kreiĝis Hispana Esperanto-Federacio, ununura asocio permesita je tutlanda nivelo, kiu baldaŭ relanĉis sian agadon, siajn kongresojn, kursojn kaj propagandon. La movado progresis malgraŭ la izoliteco de la lando, kaj akiris sufiĉe da prestiĝo, kun apogo eĉ de homoj kun gravaj konektoj kun la tiama reĝimo.

En 1968 la Universala Kongreso estis celebrata en Madrido, kaj la Internacia Junulara kongreso en Taragono. La apogo de la reĝimo kaŭzis polemikojn, kiuj tiutempe ne alvenis al la surfaco. En 1969 estis kreita la Fondumo Esperanto, kiel financa apogo al la movado, kaj ĝi ankaŭ disvolvis kulturalan agadon, inter kiu la plej grava frukto estis la eldono de la traduko al Esperanto de la verko de Miguel de Cervantes "Don Quijote de La Mancha".

Post la morto de la diktatoro Franco alvenis ŝanĝo de la aliro al Esperanto. La socia kaj politika malfermo ebligis la floradon de aliaj ideologioj kaj de pli vigla kaj bunta kultura aktivado, foje kun alternativeca karaktero. Kreiĝis regionaj asocioj kaj lokaj kluboj, inter kiuj la plej vigla fariĝis Kataluna Esperanto-Asocio, rekreita en 1980 kiel posteulo de la antaŭmilita KEF.



*Kolekto Hispana Literaturo*

La laborista movado renaskiĝis, kaj en 1986 estis celebrita Kongreso de SAT en Sant Cugat del Vallès (proksime al Barcelono). Sekve de tio fondiĝis Kultura Asocio Esperantista (KAE), kun ĉefa agado en Katalunio, kaj iom poste Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj, kiu fariĝis la asocio ligita al SAT en Hispanio. Diversaj konfliktoj en tiu ĉi asocio kondukis, post nova kongreso de SAT en Alikanto (2002), al la kreado de nova asocio SAT-en-Hispanio, ankoraŭ nun aktiva, kaj kiu en 2013 organizis novan SAT-kongreson en Madrido.

En 1993 la Universala Kongreso okazis en 1993 en Valencio. Dum ĝi ĉefrolis grupo de verkistoj kiuj fariĝis konataj per la nomo "Ibera Skolo", plu troviĝantaj inter la plej atentindaj literaturistoj en la nuna esperanta kulturo. La iberia grupo respondecas ankaŭ pri granda parto de la publikigado de literaturaj verkoj, inter ili la kolekto "Hispana Literaturo", kaj ankaŭ de vortaroj (inter kiuj elstaras la eldonado en 2003 de la impona "Granda Vortaro Hispana-Esperanto" de Fernando de Diego), gramatikoj, lerniloj kaj disvastigaj verkoj.

## Organiza panoramo

Hispana Esperanto-Federacio estas la landa asocio ligita al UEA kaj ankaŭ membro de Eŭropa Esperanto-Unio. Ĝia organizado estas miksa, simila al tiu de UEA, kun membroj kolektivaj (lokaj, regionaj kaj fakaj), kaj kun individuaj membroj. En la lastaj

jaroj la individua agado estas signife pli forta. Ekzistas iniciatoj por pli federaciigi la asocion, laŭ la modelo de la ĝenerala lando, en kiu regionoj kaj naciecoj (la t.n. aŭtonomaj komunumoj) akiris pli ĉefan rolon kaj povon, sed ĝis nun la nombro de regionaj asocioj ligitaj al HEF restas limigita.

La strukturo de HEF estas relative stabila, kvankam dum la lastaj jaroj ĝi foje suferis je pli mallonga daŭrado de la estraroj, kaj foja prokrasto en la apero de la bulteno. La nombro de anoj malkreskas malrapide, sed ne estas antaŭvideblaj subitaj malkreskoj, ĉar la aĝo de la aktivuloj ne estas alta. Nur inter la kataluniaj anoj de HEF, tre aktivaj ekzemple en la organizado de la ĉiujara Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo, unu el la plej sukcesaj laŭ nombro de aliĝintoj, la aĝo povas esti zorgiga cirkonstanco.



*Partoprenantoj en Hispana Kongreso 2012 en Almagro*

sudorienta Francio. Ĝi organizas ĉiun duan jaron kongresojn, kun ampleksa partopreno de junuloj, kaj lastatempe montris tre gravan aktivadon en la informa flanko, kun rilatoj al aliaj eksteresperantaj asocioj, publikigo de libroj kaj aliaj materialoj en la kataluna, kaj ĝenerale forta implikiĝo en la socia vivo, akorde kun principaro kiun la asocio aprobis en 2008 en kiu oni konsideris Esperanton en pli ideologia maniero.

Siavice AEU havas anojn en ĉiuj andaluziaj provincoj kaj organizas periodajn renkontiĝojn. Ĝi iam suferis malstabiligon pro polemikoj pri aneco en la Civito, sed la problemoj ŝajnas plene solvitaj. La agado en Eŭskio organiziĝas ĉefe ĉirkaŭ la grupo de Bilbao, kie en 2004 sukcese disvolviĝis la 6-a Eŭropa Kongreso de Esperanto. En Galegio la asocia aspekto restas tre malstabila.

HEF aŭspicias ĉiujare Hispanan Kongreson (la lasta, en 2013 komence de majo, okazis en Zaragozo), kaj nutras modernan retejon <http://www.esperanto.es>.

Krom la asocioj rekte aliĝintaj al HEF, estas elstarindaj la agadoj de Kataluna Esperanto-Asocio kaj de Andaluzia Esperantista Unuiĝo. KEA agadas en la t.n. Kataluna Landaro, tio estas, krom Katalunio ankaŭ en Valencio, Balearoj kaj la



*José Antonio del Barrio, prezidanto de HEF*

En la tuta lando ne mankas junaj aktivuloj, sed la junulaj branĉoj de HEF, Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS), kaj de KEA, Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), montras organizan malfortecon. Kiel en aliaj landoj, oni rimarkas gravan aktivadon de junuloj en la reto, sed la proporcio de aliĝintoj al lokaj kluboj aŭ al aliaj asocioj estas malalta, kaj verŝajne la establita movado ne kapablas ilin aldoni al siaj vicoj. HEJS kaj KEJ, kune kun la junula asocio en Portugalio organizas ĉiujare la t.n. Iberian Renkontiĝon, en malsamaj lokoj de la duoninsulo, kun amuza sed ankaŭ kultura karaktero.

La defioj de la movado estas similaj al tiu de aliaj eŭropaj landaj asocioj: revivigi la prestiĝon de la lingvo, eliri el la relativa socia margeneco, profiti la novajn teknologiajn ŝancojn, kaj altiri novajn aktivulojn. La nunaj perspektivoj ne estas malbonaj, sed la progreso takseblas kiel tro malrapida.

*José Antonio del Barrio.*

## Esperanto-movado en Hungario

Kiom da personoj lernas Esperanton? Tiu demando povas leviĝi en ĉiu lando de Esperantujo. Rilate al Hungario la demando povas esti pli signifa. En nia lando multe da gejunuloj lernas la internacian lingvon, ĉirkaŭ 5000 personoj jare. Konsidere al nombroj de la ekzamenitoj Esperanto havas la trian lokon – rekte post la angla kaj germana – ĉe Fremdlingva Kleriga Centro.

Ĉe ni oni devas havi ŝtate rekonitan, mezgradan lingvo-ekzamenon pri iu fremdlingvo por akiri altlernejan aŭ universitatan diplomon. Ni, hungaroj tre malfacile lernas fremdajn lingvojn, pro tio multaj elektas Esperanton. Bedaŭrinde nur kelkaj estas movademaj, do la plimulto ne okupiĝas pri la lingvo post la sukcesa ekzameno. Komprenoble ekzistas ankaŭ avantaĝo, ja tiel amase gejunuloj konatiĝas kun Esperanto, kiuj iam en la estonteco povos iĝi Esperanto-parolantoj.

Hungaria Esperanto-Asocio, kiel landa asocio havas gravan rolon en la movado. Ni kuntenas la aktivajn esperantistojn, informas ilin pri la okazaĵoj, organizas aranĝojn, kunvenojn. El la 7-persona estraro 4 instruas la lingvon. Ni, ĉiuj faras la asocian laboron krom nia ĉiutaga profesio, do ni estas volontuloj.

Ekzistas aliaj asocioj, ne malmultaj, kiuj prizorgas siajn membrarojn, okazigas esperantajn eventojn. La klubmovado preskaŭ nuliĝis escepte kelkajn klubojn, kiuj povas ankoraŭ funkcii. Iam oni povis poluri sian lingvoscion nur en kluboj, aranĝoj. Nuntempe pere de interreto oni povas interparoladi en kiu ajn tempo.

En nia lando Esperanto estas instruata en kelkaj bazlernejoj, altlernejoj kaj universitatoj. Ĝenerale temas pri kursoj, sed en tiu altlernejo, kie mi instruas oni povas elekti Esperanton, kiel duan lingvon.

Kelkaj pensas, ke estus pli bone, se HEA fariĝus t.n. „ombrelasocio”, kiu ne havas individuan membraron, nur membroasociojn. Ili diras, ke tiu formo estas la moderna. Eble ni devus studi ankaŭ aliajn sistemojn por trovi la konvenan. Eble ni devus modernigi.

Nia Hungara Esperanto-Asocio hodiaŭ havas 1043 membrojn (2011).

*Ferenc Harnyos*



## Irlanda Esperanto-movado

La unua Esperanto-grupo en Irlando estis la Dublin Esperanto Group (Grupo Esperantista Dublina), kiu estis fondita en 1905. En 1907 fondiĝis Irlanda Esperanto-Asocio sub la prezido de E. E. Fournier d'Albe. Al la unua estraro apartenis bonkonata viro - Joseph M. Plunkett, unu el la sep subskribintoj de la Proklamo de la Irlanda Respubliko en 1916.

Dum la Unua Granda Milito 1914 - 1918 la Esperanto-movado dormetis. Fred Douglas, la tiama Sekretario de la Dublina Grupo, klopodis por la revivigo de la movado en Dublino post la milito, kaj en 1925 ĝi estis reorganizita de Frank McCormack kaj Mortished kun la helpo de Hugh McNeill kaj S-ro Macaulay.



De 1925 ĝis 1930 Irlanda Esperanto-Asocio progresis, aranĝis klasojn, kunvenojn kaj prelegojn. Ĝi propagandis en ĉiuj rondoj kaj eldonis gazeton Irlanda Esperantisto, kiu daŭris de julio 1926 ĝis 1928. En tiuj jaroj fondiĝis ankaŭ Esperanto-sekcio de la Societo de Modernaj Lingvoj en Dublino. Tiu multe propagandis en la kadro de la Societo. En 1927 juna ŝtatservisto, Lorcán Ó hUiginn, aliĝis al Irlanda Esperanto-Asocio kaj post nelonge fariĝis ĝia Prezidanto. Li fariĝis ĉefdelegito de UEA kaj eldonis du gazetojn, La Kolombo por la interna movado kaj Irlando Vokas Vin por eksterlandaj esperantistoj.

Ĉirkaŭ la sama tempo la Irlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj revigliĝis. La nova estrararo estis: Honora Prezidanto - Rev. M. H. Gaffney O.P.; Sekretario - H. McNiell; aliaj estraranoj Gesinjoroj H. Macaulay, Rev. Br. Lawrence, Lorcán Ó hUiginn. La neŭtrala Irlanda Esperanto-Asocio kaj la faka ILKE amike kunlaboris kaj multe propagandis. De 1930 ĝis 1934 la movado dormetis. En 1934 estis neniŭ oficiala klaso, tamen multaj esperantistoj en diversaj rondoj kunvenis de tempo al tempo.



Ankaŭ en la Nordo de Irlando aperis kelkaj entuziasmaj esperantistoj, el kiuj la ĉefa estis Dr. E. A. A. Stonely. Li estis Vicprezidanto de la Belfasta Esperanto-Grupo, kiun li fondis post la dua mondmilito. Li esperantistiĝis en 1938, instruis en kursoj kaj multe propagandis. Do, la jaroj 1934/35 finiĝis kun multe da agado kaj multe da membroj - la oraj jaroj.

Dum la jaroj 1937, 1938 kaj 1939 la Movado vigle daŭris. Oni konstante kunvenis, dancis, ekzamenis kaj festis. Dum tiuj jaroj multaj irlandaj esperantistoj ĉeestis Universalajn Kongresojn en Vieno, Varsovio, Londono kaj Berno, kie ili salutis la kongresanojn nome de Irlanda Esperanto-Asocio. Ili ĉeestis ankaŭ la Katolikajn Kongresojn kaj aliajn landajn kunvenojn.

La milito en Eŭropo finiĝis la dekunan de majo 1945. Ne ĉio haltis dum la militjaroj. Kvankam kontaktoj kun eksterlandanoj estis malmultaj, estis multaj kontaktoj inter irlandaj esperantistoj. Ili ofte kunvenis kaj ofte skribis unu al la alia. Ili faris planojn por la postmilita tempo. En Ballina, Co. Mayo, loĝis nova juna esperantisto, Liam Ó Cuirc, kiu fondis lokan klubon kaj multe propagandis. Tiu klubo certe estis la plej okcidenta en Eŭropo, frontante al la Granda Atlantika Oceano. Liam fariĝis delegito de Internacia Esperanto-Ligo (poste UEA) kaj post kelkaj jaroj li estis Sekretario de Irlanda Esperanto-Asocio. Tio ne estis bona aranĝo, ke la sekretario estis en Ballina kaj la ceteraj estraranoj en Dublino. Malgraŭ tio, oni faris multe da propagando kaj retenis



kontaktojn kun la multaj esperantistoj en la insulo. Dum la jaro 1953 multaj komencantoj ĉeestis la Esperantajn klasojn en la klubejo.



En 1968 aperis en la Sunday Independent longa artikolo pri Esperanto verkita de Liam Ó Cuirc. Samjare Irlanda Esperanto-Asocio anoncis ke pro invito de la Irlanda Asocio, la 53a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Trinity College, Dublino, dum Pasko (4a - 7a de aprilo) 1969. La Kongreso tiujare estis efektive kunkongreso de la Brita kaj Irlanda

Esperanto-Asocioj, kaj estis la rezulto de kunlaboro de du homoj, Jeremy Addis kaj Pat O'Reilly. La Kongreso brile sukcesis. Ĉeestis 200 esperantistoj el 13 landoj. Post la Kongreso oni ripozis ĝis 1970, kiam oni reorganizis Irlandan Esperanto-Asociacion kaj renomis ĝin Esperanto-Asocio de Irlando. Oni petis kaj ricevis aliĝon al UEA. Laŭ ĝia unua Novaĵletero en februaro 1971 la sekretario estis P. J. O'Reilly, la kasisto Christopher Fettes, kaj la redaktoro de la novaĵletero Jeremy Addis. Pli poste Christopher Fettes fariĝis prezidanto de la Asocio kaj Joy Davies estis sekretario kaj kasisto. Joy estis kaj estas unu el la plej kompetentaj sekretarioj kiun ni iam havis. Oni ankaŭ elektis kiel honoran prezidanton kaj patronon Harry Harrison, mondfaman sciencfikcian verkiston kaj fortan subtenanton de Esperanto.

Pli poste Liam Ó Cuirc elektiĝis kiel vic-prezidanto, Maire Mullarney kiel propaganda sekretario kaj Garbhan Mac Aoidh kiel komitatano kaj redaktoro de la Afrikaj Paĝoj de la reorganizita novaĵletero redaktita de Christopher Fettes. Ankaŭ refondiĝis Dublina Esperanto-Klubo, kiu seninterrompe kunvenis dufoje ĉiumonate, unue en Trinity College, poste en 87 Merrion Square, pli poste en 19 Upper Mount Street, kaj fine en 24 Burlington Road.

Ĉar ni nun alproksimiĝas al la nuntempo, mi mallonge listigos niajn ĉefajn atingojn en la periodo 1970 ĝis 1994. Unufoje esperantisto, Trevor Sargent, elektiĝis ano de la irlanda parlamento. La Verda partio subtene menciis Esperanton en sia Elekta Manifesto. Somhairle Mac Aoidh laboris ce Esperantotur, Pollando. Dum la periodo 1970 –1994 ni organizis jarkunvenon ĉiujare; aranĝis klasojn; traktis senpagan korespondan kurson; eldonis bonegan gazeton; helpis la Esperanto-movadon en Afriko; renkontis vizitantajn alilandajn esperantistojn ktp. La Dublina Kafeja Klubo kunvenis ĉiun semajnon sed diversloke. Gvidis ĝin Lorcan Mac Meanmain kaj Filip Ó Fathaigh.

Ĉiumonate (kutime en la unua aŭ dua tago de monato), la tiel nomata "Sabata grupo" kunvenas je la enirejo de la Universitato de la Triunuo (Trinity College), kaj post kuna mangaĵo, ekskursas aŭ kunestadas en iu agrabla restoracio, por konversacii kaj konatiĝi kun gastoj kaj novbakitaj esperantistoj, kiuj ĉiam estas bonvenaj. La jara kunveno aŭ loka kongreseto kutime okazas proksime al la fino de la jaro aŭ en Dublino aŭ aliloke.

Kvankam tre malgranda, EAI estas vigla kaj aktiva asocio. Ĝia oficiala organo estas la bulteno Nova Irlanda Esperantisto, kies redaktoro estas Joy Davies, nia fidela ĉiofarantino. Diversaj libroj kaj aliaj publikaĵoj en kaj pri Esperanto estis eldonitaj de anoj de la asocio, inter kiuj la plej gravaj estis tiuj verkitaj de karmemora Maire Mullarney.

En 2002 irlandata diplomato kaj bona esperantisto, doktoro Seán Ó Riain elektiĝis prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio kaj restis en tiu pozicio ĝis hodiaŭ. Li ege aktivis internacie kaj eŭropkadre. Rezulte de lia aktivado en 2012 okazis tre sukcesa kongreso de EEU en Galivo (Galway/*Gaillimh*) en julio kun 157 partoprenantoj el 28 landoj. Okaze de la kongreso la ŝtatprezidanto de Irlando Micheál D. Ó hUiginnaspiciis la kongreson kaj li kaj la ministrino de eksteraj rilatoj de Irlando Luncinda Craighton sendis al la kongreso tre pozitivajn deklarojn pri Esperanto.

#### Aldono

Libroj de irlandaj aŭtoroj tradukitaj en Esperanton:

- Ŝi kliniĝas por venki - komedio en 5 aktoj, de Oliver Goldsmith, tradukita de Motteau.
- Gulliver en Liliputlando - de Jonathon Swift, tradukita de Maud Inman.
- Salome - dramo de Oscar Wilde, tradukita de Hindrik Jan Bulthuis.
- Vojaĝo al Faremido - (daŭrigo de la rakonto pri la vojaĝo de Gulliver) de Johnathon Swift, tradukita de Frederiko Karinthy.
- Pigmaliono - dramo de Bernard Shaw, prezentita en Varsovio en 1959.
- Hundo de Ulstero, fabelo pri la irlandata heroo Kuhulano, tradukita de Joy Davies.
- La Noktmeza Kortumo - de Brian Merriman, tradukita de Albert Goodheir.
- La Petolulo de la Okcidenta Mondo - dramo de John M. Synge, tradukita de Albert Goodheir.
- La Graveco de Fideleco - de Oscar Wilde, tradukita de W. Auld.
- Omar Kajam - La Robaĵoj - tradukita el la angla traduko de Edward Fitzgerald.
- La Gaela Lingvo en Skotlando - Hodiaŭ kaj Hieraaŭ - de Garbhan Mac Aoidh.

*Garbhan MacAoidh*

## Pri la situacio de Esperanto en Italujo

Ĉi tiu artikoleto prezentas la situacion de la movado por Esperanto en Italujo. Ĝi celas prezenti ĝin ĉefe el la vidpunkto de la ebla subteno, kiun italaj esperantistoj povus doni al EEU, se ĝi petus ĝin.

Itala Esperanto-Federacio (IEF) estas la landa asocio de UEA en Italujo. Italaj esperantistoj havas historion de "ĉiuj en unu asocio, kaj ni kverelu inter ni interne de la sama asocio". La ceteraj land-nivelaj asocioj estas fakaj asocioj, tiu de la instruistoj, de la katolikaj esperantistoj, de la nevidantaj esperantistoj, kaj de la fervojistoj.

La asocio konsistas el proksimume 45 lokaj grupoj, kies membroj estas aŭtomate membroj de IEF (la grupoj kaj la federaciuo dividas inter si la kotizojn), kaj el izolitaj membroj (normale loĝantaj en lokoj, kie ne ekzistas loka grupo).



Ĝi gvidas la agadon de la lokaj grupoj pri informado. Dum la lastaj jaroj ĝi liveras senpage informmaterialon produktitan land-nivele al ĉiuj lokaj grupoj, kiuj bezonas ĝin en la bezonata kvanto. Mem ĝi prizorgas la informadon al la parlamentanoj kaj al la gazetoj per aŭtomatigita gazetara servo. Ĝi ankaŭ informas kandidatojn al la naciaj elektoj, kaj prizorgas servon de programetoj en la nacia televido, laŭ kanalo malfermita al NeRegistaraj Asocioj. Ĉi tiu tuta informa laboro estas faciligata pro sistemo ekzistanta en Italujo, laŭ kiu asocioj registritaj ricevas parton de la 5 mil-onoj de la impostoj, kiujn imposto-pagantoj povas indiki kiel donaceblajn al difinita asocio. Kiel vi povas imagi la konkurenco inter la asocioj estas grandega.

Ĝi ankaŭ kunlabore kun la itala landa sekcio de ILEI okupiĝas pri instruado. En Italujo, kiel en ĉiuj aliaj ekonomie evoluintaj landoj iĝas ĉiam pli malfacile aranĝi la tradiciajn

kursojn, kiujn la homoj vizitas ĉiusemajne. Ĉefe por gejunuloj la reto estas la preskaŭ sola kanalo, kaj tion ni provas ekspluati.

En Italujo ni havas italan kurson por junaj homoj, gvidatan de la junulara sekcio de IEF, kiu donas stud-gvidanton al ĉiu aliĝinto, kaj fidas ke la studgvidantoj laŭgrade portos la homojn al la movado (kio por procentaĵo efektive funkcias). Aldone al tio estas retaj paĝoj, oferto de aliaj materialoj en la reto, k.t.p. Kompreneble la lokaj grupoj ankaŭ foje havas siajn proprajn pagarojn en la reto.

Kompreneble apud tio ekzistas la kutimaj agadoj: eldonado de revuo, aranĝado de nacia kongreso ĉiujara.



La papera revuo perdadas sian kapablon gvidi la movadon per ĝustatempaj informoj, alivorte informi en la ĝusta tempo pri aferoj por fari aŭ por aĉeti. Espereble la reta bulteno, kiu nun estas sendata senpage al pluraj miloj de abonantoj (multaj retaj ekskursanoj) iam povos transpereni ĝian lokon.

La nacia kongreso ankaŭ estas en periodo de ŝanĝiĝo. Ĝi akiras unuflanke la funkcion de lernejo por komencantoj kaj por progresantoj, kaj aliflanke transformiĝas al speco de kultura festivalo, kun eksterlandaj prezentantoj.

Ĉar en la itala socio entuziasmoj pri Eŭropo abundas, estas relative normale uzi en la informado la ideojn pri lingva justeco en Eŭropo.

Se EEU havus iniciatojn en la Parlamento en Bruselo, ni certe povus provi mobilizi niajn eŭropajn parlamentanojn. Se EEU disendus tekstojn por disvastigi, ni certe povus traduki ilin al la itala kaj puŝi ilin al la publiko.

## Ha 100 anni ma non è mai stata così giovane la lingua internazionale esperanto



Firenze, Palazzo Vecchio  
Sala dei Duecento  
sabato 20 marzo 2010  
ore 9-14 - ingresso libero  
annullo filatelico



### Convegno per il Centenario della Federazione Esperantista Italiana

100 anni  
di esperanto in Italia  
per relazioni  
tra i popoli  
più giuste  
e più pacifiche

Mi volas provi resumi per unu lasta frazo nian situacion: Ni restas stabilaj (aŭ pli precize: malrapide malsupreinrantaj) kiam temas pri kotizantaj membroj, sed la agado restas je bona nivelo kaj la emo agadi estas grandeta inter la aktrivuloj. Bonŝance pro la lastatempa granda enmigrado ni ankaŭ ricevas aktivulojn el orienteŭropaj landoj, kiujn ni provas tuj integri en la asocion.

Se EEU petas ion, ni pretas fari. Nia ideo estas, ke oni devus diri al EU, ke italoj komencas laci esti duarangaj civitanoj en ĉi tiu tut-usona Eŭropo, kaj ke oni devus proponi Esperanton kiel justan solvon malgraŭ tio, ke oni ne akceptus la proponon.

*Renato Corsetti,  
prezidanto de IEF*



## Kroata Esperanto-movado

Kroata Esperanto-Ligo havas longan tradicion. Ĝi fondiĝis en 1908, kun la sidejo en Zagrebo, kvankam unuaj esperantistoj en Kroatio agis jam en 1891 en Osijek. Ekde la komenco en ĝi aktivis kapablaj intelektuloj tiel ke el Kroatio devenas ankaŭ tre internacie gravaj esperantistoj inter kiuj sendube la plej famaj kaj gravaj estas Ivo Lapenna, Nikola Rašić. Krešo Barković kaj Tibor Sekelj. Pro tio baldaŭ en la movado ekestis ankaŭ profesia agado kaj forta agado sur kultura kampo. Unua profesia teatra ensemblo devenas el Zagrebo (Internacia Arta Teatro, kiun gvidis Sr an Flego en sesdekaj jaroj) de kie la torĉon plu portis profesia aktoro Mladen Šerment kiu kunfondis kaj longe gvidis Draman grupon de Studenta E-klubo en Zagrebo kaj li ankaŭ varbis al Esperanto Vida Jerman kiu dominis en E-teatro dum lastaj dudek jaroj. Ankaŭ laste tre aktiva profesia aktoro el Serbio, Saša Pilipović esperantistiĝis en Studenta E-klubo en Zagrebo samkiel fama internacia esperantisto Tibor Sekelj, kiu havis fortan influon al la kroata E-movado en periodo inter 1065 kaj 1988. Li iniciata fondiĝis en Zagrebo Internacia Kultura Servo kaj Pupteatra Internacia festivalo.



Dum 25 jaroj ekde 1968 en Zagrebo okazadis Pupteatra Internacia Festivalo ene de kiu prezentigis pli ol 150 teatraĵoj en Esperanto plenumitaj de profesiaj pupteatroj el plurdeko da landoj. Dum PIFoj Kroata televido filmis dudekon da pupteatraj spektakloj en Esperanto kaj kun subtitoloj elsendis ĝin en la tiam tutjugoslavia televida reto. PIFojn organizis profesia E-entrepreno Internacia Kultura Servo en Zagrebo (ekde 1972) kiu organizis ankaŭ multajn kulturajn kaj eldonajn aranĝojn (eldonis dum dudek

jaroj pli ol 50 E-librojn, retradukajn projektojn, seminariojn, kulturajn semajnojn, kiu evoluigis la Zagrebmetodan lernolibron kaj en kiu interalie laboris poste fama E-verkistino Spomenka Štimec. La entreprenon fondis kaj direktoris dum dudek jaroj Zlatko Tišljar. La plej grava atingo estis evoluigo de la Zagrebmetoda lernolibro por komencantoj kiu dum 30 jaroj aperis en 40 adaptoj diverslingvaj kaj estas uzata sur ĉiuj kontinentoj. Internacia Kultura Servo en 1990 havis 10 profesiajn laboristojn. Post ŝanĝo de la direktoro en la milita 1992-a jaro ĝi ne plu agadis kiel por- kaj peresperanta entrepreno kaj ankaŭ PIF, kiu ekzistas ankoraŭ nuntempe ne plu uzis Esperanton.



Malgraŭ la historie malkonvena pozicio de Kroatio en kiu furiozis en la 20-a jarcento tri militegoj, la movado ĉiam denove fenikse reaperis en riĉe floranta formo. Nun en Kroatio plu funkcias Kroata E-Ligo kun dek kvin societoj kaj 450 pagantaj membroj, kvankam oni povas taksi ke en Kroatio vivas kelkdek mil homoj kiuj almenaŭ iomete aktivis en la movado. Por ilustrati tion necesas nur diri ke inter 1950 kaj 1990 eldoniĝis pluraj lernolibroj: Unue famis la lernolibro de Ivo Lapenna aperigita je du eldonoj, poste de Dušan Maruzzi eldonita je 8 eldonoj kaj fine la Zagreba Metodo eldonita je 9 eldonoj (tiu ĉi lasta je pli ol 40.000 ekzempleroj – ĉiuj forvenditaj). KEL havis daŭre almenaŭ unu profesion sekretariojn. Esperantistoj en Kroatio posedas du gravajn ejojn: Unu posedas

Esperanto-societo en Rijeka (vilaon ĉe la Adriatiko proksime al Rijeka) kaj unu ejon posedas KEL mem en Zagrebo.

En Kroatio ĉiam okazadis multaj internaciaj aranĝoj (inter ili 2 UKoj – ambaŭ en Zagrebo en 1953 kaj 2001 kaj 2 TEJO-kongresoj – En Zagrebo 1988 kaj en Rijeka 1998), sed ankaŭ lokaj kongresoj. De post kiam Kroatio estas memstara lando okazis ĝis 2012 10 landaj kongresoj. La junulara E-movado estas centra valoro de kroata movado. En Zagrebo ekzistas Studenta E-klubo nun kontinue aganta jam pli ol 50 jarojn kiu estis bazo por posta fondo de Kroata E-Junulara Asocio (KEJA) en 1972. KEJA organizis la du TEJO-kongresojn en Zagrebo kaj Rijeka (speciale interesa estas la fakto ke dum tiuj du kongresoj funkciis aparta televida teamo kiu filmis eventojn dum la kongresoj kaj ĉiutage prezentis grandekrane vespere tagĵuralojn pri la kongreso en daŭro de po duona horo. Tio estis unikaj programoj neniam antaŭe kaj poste viditaj en aliaj E-aranĝoj. La animo de tiu TV-filma agado estis Krunoslav Tišljar – profesia filmisto ĉe Zagreba Televido). KEJA organizis ankaŭ junularan internacian aranĝon MIRO, kiu okazis jam pli ol 10 fojojn. KEL organizas ankaŭ ĉiujaran renkontiĝon de E-verkistoj en nordkroata vilaĝo Hraščina. En Kroatio ekzistas ankaŭ fervojista E-



Asocio kaj Blindula Kroatia E-Ligo same kun longa tradicio kaj organizado de internaciaj kongresoj kaj agadoj. Specifa agado de kroata movado estas dediĉita al kulturo: Krom la teatroj aparte gravas eldona agado kaj dum lastaj kelkaj jardekoj retraduka agado. Tiel aperis ekz. pluraj kroataj literaturaj verkoj en aro da lingvoj foraj per la esperanta traduko. Lasta el la sukcesoj tiukampaj estas projekto financita de Eŭropa Unio kadre de kiu kroata, slovena kaj itala literaturo estis pere de E retradukitaj al la bengala lingvo, kaj unu bengala libro estis tiel tradukita al la tri eŭropaj lingvoj. Romano de kroata porinfana verkistino Ivana Brlić-Mažuranić »Aventuroj de metilernanto Hlapiĉ« estis per la E-a traduko retradukita interalie al ses plej grandaj aziaj lingvoj (ĉina, bengala, korea, japana, irana, vjetnama) kaj tiel ĝi akiris legantaron en spaco kun 2 miliardoj la loĝantoj. Tian sukceson ĝis nun havis neniu kroata verko.



Kroatia movado ĉiam havis diversajn revuojn. Komence Kroatan esperantiston, poste Konkordon, tiam la jugoslavia E-revuo La Suda Stelo estis redaktata ankaŭ en Kroatia kaj ekde 1980 ĝis nun regule aperas TEMPO – revuo de KEL. Aperas intertempe

sporade aro da diversaj lokaj revuoj kaj revuetoj inter kiuj la plej luksa nuntempe estas Zagreba esperantisto. Kompreneble ĝi havas ankaŭ abundan informadon en sia retpaĝaro [www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr) kiun kreis kaj kompletigadas Davor Klobučar kie interalie videblas kompleta historio de kroata movado kun multaj fotoj.

Tre grava, kaj verŝajne unu el la plej sukcesaj el ĉiuj E-movadoj, estas la informa agado de KEL al ekstera publiko. En Kroatio regule de post kiam ekzistas radio kaj televido tiuj medioj abunde raportis pri E, ĉefe pro tio ke ekzistis multaj ne nur esperantistaj aferoj kiujn organizis esperantistoj kaj ankaŭ profesiaj esperantistoj kiuj kapablis lanĉi kaj prezenti la movadon publike. Rezulte de tio oni povas aserti ke preskaŭ ne ekzistas kroata civitano kiu neniam aŭdis pri Esperanto. Kiel ekzemplon mi nomu nur du eventojn: en 1987 za Zagreba Televido preparis elsendon du-horan kadre de tre populara kvizo kiu estis komplete dediĉita al Esperanto kaj kiun spektis kelkmilionoj da jugoslavaj spektantoj. Okaze de IJK Zagreb 1988 tri radio stacioj elsendis dum la tuta kongresa semajno ĉiutagajn radio-programojn. Unu en Esperanto kaj du en la kroata. Pro tio ankaŭ diversaj neesperantistaj institucioj uzis aŭ reklamis E-on. Lastatempa grava sukceso estas ke la Zagreba Turisma Asocio uzas en sia regula elektronika paĝaro ankaŭ E-on kaj eldonas multajn materialojn en E kaj pri E- en Zagrebo (<http://www.zagreb-touristinfo.hr/>).



En Filozofia Fakultato de Zagrebo kadre de Germanistiko prof. Velimir Piškorec enkondukis studobjekton pri interlingvistiko, kaj ene de ĝi la studentoj povas lerni E-on. En Tutnacia Biblioteko ekzistas sekcio pri Esperanto (postlasaĵo de grava kroata esperantisto Marinko Gjiŝvoje). Verŝajne pro la sama kaŭzo ankaŭ sufiĉe multaj gravaj

politikistoj simpatiis aŭ eĉ lernis E-on. Interalie por la movado gravis siatempe subteno de Tito, Jugoslavia prezidanto, subteno de Nikola Ŝegota, iama vicprezidinto de Kroatia Parlamento kaj Stjepan Mesić eksa ŝtatprezidanto de Kroatio.

Ankaŭ multaj sciencistoj en Kroatio estas esperantistoj. Oni devas menciigi interalie prof. Dalibor Brozović kiu dum 15 jaroj estis prezidanto de KEL kaj kiu estas grava kroatia lingvisto kaj slavisto. Li verkis ankaŭ kelkajn sciencajn verkojn en Esperanto.

La nuna prezidantino de KEL estas: Judita Rey Hundeček kaj sekretariino Spomenka Ŝtimec.

Konklude oni povas diri ke kroataj esperantistoj povis kontinue agadi dum la tuta dudeka jarcento malgraŭ la tri militoj. La nura periodo kiam ilia agado estis malpermesita estis la tempo de la dua mondmilito kiam regis profaŝisma reĝimo.

Pri la historio de la kroata Movado ekzistas ampleksa reta priskribo ĉe: <http://www.esperanto.hr/galerio.htm>

*Zlatko Tišljar*



## Esperanto-movado en Latvio

Esperanto-movado en Latvio komenciĝis en 1889, kiam estis eldonita la unua Esperanto-lernolibro por latvoj, ĝin verkis Rudolfs Libeks (1854-1908). Lernolibro de Libeks estis la 29-a Esperanto libro laŭvice kaj la unua eldonita ekster Varsovio. Informon pri ebleco lerni lingvon li publikigas en loka gazetaro jam meze de 1888 ("Baltlanda Heroldo" 14-15an de junio 1888). En 1890 Libeks translokiĝis al Brazilo kaj mankas informoj, ĉu li tie okupiĝis pri Esperanto, kvankam li estis la unua esperantisto en tiu lando.

En 1904 en Rigo estis fondita filio de [Peterburga](#) Esperanto-societo „Espero", en 1910 Esperanto-societo „Riga Stelo", kiu en 1910 kaj 1911 eldonis samnoman monatan gazeton en Riga Esperanto-societo. En dudekaj kaj tridekaj jaroj de la pasinta jarcento movado eĉ pli vigliĝis, kursoj okazis en Rigo, Liepāja, Jelgava, Ventspils kaj aliaj lokoj, fondiĝis Esperanto-societoj, oni eldonis lernolibrojn kaj vortarojn.



En 1925 Riga Esperanto-societo komencis eldoni monatan revuon "Ondo de Daŭgava" (1925-1935), en 1927 organizis la unuan Latvian Esperanto-Kongreson. Post ŝanĝo de statuto en 1928 Riga Esperanto-societo iĝis Latva Esperanto-societo kaj la ĉefa Esperanto-organizaĵo en Latvio. En 1930 en Rigo okazis la 1-a Baltlanda Esperanto-kongreso.

Oni organizis multajn kursojn kaj invitis ilin gvidi ankaŭ eksterlandajn instruistojn, inter ili estis ankaŭ Andreo Cseh kaj Julio Baghy.

En 1941 lige kun la sovetia okupacio Esperanto-movado en Latvio estis malpermesita, Latva Esperanto-Societo likvidita.

Renoviĝo de la movado post la 2-a Mondmilito komenciĝis nur en la jaro 1956. En gazetaro aperis artikoloj pri lingvaj problemoj, estis organizitaj prelegoj kaj lecionoj. En 1957 revuo "Zvaigzne" ("Stelo") publikigis korespondajn lecionojn de konata latva esperantisto Eduards Jaunvalks (1901-1989), samjare estis eldonita Esperanto-Latva kaj Latva-Esperanta vortaro kun gramatiko. Kursojn samtempe frekventis pli ol 900 interesitoj, en 1960 fondiĝis Riga Esperanto-klubo ĉe Domo de Klerigo, rondeto ĉe Latva Ŝtata universitato, esperantistoj havis klubojn en Cēsis, Daugavpils, Ventspils kaj Liepāja.

En 1959 en Latvio apud Riga ĉe lago Baltezers okazis Baltia Esperanto-Tendaro, kiun partoprenis 50 gejunuloj el Latvio, Litovio kaj Estonio. Tio iĝis tradicio - organizi laŭvice en unu el Baltiaj ŝtatoj Esperanto-aranĝon, kiu nun nomiĝas Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET), ĝin partoprenas mezume 100 ĝis 200 esperantistoj el 10-20 landoj.

En 1980 estis fondita Latva filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, kiu ekzistis ĝis la jaro 1988.

La nunan Latvian Esperanto-Asociacion (LatEA) oni fondis la 11an de decembro 1988, ekde 1989 ĝi estas membro de UEA, ekde 2006 membro de EEU. Nuntempe en la asocio membriĝas proksimume 100 esperantistoj el Rigo, Liepāja, Cēsis, Jelgava, Valmiera kaj aliaj lokoj de Latvio.



Estraro de LatEA konsistas el 7 personoj, kiujn oni elektas por 3 jaroj. Ekde 2007 prezidantino estas Margarita Želve, vicprezidantino - Biruta Rozenfelde, esperantistino de 1956, organizantino de la unua BET en 1959.

Unufoje dum 3 jaroj asocio organizas Baltiajn Esperanto-tagojn. Ĉi-jare en Latvia vilaĝo Mālpils, situanta 60 kilometrojn sudorienten de Riga inter la 9-a kaj la 16-a de

julio 2011 okazis jam la 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. BET-ejo funkciis en la Profesia mezlernejo de Mālpils, kiu entute gastigis 116 partoprenantojn el 14 landoj. Programo de BET iom similas al tiu de UK - estas organizitaj diversnivelaĵaj Esperanto-kursoj (ankaŭ por neesperantistoj), enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, okazas Sankta Meso en Esperanto (ĝin jam la duan fojon brile gvidis katolika pastro – esperantisto Māris Laureckis). Oni havas riĉan programon – Interkonan vesperon, Solenan malfermon, akcepton en urbodomo, diversajn koncertojn, ludojn, tuttagan kaj duontagajn ekskursojn, Adiaŭan vesperon k.a.

Precipe popularaj estas kantvesperoj kaj koncertoj de profesia kantistino Austra Pumpure el urbo Liepāja kaj ŝia ensemblo "Animo" – grupo de gejunuloj al kiuj Austra instruas Esperanton per kantoj. Al ŝiaj koncertoj dum BET-oj kutime venas ankaŭ loka publiko, ĉar Austra estas ege populara en Latvio. Ankaŭ dum siaj koncertoj al ĝenerala publiko Austra Pumpure ofte mencias Esperanton per kio ŝi trovis amikojn en tuta mondo kaj eĉ kantas unu kanton en internacia lingvo.

De 2008 Latvia Esperanto-Asocio kunlaboras kun la Ŝtata Agentejo pri Lingvoj – okaze de Eŭropa Tago de Lingvoj. La agentejo organizas lingvajn metiejojn kun slogano "Ekkonu lingvojn" dum kiuj interesitoj havas eblecon konatiĝi kun diversaj lingvoj. Esperanto-metiejon kutime vizitas 10-15 partoprenantoj (precipe gelernantoj). La metiejo daŭras du akademiajn horojn, dum kiuj gelernantoj ricevas bazan informon pri lingvo, partoprenas amuzan kurseton de Esperanto laŭ Cseh-metodo, aŭskultas latvajn popolajn kantojn en internacia lingvo. Poste dum komuna kunveno de ĉiuj metiejoj (kutime estas reprezentataj 15-17 lingvoj) oni mllonge raportas pri la farita laboro kaj gratulas la plej aktivajn lernantojn.

En Rigo ĉe Riga Latva societo jam 8 jarojn funkcias Esperanto-klubo gvidata de Biruta Rozenfelde. Parto de Rigaj esperantistoj estas anoj de Riga Latva societo kaj dank' al tio senpage ekhavis ejon por klubkunvenoj okazantaj ĉiun duan kaj kvaran mardon de la monato, krom someraj monatoj. Oni havas programon kompilitan por la tuta laborsezono, al kiu laŭvice kontribuas preskaŭ ĉiuj klubanoj.

Dum ĝeneralaj kunvenoj de Riga Latva societo oni raportas ankaŭ pri laboro de Esperanto-klubo kaj tiu raporto estas publikigita en la ĉiujara bulteno de la societo.

Ĝeneralaj kunvenoj de Latvia Esperanto-asocio ankaŭ okazas en la domo



de Riga Latva societo kaj ĉiu interesito povas ilin viziti kaj konatiĝi kun Esperanto-ekspozicio.

En Latvia Universitato en 2006 estis registrita kiel liberelekta studokurso "Enkonduko en praktikan interlingvistikon, Esperanto". Ĝin surbaze de lernolibro de Laurynas Algimantas Skūpas kompilis lektoro de la Universitato Aivars Kalniņš kaj profesoroj Andrejs Bankavs kaj Leons Taivans. Post la duonjara parte perkomputila, parte dialoga lernado studentoj devas plenumi ekzamenon laŭ skemo de Miĉigano – percepto aŭda, traduko skriba, prezento parola kaj sriba. Kvankam ĝis nun la intereso de studentoj de Latvia Universitato pri la nova studokurso estis ne tro granda, la fakto mem, ke oni povas oficiale lerni Esperanton en la plej granda altlernejo de Latvio, estas grava atingo de latvaj esperantistoj.

Ne tro ofte sed tamen de tempo al tempo aperas informoj pri Esperanto en amaskomunikiloj, plej multe antaŭ kaj dum BET-oj. Por reklami BET LatĒA sendas artikolojn al diversaj interretaj portaloj, la aranĝo atingas eĥon ankaŭ en radio kaj gazetaro.

En 2005 omaĝe al la 140-a datreveno de elstara latva poeto Jānis Rainis (1865 –1929) estis eldonita poemaro "Antaŭen". Ĝin kompilis kaj komputile kunmetis Margarita Želve, ilustris esperantistino Alise Mediņa. La libro enhavas 11 originalajn grafikaĵojn de la juna kaj talenta pentristino.

En 2009 folkloro grupo "Muzikistoj de Maskaĉka" eldonis duoblan KD de 33 latvaj popolaj dancoj. Ĝi enhavas 80-paĝan libreton kun detalaj priskriboj de dancaj paŝoj en latva kaj Esperanto laŭ kiuj ĉiu povas lerni la dancojn.

En 2010 estis kreita nova hejmpaĝo [www.esperanto.lv](http://www.esperanto.lv), kie dume oni povas trovi informojn nur en Esperanto, sed la paĝo estos evoluigita kaj baldaŭ aperos ankaŭ en latva lingvo.

Dume pro diversaj kaŭzoj ne plu aperas informbulteno "Latvia esperantisto", la membraro ricevas la bezonatajn informojn rete, sed la asocio planas renovigi ĝin en 2012.

La plej aktivaj latvaj esperantistoj regule partoprenas la kongresojn de UEA kaj EEU, ankaŭ diversajn malpli grandskalajn aranĝojn – IF (Internacia Festivalo), kongresojn de IFEF, ILEI k.a., sed plej amase– Baltiajn Esperanto-Tagojn.

*Margarita Želve, prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio*



## Esperanto en Litovio

Semo de Esperanto ĵetita en la jaro 1887 trafis ankaŭ en Litovan teron. Ideo de la internacia lingvo travivis ondojn, malflusojn, ankaŭ persekutojn.

La unua litova esperantisto estis Aleksandras Dambrauskas (iam Dombrovski), en Zamenhofs Adresaro li estis 186-a. En la jaro 1890 A. Dambrauskas mem verkis kaj eldonis la unuan E-lernolibron por litovoj. Tiutempe en Litovio carisma reĝimo estis malpermesinta presi librojn en la litova lingvo, do la lernolibro estis eldonita en eksterlando. Baldaŭ en grandaj urboj Vilno kaj Kaŭno fondiĝis E-societoj, estis eldonataj E-libroj kaj gazeto „Kovno -Esperanto”. Sed en tiuj societoj estis malmultaj litovoj, dominis rusoj, poloj, hebreoj.



Post la Unua Mondmilito en la jaro 1918 litovoj rekreis sendependan ŝtatan kaj jam en 1919 estis fondita Litova Esperanto-Asocio. En la jaro 1922 aperis monata E-gazeto „Litova Stelo”.

Iniciatinto de la movado kaj ĝia gvidanto estis la sama A. Dambrauskas. En multaj lokoj fondiĝis grupetoj da esperantistoj. Sed en la jaro 1926 la situacio ŝanĝiĝis, estingiĝis „Litova Stelo”, malfluso daŭris 8 jarojn. Nova ondo leviĝis en 1935, la stirilon de la movado prenis novaj aktivuloj B. Giedra, V. Butkus, P. Lapienė kaj aliaj. En 1938 Litovio festis 20-jaran jubileon de sendependa vivo. Estis eldonita speciala numero de „Litova Stelo”, kiu prezentis historian skizon de Litovio, priskribis progreson kaj sukcesojn de la lando dum 20 jaroj de sendependa vivo. La artikolo „Esperanto dum 20 jaroj en Litovujo” raportis pri esperantista agado kaj menciis, ke en la tuta lando troviĝas 880

esperantistoj en 76 lokoj.

Tamen en la jaro 1940 Litovio estis okupita kaj aneksita, ĝi fariĝis parto de Sovetunio, kie E-movado estis malpermesita kaj persekutata. La movado kolapsis, ĉio estis detruita kaj devis pasi 16 jaroj ĝis la momento kiam ĝi povis renoviĝi. Nur en la jaro 1956 la vorto

Esperanto ĉesis esti tabua en Sovetio. Estis permesite ĉe sindikatoj organizi Esperanto-klubojn, instrui kaj lerni la lingvon. Ankaŭ en Litovio fondiĝis kluboj en Vilnius, Kaunas, Klaipėda, Šiauliai, Panevėžys kaj aliloke. Ekaktivis malnovaj esperantistoj A.

Poška, J. Petrulis, A. Vaitilavičius, A. Vebeliūnaskaj aliaj. Oni sukcesis eldoni lernolibron, vortaron, kelkajn librojn.



En 1959 studentoj el Latvio, Litovio kaj Estonio organizis la unuan tendaron apud lago Baltezers (Latvio) kaj decidis, ke tiu kunvenado de esperantistoj (BET) okazu ĉiujare laŭvice en tiuj tri landoj. La tradicio vivas ĝis nun kaj pasintjare okazis jam BET-47 en Latvio. Ĉar Sovetiaj esperantistoj ne havis eblecon veturi eksterlanden kaj partopreni en UKoj, tiuj BEToj fariĝis kvazaŭ minikongresoj. En ili kolektiĝadis ĝis 400 kaj eĉ pli da esperantistoj el tuta Sovetio. Ankaŭ la programo estis simila: diversnivelaĵ E-kursoj, Somera Universitato, amuzaj vesperoj, ekskursataĝo.

Nova periodo komenciĝis en la jaro 1988, kiam litovaj esperantistoj decidis refondi Litovan Esperanto-Asocion (dum lastaj jaroj de ekzistado de Sovetunio tio jam estis ebla). Ĝi baldaŭ aliĝis al UEA. Prezidanto de la refondita Asocio estis elektita Povilas Jegorovas, kiu gvidas ĝin ĝis nun. Pli vastaj horizontoj por esperantista agado en Litovio malfermiĝis post rekonekto de sendependa Litova ŝtato en 1990. La Asocio ricevis propran domon sur strato Zamenhof en Kaunas. En 1991 renoviĝis eldonado de prestiĝa E-revuo „Litova Stelo“. Ĉiujare en Kaunas estas organizataj tradiciaj Zamenhofaj Tagoj. Okazadis senpagaj E-kursoj, kiujn gvidis E-instruistoj A. Andrade Alves, M. Bacev, Š. Špiguth, A. Zahariaš, T. Steele, E. Bondar.

Ekde la jaro 1991 litovaj esperantistoj partoprenas jam en ĉiuj Universalaj Kongresoj de Esperanto, vizitas siajn amikojn en eksterlando. En Litovio okazis 65a SAT kongreso, 57a kongreso de IKUE. P. Jegorovas sukcesis ricevi ŝtatan subvencion kaj tio ebligis organizi kelkajn imponajn projektojn, el kiuj sendube elstaras la 90a Universala

Kongreso de Esperanto en 2005 kaj Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en 2008. Krome estis eldonitaj multaj libroj en / pri Esperanto kaj L. Zamenhof.



Tamen la ekonomia krizo, skuinta la mondon, ne preteriris ankaŭ Litovion. Malgraŭ ĝi okazas ĉiuj tradiciaj aranĝoj, sed pli modeste, kun malpli da partoprenantoj. La Asocio perdis ejon en Vilnius, ankaŭ Esperanto-domo en Kaunas bezonas riparadon. Post 20-jara brilo sur Esperanta firmamento ĉesis lumi „Litova Stelo”. Tamen pri pli interesaj kaj aktualaj eventoj en Litovio, ankaŭ pri Esperanto-temoj oni povas legi en interreto kolore ilustritan blogon BARELO, kiun preparas A. Grincevičius (adreso: <http://barelo.blogspot.com/>). Juna poligloto G. Degėsys gvidas E-kurson en Vilna universitato. Do oni povas esperi, ke la nuna malfluso estas provizora, post ĝi sekvos nova ondo. „Ideoj, se grandaj, ne mortas kiel homoj” – diris litova poeto Maironis. Petras Čeliasukas, iama redaktoro de Litova Stelo.

*Petras Čeliasukas*



## Esperanto en Luksemburgio

Pri la frua historio de Esperanto en Luksemburgio ni scias nur, ke en 30-aj jaroj la germano Wilhelm Solzbacher (kiu poste aktivis dum jardekoj en Usono) estis delegito en urbo Luksemburgo. Tio estas kampo ankoraŭ priesplorinda. Dum multaj jaroj Ido estis certe pli konata en Luksemburgio ol Esperanto pro la laboro de la instruisto Henri Meier (1888-1973) el Esch-sur-Alzette, kiu organizis internacian Ido-kongreson en Luksemburgo en 1924.



La nunan asocion, "Luksemburga Esperanto-Asocio", koncize LEA, fondis malgranda grupo de idealistoj la 26an de novembro 1971 je la horo 20:30. Post tiu fondiĝo jam en 1972 unu el la grupanoj, s-ro Emile Pleim, kuraĝis gvidi kurson al 15 junaj geintereso-uloj. El tiu kurso pluraj personoj engaĝiĝis movade kaj baldaŭ LEA konsistis el deko da aktivuloj kaj 120 honoraj membroj. Jen la unua komitato: Marcel Ries - prezidanto, Robert Hoegener – vizprezidanto, Emile Pleim – sekretario, Beby Hopp – kasistino, Raymond Huberty kaj la idisto Henri Meier – membroj. En 1972 Marcel Ries tre verve reprezentis la novan luksemburgan movadon ĉe fervojista kongreso en Clervaux. Jam jaron poste en 1973 LEA okazigis "Eŭropan kongreson" kun pli ol 500 partoprenantoj el 20 landoj. En la preĝejo de Bonnevoie estis celebrita tiumomente la unua Esperanto-geedziĝo en nia lando. Sekvis du jarojn poste unua junulara aranĝo en la tiama "Maison de l'Europe" en Pfaffental helpe de Hans-Dieter Platz el Germanio. Dum la sekvantaj

jaroj la asocia kaj esperantista vivo rapide evoluis kaj en 1977 Albert Wickler - dua prezidanto de LEA - organizis ILEI-konferencon en Kirchberg. Tiutempe ankaŭ pastro Hansjörg Kindler kun granda entuziasmo membriĝis al la luksemburga grupo kaj de tiam tre forte influis la asocian vivon. Menciindas kelkaj gravaj eventoj: 38-a IKUE kongreso en 1979, regulaj kursoj, bela poŝta stampo ESPERANTO, semajna rubriko en la plej grava gazeto 'Luxemburger Wort', Esperanto-Centro ĉe 'Place des Bains', luksemburga stando ĉe la UK en Ateno, prospekto pri Luksemburgio 'La verda koro de Eŭropo', Eŭropa Kalendaro, organizado de Esperanto-kursoj en la somera artlernejo 'Summerakademie' kaj kaj kaj...



En la jaro 1980 Brian Moon elektiĝis prezidanto de LEA, kaj ĝis la hodiaŭa tago li gvidas la asocion. Aranĝoj kiel partopreno en 'Fête des Langues', diversaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj, ĉiumarda kunveno kaj ĉiumonata prelego kun diversaj temoj karakterizas la nunan programon de la asocio. Dank al kara forpasinta membro Ger Schlechter (mem regule radio-aktiva dum longa tempo ĉe RTL) LEA disponas pri ege taŭga kunvenejo en kvartalo Limpertsberg en la ĉefurbo Luksemburgo. La asocio momente havas ĉ. 20 aktivajn membrojn kaj ĉ. 80 pli malpli aktivajn. Dum pli ol 40 jaroj de ekzisto de la asocio almenaŭ 360 personoj eklernis la internacian lingvon.

Ĉefa menciinda afero de lastaj jaroj estas la aperigo en 2009 de luksemburglingva versio de la kurslibro 'Esperanto per rekta metodo' de Stano Marček. Tio estis absolute

la unua fojo, kiam eldoniĝis libro, per kiu eblas lerni alian lingvon sur bazo de la luksemburga, kaj tiun unufojecon ni klopodis ekspluati. Intertempe aperis aliaj luksemburglingvaj materialoj por lerneja lernado de la franca, sed nia lernolibro pri Esperanto restas iel unika. Tamen necesas agnoski la problemon, ke pro la demografia dinamiko de lastaj jardekoj, kun konstante abunda enmigrado, granda parto de nia publiko ne estas vere luksemburglingva.

Rilate al tiu konstanta enmigrado, kiu forte karakterizas la socian evoluon en Luksemburgio dum lastaj jaroj, necesas menciigi ankaŭ la fenomenon de almigrado de esperantistoj. Diversaj institucioj de Eŭropa Unio havas sian sidejon aŭ sian filion en Luksemburgo, kaj montriĝis, ke inter la oficistoj de EU troviĝas jen kaj jen esperantisto – plej ofte, sed ne nur, en la tradukservoj. Tiel ekzistas eta paralela Esperantujo kun rondo de EU-oficistoj, kiuj regule sed neformale renkontiĝas, tamen ne same regule kontribuas al la vivo de la loka asocio.

Nia ĉefa problemoj estas gardi la homojn por aktive partopreni aŭ aktive subteni nian movadon. Junaj homoj raras pli kaj pli. La lingva situacio en Luksemburgio estas tre speciala: la lando estas unike trilingva, kio povus konduki al bona konscio pri la avantaĝoj de multlingveco kaj respekto de lingvaj rajtoj, sed en praktiko rezultas, ke homoj facilanime akceptas la superregan aldonon de plia lingvo, la angla.

*Brian Moon & Albert Wickler*





# Malta Esperanto-societo 50-jaraĝa

(fondita en 1961)

Antaŭ ol priparoli la modernan Esperanto-Societon en Malto, oni ne devas forgesi la antaŭan Esperanto-movadon en Malto, kiu komenciĝis ĝuste je la komenco de la antaŭa jarcento.

La origino de tiu movado situas en la ununura poemeto de la poeto Dun Karm (1871-1961), la plej granda malta poeto inter la romantikuloj, kaj kiu, bedaŭrinde kaj samtempe mirige, ne partoprenis en la nova loka movado. Lia kvin-strofa poemeto titoliĝas ‘Penso Printempa’ verkita en aprilo 1901. Do kvankam la poemeto iĝas la unua atesto de la frua ĉeesto de Esperanto en Malto, ĝi tamen restas izolita manifestacieto antaŭ la historio-panoramo de la nova lingvo en Malto.



Sed la vera movado en Malto naskiĝis en 1903 pere de la korifeoj: D-ro Gustav Busuttil, kuracisto, apotekisto Arkanĝelo Agius kaj notario Agostino Levanzin. Laŭ Levanzin, D-ro Busuttil estis la pioniro de la loka movado. En tiel eta insulo, la korifeoj sukcesis starigi plurajn societojn. Levanzin fondis la ‘Federacion ‘Malta Stelo’’. Posttiom da laboro, laŭ la statistiko de Dietterle, en 1927 troviĝis en Malto nur sep izolitaj esperantistoj. Post tio, vakuo.

Estis nur la 26an de decembro 1961 kiam la subskribanto kun aliaj fondis la modernan societon en Malto. En la unua renkontiĝo troviĝis, krom la subskribanto, s-roj: John Vella Bondin, Anthony Mercieca kaj tri aliaj, kiuj lasis la novbakitan grupon post kelkaj semajnoj. Efektive dum la jaroj multaj membriĝis sed ankaŭ multaj ekzistiĝis, sed la tri supre menciitaj korifeoj, kaj nur ili, restis lojalaj ĝis hodiaŭ.

Unue la societo nomiĝis ‘Societo de Maltaj Esperantistoj’, poste ‘Malta Esperanto-Societo’. Oni tuj komencis disvastigi Esperanton per artikoloj en la maltaj gazetoj. Kiam eksterlandaj esperantistoj vizitis Malton kaj kontaktis nin, mi intervjuis ilin ĉe la publika radio, tiel disvastigante la movadon. Oni okazigis kursojn al kiuj partoprenis pluraj studentoj. Tamen bedaŭrinde post la kursoj ili foriris kaj neniam revenis, sed pluraj restis amikaj membroj de la societo kvankam ne ĉiam diligentaj .

En 1966 aperis la unua numero de ‘Esperanto – Bulteno de la Malta Esperanto-Societo’. La nomo de ĉi tiu bulteno poste ŝanĝiĝis al ‘Malta Esperantisto’, poste ankoraŭ kaj ĝis hodiaŭ ‘Mezmara Stelo’ aperigata laŭbezone.

Pluraj eminentaj esperantistoj vizitis nin. Mi menciu nur kelkajn: S-ro Norman Williams, angla lernejestro, la ĉiekonata s-ro Tibor Sekelj, Monsinjoro Episkopo Vlĉ kaj aliaj.

Por la kursoj oni uzas tiun Zagreban, tradukitan en la maltan de la subskribanto.

En 1978 la Komisiono por la strat-nomoj akceptis nian peton nomi du stratojn ‘Strato Zamenhof’ kaj ‘Strato Esperanto’, ambaŭ situantaj apud la malta universitato. La saman jaron dum la 63-a universala kongreso de Esperanto en Varna, Bulgario, nia societo estis akceptita kiel aliĝinta membro de UEA.

En 1980 ni organizis ĉi tie la 14an internacian konferencon de ILEI. Okaze de la jubileo de E-o, la malta poŝtofiĉejo eldonis porokazan poŝtmarkon. Aliaj porokazaj poŝtstampoj estis eldonitaj de la sama poŝtofiĉejo.

En 1990 estis inaŭgurita en la jaĥtejo de Msida monumento al Zamenhof inaŭgurita de la malta Prezidento, d-ro Ĉensu Tabone, ankaŭ li oftalmologo.

Ni ŝanĝis renkontiĝejon diversajn fojojn. Antaŭ kelkaj jaroj ni fine subluis etan dome-ton kun du ĉambretoj. Sed bedaŭrinde lastjare ni devis ĉesigi la luadon pro la altaj prezoj de akvo kaj elektro, kiujn ni preskaŭ ne uzis. Do nun ni kontentiĝas renkontiĝi en kafejo en la ĉefurbo, samkiel ni kutimis fari je la komenco de la societo.

Antaŭ kelkaj jaroj ni klopodis okazigi kursojn sed neniu reagis. Ni scias, ke diversaj studentoj studas la ligvon aparte sed neniu volas membriĝi. Eble kulpas la komputiloj? Tamen la komitato, konsistanta el ses personoj, daŭrigas siajn renkontiĝojn por daŭrigi kion ni komencis antaŭ kvindek jaroj.

Nu kion ni preparas por festi, se oni povas paroli pri ‘festo’, la kvindek-jariĝo de nia societo? Unue, publikigi ‘Mezmaran Stelon’, due publikigi novan libreton entenantan la paralelan tradukon de 200 maltaj proverboj verkitan de la subskribanto; trie anonci en diversaj gazetoj konkurson de eseoj pri Esperanto; kvare, okaze de Zamenhof-tago paralele kun la 50-jariĝ-festo okazigi bankedon kaj specialan vesperon por la amikoj de Esperanto kiel ankaŭ por pasintaj membroj kaj studentoj.

Mi devas kontraŭvole fini ĉi tiun artikoleton per bedaŭro: -- mi ne volas uzi la malbele-gan vorton ‘grumblo’ -- ke ni kiuj ankoraŭ restas, jam maljuniĝis, dum ĝis nun ni ne trovis taŭgajn junulojn por daŭrigi nian laboron. La bele-ga poemo de Zamenhof ‘La Vojo’ komenciĝas per la vortoj: "Tra densa mallumo briletas la vojo". Ho ve, mi kredas, ke, rilate la movadon ĉi tie, ni estas jam en densa mallumo dum la vojo jam preskaŭ mallumiĝas.



Mi ne volas aŭdiĝi kiel pesimisto. Tamen ĉu ne estas vero, ke espero, ‘lasta diino’ (*ultima dea*), estas la lasta kiu mortas? Do kion fari? Ni esperu.

Por fini, mi proponas al vi legi ĉi tiujn miajn humilajn versojn okaze de nia 50-jariĝa vojo:



Malta Esperanto-Societo  
50-jariĝas  
(1961-2011)

Gaja jubileul' jam duonkalva,  
La straton senrespire trapaŝante,  
Portante l' verdan flagon de l' espero,  
Al l' alto strebas vi, saĝ-elegante.

Mi naskis vin humile, esplorante  
La ĉirkaŭaĵon por lumigi ĉie  
Per la spert-lumo de la zamenhofa  
Idealo, vartante strategie.

La procesio estas nur etkvanta,  
Eĉ pli etiĝas; nu la kant' mallaŭtas.  
Eltenu konsiliĝe sed sentime.  
Ja maliculoj ĉiam plebe paŭtas.

Jupitero forestas. Diru, kiu  
Povos kudri l' tolaĵon? Ja neniu!

*Carmel Mallia*



# Esperanto en Nederlando

## Komenco

La Esperanto-movado en Nederlando komenciĝis en 1901, kiam Dreves Uijtterdijk publikigis la unuan lernolibron. En la sekva jaro aperis la unuaj numeroj de propra gazeto: *La Holanda Pioniro*. Baldaŭ aperis ie tie lokaj Esperanto-kluboĵoj. Tamen tio ne estis la plej unua publikaĵo pri Esperanto en la nederlanda: en 1896 jam aperis en Uppsala (Svedujo) malgranda broŝuro pri la internacia lingvo, fare de Jac. M. Vaz Dias, supozeble portugala judo laŭdevene. En 1996 mi prizorgis reeldonon de tiu "Korte Brochure" por festi ties unuan jarcenton.

## Tre dividita socio

Nederlando komence de la 20a jarcento estis tre dividita socio: ĉiuj tendencoj posedis proprajn memstarajn organizaĵojn, same politike, religie, sanprizorgade, sportiste ktp. Por preskaŭ ĉio ekzistis organizo socialista, katolika, ortodokse-protestanta, liberale-protestanta, ktp. Eĉ por futbalo, teatroludado, kantado, kaprobredado! Do ankaŭ por Esperanto. La lingvo povis esti idealisma, internaciisma – la lokaj grupoj estis laŭ propra etoso. En pluraj urboj interkonkurencis protestanta, katolika, socialista kaj neŭtrala movado.



## Kresko de la movado laŭnombre inter la du mondmilitoj

En la jaroj inter la du mondmilitoj la Esperanto-movado nombre treege kreskis, ĝis kelkaj dekmi-  
loj, ĉefe inter senlaboruloj; samtempe ankaŭ estis kelkaj seriozaj gajnoj por la Esperanto-movado: ekzemple depost la fruaj 30aj jaroj en ĉiuj telefonbudoj tra la lando la uzad-informoj aperis apud la NL krom en A, F, G ankaŭ en Esperanto (nuntempe telefonbudoj estas eksmodaj – ĉiu havas poŝtelefonon); kun apogo de fama pedagogo prof. Casimir kaj de Theo Thijssen, aŭtoro kaj estrarano de instruista sindikato, unu nacia ligo de instruistoj en 1931 akceptis proponon, ke oni stimulu Esperanton; la urbestro de Arnhem en 1930 havigis al Julia Isbrücker kaj Andreo Cseh por ilia Cseh-instituto bone situantan konstruaĵon por okazigi kursojn kaj konferencojn. Pastro Cseh ekloĝis nialande kaj vaste gvidis

kursojn, kio certe tre kontribuis al la kreskado de la Esperanto-movado en la fruaj 30aj jaroj.



*Andreo Cheh*

### **Frua literaturo**

Literature tre gravis tiuepoke Hindrik Jan Bulthuis, kiu verkis plurajn originalajn romanojn (plej konata estas *La Vila Mano*), kaj plurajn ofte ampleksajn tradukojn: *Leono de Flandrujo*, *Imperiestro kaj Galileano*, *Jane Eyre* ktp, kvankam la nederlandanoj ĝenerale prefere produktis kaj aĉetis multe pli da poŝvortaroj kaj kurslibroj. Kiel membroj de la Akademio de Esperanto famiĝis inĝ. J.R.G. Isbrücker (prezidanto



*Hindrik Jan Bulthuis*

de la reorganizita AdE 1949-63) kaj precipe Hendrik A. de Hoog (ekz aŭtoro de la lingva studaĵo *Du Malsanoj en Esperanto*) kaj Frits Faulhaber kiu aŭtoris ege detalan gramatikon nederlandlingvan *Tra la labirinto*, ankoraŭ ofte uzatan en la 60aj-70aj jaroj.

### **Dua Mondmilito; rekomenciĝo**

En 1940 la germanaj okupantoj likvidis ĉiujn Esperanto-organizaĵojn kaj konfiskis ĉiujn iliajn posedaĵojn.

Post la Dua Mondmilito en Nederlando ĝenerale regis la etoso, ke oni devas nun rekonstrui la tutan landon – ne estas plu spaco por idealoj. Willem Drees estis la ĉefministro de la landa registaro (1948-58), sed la – ja konata – fakto ke li estis esperantisto ne multe helpis la Esperanto-movadon. Ankaŭ la fakto, ke la Cseh-Instituto plu ekzistis en Hago, ne efikis eksteren; pastoro Cseh tie loĝis ĝis maljuniĝo, fine li transloĝiĝis al flegejo por maljunuloj – la iama konstruaĵo en Arnhem dank’ al la Germana okupado kaj ne plu estis uzebla por Esperanto. Ankaŭ la transloĝiĝo al Roterdamo de UEA, post la reorganizaj klopodoj koncerne la Skismon de 1936 en la Esperanto-movado, kaj post la intermezo en Britujo, ne multe efikis en la nacia socio: Esperanton oni apenaŭ plu atentis. Sola escepto eble estas, ke la Ministerio pri Instruado oficiale akceptis Esperanton kiel libere elekteblan studofakon en la mezlernejo en 1968 en la nova t.n. Mamut-leĝo kiu revoluciis la kompletan instrusistemon nialande. Paralele al tio oni realigis ŝtatan ekzamenon pri instrukapableco pri Esperanto por la unuaj klasoj (tio funkciis pli malpli inter 1964 kaj ĉ. 1985; nova reformo nuligis la ekzamenon.)

### **Kunlaboro singarda**

En 1958 la kvar ĉefaj esperanto-organizaĵoj nialande (neŭtrala, laboristoj, katolikoj kaj protestantoj) kune fondis komunan Esperanto-gazeton. La membronombroj malkreskis, ankaŭ sub influo de la ĝenerala socia tendenco de post la 50aj jaroj ke ĉiam pli da homoj ne emas fariĝi membroj en sociaj, politikaj aŭ ekleziaj organizaĵoj.

Tiu kunlaboro en 1994 fine rezultis en kunfandiĝo de la kvar menciitaj organizoj en la nunan "Esperanto Nederland".



*Katalin Kovacs*

Depost 1932 la Cseh-instituto (poste Internacia Esperanto-Instituto) en Hago preskaŭ seninterrompe ĝis 1970 aperigis la revuon *La Praktiko* por internacia publiko. La lastajn jarojn UEA prizorgis ĝin. *Heroldo de Esperanto* de Teo Jung aperis en Scheveningen de 1936 ĝis 1961. Aparte vigla estis la eldonagado de la laborista movado FLE kiu kunlabore kun SAT aperigis du seriojn da literaturaj verkoj.

### **Ĉe la universitato**

En 1947 aperis grava doktoriĝotezo de W.J.A. Manders – *Vijf kunsttalen, kompara studo pri Volapük, Esperanto, Ido, Occidental kaj Novial*. La sama Manders jam tradukis la Odiseadon komplete en prozo – por "elprovi la lingvon". Depost 1948 la rumana prof. Sigismundo Pragano ekinstruis pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo; daŭrigis tiun taskon d-ro

A.J. Middelkoop, d-ro Rob Moerbeek, prof. Marc van Oostendorp kaj fine prof. Wim Jansen. La lastajn jarojn finance subtenas tion kune IEI en Hago kaj Esperanto Nederland. Estas neklare ĉu eblos daŭrigi tion finance, ĉar IEI retiris sin.

### **Iom da nova elano**

En 1972 la nederlanda eduka televida organizaĵo Teleac inter tuta serio da lingvinstruaj kursoj aperigis kurson pri Esperanto. Tra la tuta lando viglis lokaj grupetoj por subteni la kursanojn. Tamen por la landa gazetaro tio apenaŭ montriĝis novaĵo.

Kvankam laŭnombre multe malpli granda ol antaŭ la Dua Mondmilito, la Esperanto-movado nialande nuntempe literature produktas multe pli.

En la postmilita tempo literature agadis ĉefe Willem Verloren van Themaat (romano, poemoj, tradukoj, sed ĉefe sciencaj artikoloj), Wouter Pilger (poezio, tradukaĵoj, eldonagado), Rejna de Jong (poezio), Gerrit Berveling (redaktoro de *Monato*, redaktoro de *Fonto*; editoro de plurlandaj libroj, propraj romanetoj, poemaroj, amaso da tradukoj el Latina, Greka kaj Nederlanda) kaj Anneke Schouten-Buys (poezio).

Gerrit Berveling depost 1989 krome estas membro de la Akademio de Esperanto.

### **Gravaj aktivuloj**

Tre grave kontribuis al la movado, ne nur loke, kelkaj homoj kiuj jam mortis: ni menciui pri Jan van Keulen (redaktoro de *Dia Regno* de KELI), Jacques Tuinder (iniciatinto de

Agado E3), Jennie van Veenendaal (iniciatinto de la junulara movado de UEA, TEJO), Ko Hammer (instruado, redaktado).

Politikistoj nuntempe kutime tute ne interesiĝas pri idealismaj movadoj. Lingve la politiko, la ministroj pri instruado kaj la universitataj gvidantoj jam decidis ĉiamaniere prioritati la uzadon de la angla. Pluraj universitatoj donas amason da kursoj angle. En la publiko la temo de lingvaj rajtoj apenaŭ vekas reagon, krom ĉe ekstreme dekstremaj naciismaj rondoj.

Tamen, ni simple daŭrigas nian agadon, esperante je pli bonaj tempoj.

Organize en Nederlando krom Esperanto-Nederland (<http://www.esperanto-nederland.nl/ned/index.php>) ekzistas Nederlanda Esperanto-Junularo kun sia paĝaro: <http://www.esperanto-jongeren.nl/> kaj diversaj fakaj E-sekcioj. Entute nun en Nederlando aktivas 16 (vidu che: <http://esperanto-nederland.nl/ned/regionale-groepen.php>) E-societoj. Kiel jam menciite krom la organizoj de nederlandaj esperantistoj en Nederlando aktivas du gravaj sendependaj organizaĵoj: Internacia Esperanto-Instituto en Hago kaj Universala E-Asocio en Roterdamo. Ambaŭ grave influas ne nur al la tutmonda E-movado sed ankaŭ al la nederlanda. Kune kun UEA nederlandanoj organizis kelkajn universalajn kongresojn de Esperanto.

*Gerrit Berveling*



## Pola Esperanto-asocio – sojle je ĝeneralaj ŝanĝoj

Mia raporto priskribas ĵus ŝanĝiĝantan situacion de la movado en Pollando post la elekto de nova Ĉefa Estraro de PEA.

Nun vi ricevas opinion de „malnova prezidantino”, kiu gvidis polan landan Asocion dum pli ol tri kaj duono da jaroj, aktive ĉeestis multajn eventojn, iom mem organizis, kaj almenaŭ observis diligente ĉion gravan, priskribante tion en de mi dum 4 jaroj redaktata revuo Pola Esperantisto. Mi ne povas garantii ke miaj opinioj estas objektivaj, sed laŭ mi – veraj, kredindaj, „el la unua mano”.



La situacion de E-movado en Pollando en junio 2011 oni povas opinii kiel "meze bonan". Ankaŭ ĉe ni la esperantistaro rapide maljuniĝas kaj la bona, tre ideema kaj sindonema generacio forpasas... Ilia loko tre ofte restas malplenigita, ĉar samtempe pli kaj pli mankas homoj kapablaj instrui novajn esperantistojn, de jaro al jaro malgrandiĝas nombro de E-kursoj, kaj ĝenerale – la nivelo de la lingvokono de esperantistoj (eĉ aktivuloj) draste malaltiĝas.

Tion mi observas en ricevitaj materialoj direktitaj al la Redakta Kolegio de Pola Esperantisto, sed ankaŭ dum E-aranĝoj, kie multaj – eĉ bonaj agantoj – ne scipovas paroli esperanlingve. Tiaj estas efikoj je manko de regulaj E-kursoj en ĉiuj filioj, rondoj, kluboj de esperantistoj.

Kulpas senvizieco kaj malforteco de ILEI, tute ne okupiĝanta pri E- instruado dum multaj jaroj. Kompreneble, la plej gravan rolon en landa agado ludas ĝuste PEA, kiu ankaŭ ne havas de jaroj klaran planon de "instruado de instruistoj". Sen kreado de forta enlanda instruistaro, nenia plibonigo de situacio eblas – instruistoj/instruantoj estas

bezonataj en ĉiuj regionoj kaj lokoj, tio estas la unua kaj grava kondiĉo por ŝanco al kresko de E-movado.



Krom PEA, oni povas observi la aktivecon de kelkaj eksteraj E-organizoj: en Bjalistoko, Wroclavo, Olsztyn, de tempo al tempo – en Krakovo. Tion ni konstatas laŭ la ricevataj informoj al kroniko de regionaj eventoj en ĉiu numero de Pola Esperantisto, ĉar la revuo estas malfermita por la tutlanda E-movado.

Sed mia tasko estas ligita kun informo pri PEA, tial sube vi havos skizitan raporton, pri situacio de PEA meze de 2011-a jaro.

### **Organizaj aferoj**

PEA estas de 2 jaroj leĝe establita neregistara organizo laŭ la pola juro, rajtigita same, kiel aliaj NRO en Pollando kaj en aliaj landoj de EU. Konsistas ĝi el 25 filioj, inter kiuj troviĝas la Pola Esperanto-Junularo, aliaj filioj estas regionaj. Ĉi-jare PEJ agas jam ankaŭ kadre de Pola Konsilario de Junularaj Organizoj, al kiu ĝi aniĝis.

PEA agas laŭ statuto aprobita en 2007a jaro, kaj oni spertis ties maltaŭgecon por eventuala memstariĝo de filioj – internaj paragrafoj ne permesas ke regionaj filioj de PEA memregu sin finance. Tial estis malebligitaĵoj por la agado el multaj fontoj, kiuj postulas certan sendependecon



organizan kaj financan de monpetanto. Tio kaŭzas neceson ŝanĝi la statuton, se oni ne volas riski dispartiĝon de la tuta Asocio. Ankaŭ aliaj statutaj temoj indas ŝanĝojn, certe la nova Estraro pri tio zorgos.

Inter ekzistantaj regionaj filioj de PEA vere aktivaj estas nur kelkaj: Warszawa, Łódź, Gliwice, Bielsko Biała, Gdańsk, Nowy Sącz, Brodnica ( nur unu faka agado - turismo, sed modela dokumentado...) Kelkaj filioj estas malgrandaj kaj malfortaj, kaj ekzistas eĉ tiaj sen signo de vivo, kie maljunaj anoj ne allogis posteulojn kaj ne kapablas aranĝi agadon en tute aliaj kondiĉoj de la postmunisma lando... Jam petis pri nuligo la filio en Kielce, oni nenion scias pri la agado en Poznan ( kie aktivas nur organizajho ESENCO, sed dormas la Regiona Filio de PEA) kaj Dąbrowa Górnicza. La nova Estraro de PEA devos aktualigi la mapon de Esperanta agado en Pollando.

## **Edukado**

Malmultiĝas nombro de organizataj E-kursoj, tragika estas la situacio de la instruistaro. Fakte post la "grasaj" jaroj 70-90, kiam instruistoj estis amase preparataj en Bydgoszcz, jam ne revenis simila interesiĝo pri lernado de Esperanto, nek kreiĝis organizaj fortoj por krei similan centron de klerigado de instruistoj. Atestitaj antaŭ ĉ. 30 aŭ pli da jaroj gvidantoj de E-kursoj maljuniĝis kaj forlasas aktivan esperantistecon aŭ forpasas. Kia povas esti solvo de la situacio, se en la tuta lando ekzistas nun nur kelkaj aktivaj instruistoj – fakte instruantoj sen pedagogia rajtigilo?

Antaŭe mi esperis pri helpo flanke de ILEI – pri ricevo de iu ajna informo pri loko de instruista aktiveco: kiom da kaj kie troviĝas instrufortoj, kun kiaj kvalifikoj/atestiloj, kie estas lokoj kaj de ili organizataj kursoj, kaj fine – komune preparenda bilanco de bezonoj kaj eblecoj instrui Esperanton. Hodiaŭ mi scias, ke mankas klara strategio por agado kleriga kaj instrua, ĝuste tial oni ne povas kalkuli pri helpo flanke de ILEI-PL, se dum 4 la lastaj jaroj ne estis ordigita informa bazo pri instruistoj. Dum kunsidoj, kiujn mi partoprenis, ili parolis pri neceso eldoni novan lernolibron! Mi demandas – por kiuj?

Tial la edukado devas fariĝi unu el la plej gravaj taskoj por PEA. Se tio ne estos tuj organizita, la pola E-movado ne havos ŝancon travivi nunan "transgeneracian" ŝanĝon, kiam aktivaj instruistoj/instruantoj aĝas 60-80 jarojn, kaj neniu zorgas pri posteuloj... La movadon gvidas volontuloj, PEA ne havas eĉ unu dungiton, mankas homfortoj por vojaĝi tra la lando kaj ripari la situacion en multaj filioj. Savrimedo estas nur unu – kelkaj fortaj regionaj memstaraj organizoj, kunligitaj organize en Federacio, memzorgantaj pri financado de la agado per publika mono. Mi persiste tion ripetas, sed ofte sen reeĥo..., sen subteno.

Krom Nowy Sącz, kie daŭras konstanta instruado por "triaĝuloj" kaj infanoj, kaj nun oni komencas labori ankaŭ kun junulara grupo, mi povas konfirmi nur kursojn organizatajn de PEA Filio en Gliwice kaj Varsovio. Mi volonte ekscius pri la atingoj de aliaj regionoj...Danke al Partnereca Projekto Grundtvig en programo "Lernado dum la tuta vivo" gvidata de Halina Komar (kunordiganto) en 2010 el Pollando sukcesis KER-egzaminiĝi 14 personoj, kelkaj el ili jam gvidas proprajn grupojn. El la sama monfonto estis fonditaj de PEA 2 stipendioj por Instruista Trejnado ĉe UAM Poznań. Tio montras, ke la situacio estas ne nur ŝanĝenda, sed ankaŭ ŝanĝebla, sed mankas homoj persiste

strebantaj al celo, kiel en Nowy Sącz... Evidente, la nuna, sola ŝanco por instrui novajn gvidantojn de E-kusoj troviĝas ĉe Poznańa Universitato Adam Mickiewicz, kie ekzistas Fakoj de Interlingvistiko, gvidata de profesorino Ilona Koutny, sperta kaj vigla esperantistino. Danke al ŝia laboro kaj agado, oni povas aliĝi al unujara instruista trejnado de UAM kaj ILEI kunlabore kun Edukado.net. La kursaro akompanas la tradiciajn interlingvistikajn sesiojn en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznańo. La du surlokaj unusemajnaj sesioj (septembre kaj februare) disponigas koncize la necesajn metodikajn konojn por profesie instrui Esperanton. Post hejma kaj reta laboro la sukcesa trapaso de la fina ampleksa ekzameno kun prezento de finlaboraĵo rajtigas al la instruista diplomo de ILEI post unu jaro.

Do kie kuŝas la problemoj? Nu, pli facile oni allogas al Poznańo por instruista trejnado eksterlandajn esperantistojn ol la polajn!

Bezonata estas granda inform-propaganda kampanjo, kun celo allogi novajn, klerajn esperantistojn – plej bone jam kun pedagogia klereco kaj atesto. Tion ni jam komencis fari en la socio de la Tria Aĝo, kio estas alternativa pro manko de junuloj, pretaj servi kiel kursgvidantoj. Esperiga estas iniciato de la nova Estraro de PEA en Varsovia Universitato, kie oni komencis aranĝi kondiĉojn por rajtigo de KER- ekzamenoj en Esperanto, egale kun aliaj lingvoj. Se tio sukcesus – iĝus nova ŝanco por allogi junularon al E-lernado. Kaj se aldone la propono direktita al ili estus interesa – eblus plifortigi la junularan parton de pola movado.



### **Informado kaj propagando**

Sur tiu ĉi kampo, pola esperantistaro havas grandajn atingojn. Dum la lastaj 3 jaroj, esperantistoj uzas ĉiujn eblecojn por montri sian ekziston al ekstera mondo. Ni sukcesis alkitimigi regionajn filiojn al partopreno en diversaj lokaj eventoj: festivaloj, foiroj, forumoj, piknikoj, ekspozicioj kts. – kie civitanoj povas vidi kaj ekaŭdi pri nia lingvo kaj la movado. Krom disdonado de informiloj, oni ofte organizas konkursojn, gvidas E-lecionojn, prezentas prelegojn, filmojn aŭ artistajn programerojn... Do – almenaŭ en

kelkaj lokoj en Pollando la ekstera informado floras. Certe gvidan rolon plenumas Nowy Sącz, kie loĝantoj scias multe pri Esperanto kaj esperantista agado pro gazetaraj, radiaj kaj tv informoj – oftaj kaj simpatiecaj.



## **Agado**

Nian agadon priskribas la organiza revuo "Pola Esperantisto". – jam 105-jara gazeto, kiu ĝuste dum 4 lastaj jaroj estas redaktata en Nowy Sącz kun helpo de samideanoj el diversaj regionoj kaj ne nur el PEA. La revuo fariĝis bildo de ĉiuj gravaj eventoj en pola esperantista mondo, tiamaniere ĝi estas vera kroniko de pola E-movado, fonto de informoj pri la stato de PEA kaj pri diversaj iniciatoj de aliaj organizaĵoj esperantistaj en Pollando dum 2008-2011.

De januaro 2012 ŝanĝiĝos la redakta kolegio, sed la gazeto plu servos por la tuta pola esperantistaro, kaj plu respingulos la tutan polan E-movadon.

Oni devas montri ankaŭ la organizan sukceson de la pasinta estrarperiodo, prepari bonegajn Tutpollandajn Esperanto-Kongresojn, antaŭe forlasitaj de PEA dum deko da jaroj. Ili okazis en Lodzo 2008 kaj en Nowy Sącz 2011.

## **Resumo**

La plej grava atingo de la lastaj 3-4 jaroj de PEA, estas eliro el la esperantista getoo. Ni montris ekstere nian aktivecon kiel "aktivaj civitanoj", konvinkante aliajn, ke Esperanto estas unu el movadoj por publika bono kaj neniu stranga sekto, kiel ni antaŭe estis

opiniitaj. Nun ni publike, per amaskomunikiloj kaj ĉeesto dum gravaj eventoj loke, regione, kaj tutlande – prezentas valorojn de la lingvo kaj allogas al la movado. Ni estas aktivaj ĉie: en agadoj kleriga, kultura, socia, turisma, karitata, volontula ktp. Tial ni estas sur bona vojo kun espero, ke plijunigita nova Estraro trovos ankaŭ rimedojn por allogi junularan generacion kaj sukcesos solvi grandan problemon de instruado en Pollando.

### **Aldone – pri pola E-movado**

Oni devas ankaŭ priskribi la agadon de aliaj Esperanto-organizoj, institucioj aŭ aliaj E-subjektoj. Tio ne estas facila tasko, ĉar ne ekzistas en nia lando iu centro, okupiĝanta pri analizado kaj dokumentado de tiu ĉi kampo – estas konataj nur agoj, kiujn ni ricevis priskribitajn kiel materialoj al la revuo Pola Esperantisto. Pri aliaj faktoj ni nur povas supozi, hazarde aŭdante opinion aux reeĥon post iu aranĝo.



Certe la plej fortan agadon oni observas en Bjalistoko, firme establita de Bjalistoka Esperanto-Societo, Centro nome de L.L.Zamenhof, Fondaĵo je la nomo de Zamenhof, Esperanto-Libraro – la filio de la ĉefa regiona Podlaĥia Libraro. Bone organizita agado, multaj interesaj iniciatoj, tradiciaj festoj kunligitaj kun la Majstro, favora subteno de la urba kaj regiona registaro – tiaj fortaj faktoroj starigas la BES sur la unua loko en pola E-movado. La teamon de bonaj agantoj estras Elżbieta Maria Karczewska.

Tuj post ili, oni trovas alian fortan esperantistaron, kunligitan de Silezia Esperanto Asocio en Wrocław. Tie estras energie Teresa Pomorska kun helpo de meritaj esperantistoj - honora prezidanto Adam Pleśnar, E.Wojtakowski kaj aliaj. Esperantistoj el Wrocław aktive partoprenas preskaŭ ĉiujn E-aranĝojn polajn kaj najbarajn, mem

organizas ĉiujare semajnajn feriojn en Szczawno-Zdrój, kuracloko kie ripozis L.L. Zamenhof, kaj kie restis memoraĵoj de tiu ĉi vizito. Venontjare oni festos 100-jaran jubileon de tiea kuracado de Majstro dum la aranĝo 2012.

Simpatie agas Varmia-Mazuria Societo de Esperantistoj en Olsztyn, proponante al samideanaro FREŜO-n, tre agrablan, gajan printempan semajnan renkonton en Olsztyn. Organizas ĝin fakte tri intergeneraciaj familioj: Frenzkowski, Gielert, Zdankowski. Dum la lerneja jaro en Olsztyna Universitato de Tria Aĝo oni gvidas la E- kurson.

Varsovian Venton – gvidatan de Irek Bobrzak, guroo por junularo, konas preskaŭ ĉiuj, ĉar li elpensis kaj dum multaj jaroj gvidis la Ago- Semajnojn, tre popularajn kaj eĉ amatajn de junularo finjarajn aranĝojn. Nune ĝi jam ŝanĝis la organizajn regulojn, fariĝis pol-germana, kaj la Via Vento pli okupiĝas pri E- muziko kaj filmado.

Krakova Societo Esperanto havas sian artan kaj literaturan flankon en pola E-Movado. Gvidas ĝin Lidia Ligeza, la ĉefa organizantino de Esperantaj Tagoj de Krakovo, kiu invitas nun ĉiujn al 100-jara jubileo de la Krakova UK en 1912j. La festado okazos ĝuste dum la Esperantaj Tagoj de Krakovo 2012.

Internacia Klubo ESPERANTOTUR en Bydgoszcz estas faka organizo por edukado kaj turismo. Ĝi servas kiel AIS klerig-punkto kaj ankaŭ kiel Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo. Krome - organizas multajn vojaĝojn al E-aranĝoj en la tuta mondo. Ankoraŭ ni aŭdas pri la ĉe Jagiellona Universitato E-agado en Krakovo, aranĝata de Maria Majerczak, sed oni ne konas detalojn de tieaj iniciatoj kaj agoj. Ne sciate, ĉu la organizo estas registrita aŭ nur bazita ĉe la Universitato.

Indas priskribi imponan agadon de la plej nova Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz, kiu fakte ne estas strikte esperantista organizaĵo, sed agas por Esperanto kaj internacie per Esperanto – kiel eduka-kultura, tutpollanda kaj internacie rimarkebla entrepreno de e-istoj

Same nova estas pola sekcio de organizaĵo Eŭropo-Demokratio-Esperanto, kies motoro kaj inicianto estas Kazimierz Krzyżak el Gdynia. Li estas jam konata de siaj antaŭaj atingoj – danke al persistaj kontaktoj kun politikistoj, li sukcesis estigi Esperanton subtenantan parlamentan rezolucion okaze de la 150-a jubileo de la naskiĝtago de Zamenhof, kiu – eble la nuran fojon en la pola kverelema parlamento – estis ĉiuvoĉa! Nune E-D-E strebas por enskribi Esperanton sur la liston de Nemateria Nacia Heredaĵo ĉe Ministerio de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo en Pollando.

Ĉu ekzistas aliaj, multnombre montritaj en E-adresaro, oni ne scias. Miajn informojn mi donas sur la bazo de ricevitaj materialoj dum 4-jara redaktado de Pola Esperantisto.

Oni povas aldoni ankoraŭ du polajn E-Eldonejojn privatajn - Eldonejo KLEKS en Bielsko BiaŁa de Georgo Handzlik kaj Eldonejo HEJME en Czeladz de Kazimierz Leja.

Aparte gravas la jam 7-jara agado ene de granda neesperantista aranĝo Ekonomia Forumo en Krynica, nomata „Pola Davos”, pro ties multfaka temaro kaj graveco por Eŭropo kaj la mondo. Tie la esperantistoj de Nowy Sacz sukcesas ĉiujare (krom en unu jaro) organizi partoprenon de EEU kiel Partnero de la Organizanto – Instituto de

Orientaj Studoj. Jam tradicie, per fortoj de E@I kaj monhelpo de ESF kaj UEA, oni organizas tie elstaran, imponan standon per kiu estas informataj multaj influaj personoj en Eŭropo pri Esperanto. Ĉiujare pli ol 2000 EF-partoprenantoj, superaj politikistoj, ekonomikistoj, bankistoj, manaĝeroj, vidas vivantan Esperanton – la multlingvaj informiloj priskribas lingvon kaj movadon, sur tablo oni vidas ekzemplojn de riĉa literaturo, sondiskojn, didaktikajn ilojn, reklamilojn kaj... belajn, junajn esperantistinojn kiuj allogas apudpasantojn.

*Halina Komar*



# Portugala Esperanto-movado

## Resuma historio

En 1892 publikigis la unua esperanto-lernolibro en Portugalio (de Heinlein FERREIRA). Kiel en aliaj eŭropaj landoj baldaŭ la nova lingvo ekhavis "adeptojn" — la unua portugala esperantisto estis verŝajne Costa e ALMEIDA, kiu fariĝis poste ano de la Lingva Komitato, sed ne certas kiom el tiuj pioniroj estis jam fakte parol- aŭ eĉ kompren-kapablaj. La unuaj portugaliaj esperantistoj venis ĉefe elinter "progresemaĵ" rondoj: Ili estis plejparte intelektuloj kaj etburĝoj, preskaŭ ĉiuj viroj, mezjunaj, proporcie multaj komercistoj, framasonoj, respublikistoj (Portugalio estis monarĥio ĝis 1910), kaj anoj de reformaciaj eklezioj (kvankam katolikismo estas la plej ofta konfesio en la lando).



Jam en tiu ĉi unua fazo aniĝas al la movado kelkaj homoj, tiam ankoraŭ tre junaj, kies rolo daŭros jardekojn. Inter ili aparte nomindas Bernardino Martins d'ALMEIDA ("Luzo Bemaldo") kaj Jorge Saldanha CARREIRA. Tiam la esperantistaro agas insiste ĉe la gazetaro kaj multas la baznivelaj kursoj; jam Esperanto estis dudekjara kaj oni plu propagandis pri tiu ĉi «nova lingvo».

ISSN 0671-9241

# NiaBulteno

JULHO-SETEMBRO 2012 JULIO-SEPTEMBRO • Numero 95

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio  
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Costa, 6/5A, PT-3300-239 L. BARRA • +351-257 341 297 • [apoe@esperanto.pt](mailto:apoe@esperanto.pt) • [www.esperanto.pt](http://www.esperanto.pt)

26-a P.E.E. - Palmela, 2012.10.06-07

## Bonegaj kondiĉoj sed malamasa ĉeesto

27 artikoloj pri la nova konferenco kaj la nova programo de la P.E.E. 18-4-1

**Kursfinaj ekzamenoj sideje**  
OK lernantoj al la sekva nivelo. Pg. 5

**Reaperas Aportamentos Gramaticais de Esperanto**  
Plim rekomeno de simila lernado. Pg. 7

**Aniĝkvanto rekreas en 2012 sed ni ankoraŭ nanas ĉe U.E.A.**  
Tioas pli kreita je novaĵoj membraj, ol se daŭre la tutele lernantoj pro ferpaŝoj. Sed per la Komitato gvidas kieltoj lego. Pg. 6-7

**Lisbona Zamenhoffesto**  
Festigos tripe jubilo la deklaron de decembro: 125 jaroj de esperanto, 120 el kiuj en Portugalio kaj 40 jaroj de P.E.E. Pg. 3

**La tuta Eduardo Novembro: plena verkarlisto**  
Kiam krevo sentis la aliron de Fozosadero, honore memita en la Hinoj B.E.E. Pg. 10-11

Demandoj kon ajn al [traduzir@esperanto.pt](mailto:traduzir@esperanto.pt)

La organiza strukturo de la movado ĉiĉepoke estas disa, kun pluraj apartaj grupoj, kiuj tamen kutime bone kunlaboras. Krom unuopuloj en multaj "provinciaĵ" lokoj, estas firma kluba agado en Lisbono kaj Oporto kun prelegoj, kursoj, kaj promenoj. Publikiĝadis diversaj revuoj/bultenoj, multaj propagandiloj, kaj kelkaj libroj — plejparte lerniloj, vortaroj, kaj frazlibroj.

En 1926 ekregis en Portugalio konservativa diktatoreca reĝimo kiu daŭris ĝis 1974. Ties rilato al la movado alternis inter suspektema tolero kaj praktika subpremo, kaj ĝi draste kondiĉigis la landan esperanto-agadon dum ties tuta daŭro — kio lasis pluajn markojn.

Dum la jardeko de 1920 ekas dua fazo de la movadhistorio en Portugalio: Aperas, kiel en aliaj landoj, laborista movado — notindas i.a. loka agado en la industria urbeto Barejro (*Barreiro*, apud Lisbono). La aparteco inter laborista kaj

"neŭtrala" movadoj ne estis tiom drasta kiom aliie, kaj dependis multe pli de la dividoj socitavolaj kaj politikaj de la portugalia socio ol de enmovadaj tendencoj. Tial troveblas multaj kazoj de longa kaj sukcesa kunlaboro inter tiuj du "flankoj".

Ankaŭ tial diversaj esperantistoj kaj grupoj spertis tre malsame la "atenton" al la movado flanke de la politika polico: Dum iuj estis viktimoj de konfiskoj, arestoj, kaj minacoj, aliaj povas atesti ke nenian ĝenon ilia persona Esperanto-agado suferis: Tiu variado laŭis nemovadajn aspektojn de la koncernato, nome ties socian tavolon kaj individuon "suspektindecon".

Pro tiu persekutado iuj esperantistoj ekloĝis eksterlande (i.m.a. Manuel de SEABRA, Roberto das NEVES, kaj Joaquim CALADO) kaj enlande la movada laboro perdis la ĝistiaman viglon — ĉu pro rekta subpremo, ĉu pro timo. Eĉ post kiam mildiĝis tiu subpremado (flanke de la Polic- kaj Milit-ministerioj), post la Hispania Civila Milito kaj la Dua Mondmilito, daŭre estis rifuzata permeso reklami kaj okazigi esperanto-kursojn kaj (re)starigi klubojn, plurfoje petita (ĉe la Edukministerio).

Tial, dum la tuta meza duono de la 20-a jarcento, la portugalia esperanto-movado agadis laŭdevege en neformalaj organizoj, kiuj ne havis fiksjajn postenojn kaj ofte eĉ ne nomon. Esperantistoj renkontiĝis en kafejoj, organizis libro-servojn kaj cirkulantajn bibliotekojn, kaj praktikis leteramikecojn kun alilandanoj (i.m.a. menciindas tiu de Werther SACRAMENTO kun J. RÉGULO Pérez). La plej malnovaj portugaliaj esperantistoj vivantaj nuntempe eklernis en tiu ĉi epoko.

Malgraŭ tiaj malfacilaĵoj organizi kaj organiziĝi, diversaj elstaraj agadoj estis entreprenitaj de la portugala esperantistaro en tiuj jardekoj. Menciindas ekz. la helpo, per alsendo de dosaj manĝaĵoj kaj pasportaj faciligoj, al esperantistoj persekutitaj de la nazia reĝimo, i.a. al Lidia ZAMENHOF, ebligita de la portugalia neŭtraleco; tiu ĉi agado motivigis UEA-honormembrecon al Manuel de FREITAS.



Alia tia malgraŭa agado estis publikigo de kelkaj libroj kaj (efemeraj) gazetserioj. Notindas interalie la aperigo de 38 multtemaj popolklerigaj libretoj inter 1941 kaj 1948, verkita portugallingve de la poste famiĝinta filozofo Agostinho da SILVA, tradukitaj de kvaropo da esperantistoj kaj eldonita de Portugala Eldona Rondo en Oporto, kiu pretigis ankaŭ aliajn librojn ĝis kiam la sekreta polico konfiskis ties havaĵojn. Alia notinda

eldonagado okazis en 1959 pro la zamenhofa centjariĝo per publikigo de *Antologio de Portugalaj Rakontoj* kun 14 poaŭtoraj etprozaĵoj, tiam tute modernaj, tradukitaj de ok lisbonaj esperantistoj.

La situacio de "duonmalpermeso" daŭris ĝis 1972 kiam finfine povis fondiĝi tutlanda asocio, kiu aniĝis al UEA en 1979. La ĝistiam mallibero estis forminta landan movadon kun specifaj trajtoj — kie paradokse abundis veteranoj tamen malspertaj, kie mankis lokaj kluboj, kie oni devis agadi ene de socio kies publika koncepto pri Esperanto estis ke ĝi estas io malnova kaj politike inspirita...

## Nuna stato

Kvardek jarojn poste, Portugalio restas kiel lando tria-vica en la movada spaliro, mankanta je kvanto en preskaŭ ĉiuj indikiloj, komparebla nur kun relative malpli grandaj landoj, kiuj estas konataj en la movado nure pro la unuopa agado de malmultaj homoj — kiel Malto, Islando, aŭ Sudafriko.

Eĉ tiel, menciendas du internaciaj fakaranĝoj (ILEI-konferenco en Sintro, 1983, kaj IKEK-konferenco en Lisbono, 1996), kaj internacia agnosko de kelkaj literaturaj agadoj — nome tiuj de etprozisto Eduardo NOVEMBRO, redaktestro kaj eldonisto João José SANTOS (*La Karavelo*), kaj, pleje, Gonçalo NEVES — poeto kaj prozisto, poste eseisto kaj esperantologo, aktivinta ankaŭ en aliaj planlingvaj movadoj. Aliaj aktivuloj atingis videblecon internacie en fakaj rondoj — i.a. Faria de BASTOS, Luís LADEIRA, kaj Alcino ALVES. Tiuj unuopaj agadoj, kompreneble, okazas je plena aŭtonomeco, kun nure laŭpeta apogo de la asocio.

Menciindas ankaŭ ke iuj portugalaj esperantistoj aktivas eksterlande pli/malpli elstare (en Angolo, Belgio, Danio, Hispanio, Irlando, Nederlando, Rusio, Usono...), multaj lerninte la lingvon en Portugalio — tio plu okazas eĉ longe post la malpermeso. Simetrie, proporcie multaj eksterlandanoj loĝantaj en Portugalio membras/membris en la asocio (notindas i.a. Wilhem Th. OESTE kaj Hassan M. AL-AMILI), asocio kiu, dum ĉ. duono de sia ekzistado, ĉiam ĝis nun havis almenaŭ unu eksterlandan postenulon.

Portugala Esperanto-Asocio havas nuntempe (2013) malpli ol 200 anojn, post ĉ. 400-opa pinto en la 1980-aj. Eĉ se malsamaj konceptoj pri membreco kaj membrigo tamen ne ebligas rektan komparon (kaj des malpli kun nombroj pri antaŭaj epokoj, ankaŭ pro



manko de fidindaj nombradrezultoj), estas certe ne eraro aserti ke la portugalia esperantistaro proporcie malmultas, inter ĉ. 10 milionoj da homoj en la lando.

Gastoj el eksterlando, kiuj vizitas longe aŭ ofte, kutime laŭdas ke tiun kvantmankon tamen kompensas averaĝa kvalito inter la portugalaj movadanoj, almenaŭ je lingva nivelo, kaj ĝojas ke (kompare) malabundas eternaj komencantoj,

"stranguloj", kaj kvereloj. Ĉi lastaj mankas ankaŭ kompare al la unua jardeko de post la fondiĝo de la asocio, dum kiam kelkaj esperantistoj, pli malpli verve, malemis asocianiĝi — memagnoske pro politikaj motivoj sed flanke de homoj el ĉiaj politikaj sektoroj...

Iom ĉie tra la mondo, la populariĝo de komputiloj kaj retuzado meze de la 1990-aj revivigis la pionirepokan fenomenon de amasa memlernado, ebligita ankaŭ de senpera informiĝo, kaj ekebligis same senperan internacian kontaktadon kaj eĉ movadan aktiviĝon — ĉion ĉi tute preter lokaj kaj landaj strukturoj.

Ankaŭ en Portugalio tio okazis/okazas: Dum la lastaj dekkvin jaroj plej multaj novaj esperantistoj estas memlernintoj, kontraste kun la antaŭaj jardekoj kiam tiuj estis pleje kursanoj. La fakto ke Portugala Esperanto-Asocio ekhavis retĉeeston relative frue (retpoŝton en 1990, paĝaron en 1996, forumon/dissendilon en 2001) ebligis konatiĝon kun tiuj novaj esperantistoj. El tiuj, multaj ne (tuj) membriĝis, pro la dume ŝanĝiĝinta socia koncepto (en- kaj ekster-movada) pri asocioj, sed preskaŭ ĉiuj kunlaboremas.

Ĵusa kalkulo pri la portugalia esperantistaro (2012) listigas ĉ. 150 konatajn fluparolantojn (el kiuj ĉ. duono estas asocioj) kaj ĉ. 350 konatajn komencantojn diverstipajn (el kiuj ĉ. sesdeko estas asocioj), kaj supozas la totalon ĉ. milo. Regulan kontakton kun interesiĝantoj kaj informpetintoj (entute ĉ. 1200 aktivaj nomoj en 2012) la asocio flegas kaj ilin gvidas laŭpete en lernado (mema aŭ instrua) kaj/aŭ en disverstipa informiĝo pri la lingvo kaj movado.

Tiaj estas ankaŭ la rilatoj de Portugala Esperanto-Asocio kun la universitataj medioj, kiu en 2012 alportis la unuan el pluraj baldaŭaj rezultoj — magistriĝa diserto kun 19/20-ona aprobo (Sónia Apolinário, ISCTE - Dep. Sociologio), teme pri la landa movadhistorio.

Tiaj estas ankaŭ la rilatoj de la asocio kun la amasinformiloj: Ne tiom propagando aŭ reklamado, sed informado. (En 2003, okaze de la tujara kampanjo sponsorita de Etsuo Miyosi, Portugala Esperanto-Asocio publikigis en grava ĵurnalo duonpaĝan reklamon kiu kaŭzis neniom da videblaj sekvoj; unu jaron antaŭe dupaĝa raporto/intervjuo en simila tutlanda gazeto, kiu publikigis ja senpage, rezultigis milojn da ekstraj retejvizitoj kaj dekojn da telefonaj informpetoj...)

Atento al Esperanto flanke de la tradiciaj amasinformiloj — gazetaro, radistacioj, kaj televidkanaloj — estas tamen malofta, eĉ se ĝenerale pozitiva: Dum la lastaj 10 jaroj konatas nure 88 (kp. 67 en la antaŭa jardeko) ajntipaj aperoj de Esperanto en la portugalia gazetaro. Dirindas tamen ke mankadis inter 1994 kaj 2013 en la strukturo de Portugala Esperanto-Asocio aparta postenulo por kontaktoj kun la amasinformiloj.

La menciita retpaĝaro, vizitebla en la propra retnomo [esperanto.pt](http://esperanto.pt), estas kulise refas-nata kaj tial prezentas dume ties staton de 2007 senŝanĝe, malkrom unu aktualigata startpaĝo. Krome, Portugala Esperanto-Asocio eldonas esperantlingvan bultenon (*Nia Bulteno*) kiu, kompanse al diversaj internaciaj laŭdoj pri redaktkvalito, havas tre malregulan kaj averaĝe maloftan aperritmon.

Portugala Esperanto-Asocio disponas ekde 1972 pri bona sidejo en Lisbono, kie funkcias oficejo, vendejo, biblioteko, kaj renkontiĝejo. Lukontrakta leĝŝanĝo en 2013 riskigas tamen ĝian forperdon. En urbeto Penacova en centra Portugalio funkcias ekde 1986 kooperativa feriejo mastrumata de organizo fondita de esperantisto Eusébio dos SANTOS, kie foje okazas movadaj aranĝoj kaj neformalaj/privataj renkontiĝoj de esperantistoj.

Krone de 40 jarojn longa insistado flanke de UEA la estraro de Portugala Esperanto-Asocio finfine en 2013 konsideras la eblecon kunlabori pri okazigo de Universala Kongreso ie en la lando, verŝajne en Lisbono, 2016 aŭ 2017.

*António MARTINS-Tuválkin*



## Rumania Esperanto-movado

En Rumanio nur la 20-an de oktobro 1904 Henrich Fischer, industriisto en Galati, malfermis la unuan kurson de Esperanto kun 25 lernantoj.



D-ro Gabriel Robin, konata kemiisto, komencis viglan propagandon kaj esprimis la ideon komenci kun la blinduloj de l'blindulejo „Vatra Luminoasă Regina Elisaveta” (Luma Hejmo Reĝino Elisabeta) tion kio estos ebla kun la permeso de Ŝia Moŝto la Reĝino Elizabeto, fondintino de tiu ĉi institucio. La 23-an de septembro 1907, laŭ iniciato de D-ro Robin, fondiĝis la „Rumana Esperantista Societo”. Tiam komenciĝis brila periodo de Esperanto en la lando. En 1909 povis okazi la unua rumanlanda E-Kongreso en Bukureŝto. UŜE-EĤO (1930-1938) estis organo de UŜE (Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo), kiu aperis en Timisoara. La ĉefcelo de UŜE-programo estis unuigi kiel eble plej multe da ekonomiteritorioj kaj ĉi tiujn gvidi unuece, politike kiel doganunion. Esperanto devintus esti la oficiala lingvo, ĉar Esperanto estas neŭtrala kaj la plej facile lernebla lingvo. Ĝi estis la unua iniciato por fondo de Eŭropa Unio.

En 1946 RES estis unuafoje jure rekonita, la gazetaro montris grandan simpatian al Esperanto.

Universitata profesoro I.F.Bociort sukcesis fondi en 1978 la „Kolektivon pri Esperanto kaj Interlingvistiko” ĉe la Rumana Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj ankaŭ per

la helpo de estinta prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, kiu vizitis en Bukureŝto prezidanton de la Rumana Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj en la somero 1978. La agado de la kolektivo celis la sciencajn kaj universitatnivela instruadon de Esperanto. En pluraj filologiaj fakultatoj de rumana universitatoj Esperanto komencis esti instruata kiel nedeviga studobjekto, kaj krom lernolibroj kaj vortaroj aperis ankaŭ lingvistikaj studoj pri Esperanto.



En 1985 venis malpermeso pri ĉiu ajn esperantista agado. Prof. Bociort estis eksigita el la universitato de Timiŝoara, sed la E-agado daŭris kaŝe, en la loĝejoj de esperantistoj. Komence de 1990, en januaro, renaskiĝis la Rumana Esperanto-Asocio ( REA ). Prezidanto elektiĝis prof. I.F.Bociort. Vicprezidantoj estis d-roj Aurel Boia kaj Constantin Dominte; sekretario de REA estis d-ro Marian Constantinescu. REA havis en Rumanio ĉirkaŭ 40 filiojn. Krome fondiĝis Rumana Universitata Esperanto-Centro kun sidejo en Timiŝoara. La estro de tiu centro estis ankaŭ prof. Bociort; vicestroj estis prof. d-ro Hans Bettisch kaj doc. Minerva Bocsă. La nombro de esperantistoj en Rumanio estis malfacile taksebla. La asocio disponis pri pli ol 3000 nomoj. La plej multaj lernis la lingvon dum la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj en universitataj kursoj, kiuj multis tra la lando. Inter 13-15-a de julio 1990 okazis en Timiŝoara la unua rumana esperantista kongreso post la dua mondmilito.



La 25-an de aprilo 1990, en la urbo Tulcea, estiĝis „*Unuiĝo de Esperantistoj Ŝakludantoj en Rumanio*” (UŜER). Fine de 1990 oficialiĝis kun jura personeco „*Asocio de Esperantistoj Kluĝo*” (AEK).



Inter 7.-12-a de aprilo 1991 okazis en Odorheiul Secuiesc la 9-a Internacia Metodika Seminario, organizita de ILEI. La junulara sekcio de Rumana Esperanto-Asocio restariĝis en marto 1991 sub la nomo REJO, kaj pli malfrue, je la 20-a de novembro 1995, estiĝis en Timișoara *Rumana Esperantista Junulara Asocio (RumEJA)*. Je la 14-a de septembro 1991 en Brașovo fondiĝis „*Rumana Esperanto Fervoĵista Asocio*» (REFA) kaj en urbo Oradea la sekcion de IKUE. 23 septembro 1992 estas la dato kiam aperis nova jura persono „*Asocio Esperanto Oradea*” (AEO). En aŭgusto 1993, en Sibiu, la rumana filio de AIS fondita en 1990 estis reorganizita sub la nomo „*Asocio Internacia de la Sciencoj-Rumanio*”, kiu estis legaligita kaj poste aliĝis al AIS-San Marino. En Rumanio malregule aperis bulteno de la nacia E-organizo (Esperanto-Infomilo - 1992;

ES-TO - 1998); kaj ankaŭ aliaj kiel Donaris (1990)-Tulcea; Bukureŝta Infomilo kaj Medicina Infomilo(1994)-Bukureŝto, kaj Bazaro en Kluĝo. *Eldonejo Bero* en Usono, aperigis diversajn tradukaĵojn el la rumana literaturo. Aperis ankaŭ en Rumanio la dulingva „*Eminescu en Esperanto*”. La eldonon prizorgis la senlaca Aurora Bute kaj redaktis la kompetenta Constantin Dominte. Dum la jubilea jaro de Eminescu aperis, ekster Rumanio alia dulingva volumo, kun la plej longa poemo de Eminescu „*Luceafărul*”, kies E-lingva versio, titolita „*La Vesperstel*”, ŝuldiĝas al bukureŝta tradukisto Jozefo E. Nagy. Alia E-versio de „*Luceafărul*”, malpli konata, aperis same en Usono, en 1998 ĉe California Publishing Company (San Francisco) sub la titolo „*Lucifero*” (tradukinto: Jozefo Petrin).

Inter la 14-a kaj la 19-a de julio 2003 okazis la 14-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en la nordorient-rumana urbo Oradea, kaj inter la 7-a kaj la 14-a de majo 2005 okazis en Brașovo la 57-a Kongreso de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, kiu la unuan fojon okazis en Rumanio.

Inter la jaroj 1994-2007, Mihai Trifoi – instruisto en Bixad, distrikto Covasna (Kovasna) agadis fervore diversflanke. Li fondis Lernejan Esperanto-Klubon, verkis e-instru-librojn, tradukis librojn, estis intervjuita de tv- kaj radioĵurnalistoj, instruis esperanton al klasoj de gelnantoj, partoprenis en diversaj projektoj, pretigis teamojn de infanoj, kiujn akompanis al Universalaj Kongresoj, respektive Internaciaj Infanaj Kongresetoj (en Prago, Montpeliero, Berlino, Tel-Avivo, Zagrebo, aŭ al aliaj e-renkontigxoj (en Chester / Britio, Kastelo Grezijono / Francio ktp). Post ĉiu vojaĝo li verkis kaj publikigis longajn artikolojn, precipe en la distrikta ĵurnalo *Cuvântul nou* (La nova vorto) kaj en diversaj e-ĵurnaloj aŭ gazetoj.

Okaze de la UNESKO-jubileo, 150 jaroj de la naskiĝo de L. L. Zamenhof (1859-1917), en la urbo Slatina, ĉefurbo de la distrikto Olt, en la suda parto de Rumanio, la tiea distrikta muzeo malfermis la ekspozicion kun bildoj kaj dokumentoj titolitan, Momentoj el la historio de la esperantista movado en Rumanio, 1889-2009. Pri tiu evento informis diversaj gazetoj kaj televido : Vidu : Google Videos-Expoziție esperantistă 2608-serĉo videos; [www.adevarul.ro/articole/slatina-oltenii-pot-invata-limba-esperanto/](http://www.adevarul.ro/articole/slatina-oltenii-pot-invata-limba-esperanto/) kaj [www.cimec.wordpress.com/2009/08/25/slatina-expozitia-foto-documentara-momente-din-istoria-miscarii-esperantisten-romnia-1889-2009/](http://www.cimec.wordpress.com/2009/08/25/slatina-expozitia-foto-documentara-momente-din-istoria-miscarii-esperantisten-romnia-1889-2009/) ; Ankaŭ en la urbo Pitești, la distrikta biblioteko malfermis la ekspozicion „150 jaroj de la naskiĝo de L.L.Zamenhof (1859-1917), inventinto de la lingvo internacia Esperanto”, Pri tiu evento oni skribis en la gazetoj [www.curier.ro/index.php?option=com\\_content&task=view&id=10352&Itemid=377](http://www.curier.ro/index.php?option=com_content&task=view&id=10352&Itemid=377) kaj [www.presaonline.com/stiri-locale/inventatorul-limbii-esperanto-sarbatorit-la-biblioteca-82137.html](http://www.presaonline.com/stiri-locale/inventatorul-limbii-esperanto-sarbatorit-la-biblioteca-82137.html) ).

Asocio Esperanto-Oradea festis je la 7-an de majo 2010, Centjariĝon de E-agado en la urbo Oradea. Vd. <http://bibliotecibihorene.blogspot.com/2010/05/azi-7-mai-2010biblioteca-judeteana.html> kaj <http://www.ipernity.com/doc/143032/.../190907> .

Bonan organizitan agadon oni observas en Brașovo, kie agas Rodica Todor, prezidanto de I.F.E.F kaj eksprezidanto de Rumana Esperantista Fervojista Asocio. Ŝi organizis 83-an Kongreson de S.A.T. en jaro 2010. Vd: [http://observator.a1.ro/social/Congres-de-esperando\\_16428.html](http://observator.a1.ro/social/Congres-de-esperando_16428.html) ; Krome ŝi instruas Esperanton al la lokaj klubanoj kaj multe



helpas en la organizado de diversaj E-aranĝoj, estante unu el la plej fervoraj esperantistinoj de Rumanio.

Sed nia baza aganto restas s-ino Aurora Bute, EAR-estraranino, multjara prezidanto de EAR, kiu agadas en la urbo Timisoara kaj havas ege riĉan aktivecon kun bonegaj rezultoj. Senlace ŝi strebas daŭre antaŭen puŝi la E-movadon en Rumanio.

Lastaj informoj aperintaj en rumana gazetararo: „*Esperanto-utopie sau realitate I?* –(Esperanto-utopio aŭ realeco)? aperis en ĵurnalo „*Mesagerul de Covasna*” el 12.09.2011, vd. <http://www.mesageruldecovasna/stiri/esperanto-%E2%80%93-utopie-sau-realitate-i/> kaj *Esperanto-utopio saŭ realitate II ?*, vd. <http://www.mesageruldecovasna.ro/educatie-cultura/esperanto-%E2%80%93-utopie-sau-realitate-ii/> aperinta en la sama ĵurnalo en 13.09.2011. Ambaŭ artikoloj estis skribitaj de Mihai Trifoi, nuna prezidanto de Esperanto-Asocio de Rumanio, kiu argumentas favore al instruado de Esperanto.



Nun en Rumanio agadas Esperanto-Asocio de Rumanio (ĉirkaŭ 130 anoj), Rumana Esperantista Fervojista Asocio (ĉirkaŭ 300 anoj), Asocio-Esperanto Oradea (kun 30 anoj), Asocio-Esperanto Cluj-Napoca (kun 23 anoj). Ankaŭ funkcias ILEI, AIS, IKUE kaj KELI-sekcioj.

Ne ekzistas entreprenoj aŭ institucioj, kiuj havas kiel agadon e-produktojn.

Pliajn informojn pri la Rumania Esperanto-Movado vi trovos ĉe: <http://www.ipernity.com/home/m.vochin>.

*Marian VOCHIN*

Rimarko de la redaktoro: Ekde 1968 kiam jam en la Unua Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en Zagrebo partoprenis pupteatro el Cluj kun spektaklo en Esperanto kun kelkaj aktorinoj kiuj bone parolis E-on (ĉefe Julia Sigmond) en postaj sepdekaj kaj okdekaj jaroj partoprenis en PIF pluraj rumanaĵ pupteatroj kun spektakloj en Esperanto. (detale pri tio en la libro »Pupoj vive« pri 40 jaroj de PIF aperinta en Zagrebo en 2009). La ĉefaj motoroj de tiu agado estis Jozefo Petrin kaj Julia Sigmond.



# Esperanto en Slovakio

## Komenco

La unua lernolibro de Esperanto por slovakoj aperis en la jaro 1907. Eldonis ĝin la tolstoĵano D-ro Albert Škarvan kun la ruso N.P. Evstifejev. Ĝi estis slovaka traduko de la unua lernolibro de Esperanto, "La Fundamento" de Zamenhof. Ĝi aperis en la tiama Turčiansky Svätý Martin (nun Martin), la dua eldono aperis en 1918 en Chicago.

En la nuna ĉefurbo de Slovakio Bratislava (antaŭe Pozsony, Pressburg) estis baldaŭ fondita Loka esperantista grupo de István Nagy-Molnár kaj Emil Wanitsek.



## El la komuna historio

La 1-an de februaro 1920 estis fondita Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. Ekde 1921 komencis aperadi en Praha la monata gazeto en ĵurnala formato Ĉeĥoslovaka Gazeto. En 1923 fondiĝis Ĉeĥoslovaka E-Instituto kaj en 1926 okazis en Bratislava la 3-a kongreso de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

## Post la dua mondmilito

La 13-an de marto 1946 estis fondita Slovacka Esperanto-Societo. Ĝia prezidanto estis (1947-1953) Pavol Rosa.

En la sama jaro komencis aperadi *Esperantisto Slovaka*, revuo de esperantistoj en Slovakio. Fondis ĝin Ernesto Váňa.

En 1951 ĝi ĉesis aperi, ĝis 1957, kiam ĝi reaperis sub la nova nomo *Esperanto en Slovakio*. La revuo kelkfoje ŝanĝis sian nomon (1960-1962 *Esperanto*, 1963-1967 *Esperanto-Agado*). En la jaro 1968 oni revenis al la nomo *Esperantisto Slovaka*.

En la jaro 1947, de la 12-a ĝis la 13-a de julio 1947, okazis en Martin la Unua Tutslovacka Esperanto-Kongreso.

La Dua Tutslovacka Esperanto-Kongreso okazis en Košice, ekde la 21-a ĝis la 23-a de aŭgusto 1948, la tria okazis en 1949 en Bratislava. En 1953 estis Slovacka Esperanto-Societo likvidita.

En 1969, de la 9-a ĝis la 11-a de majo, okazis en la hotelo Esperanto en Pribylina kongreso de slovakaj esperantistoj, dum kiu estis fondita Asocio de Esperantistoj en Slovacka Socialisma Respubliko (AESSR). Inter la jaroj 1969 kaj 1990 AESSR okazigis 12 kongresojn en diversaj urboj de Slovakio. Ĝiaj prezidantoj estis Pavel Rosa (1969-1977), Milan Zvara (1977-1983 kaj 1987-1990), Andrej Lukáč (1983-1987) kaj Au-

gustín Ĉambál (1993-1994). Dum la 12-a kongreso en 1993 en Žilina estis la nomo ŝanĝita al Slovakia Esperanto-Asocio, kiu havis multajn jarojn sian propran sidejon en la subtatra urbo Poprad (la urboparto Spišská Sobota).



En 1997 okazis en la hotelo Esperanto en Pribylina fonda kongreso de la nova asocio - Slovakia Esperanta Federacio (SKEF). Ĝiaj prezidantoj: Juraj Gondžúr (1997-1998), Ján Vajs (1998-2001), Milan Zvara (2001-2004), Juraj Gondžúr (2004-2007), Rast'o Šarišský (2007-2010) kaj Stano Marček (2010-...). SKEF estas Landa Asocio de UEA. Ĝi havas Esperantan arkivon en la vilaĝo Plevník. En ĝi troviĝas postlasaĵo de slovakaj esperantistoj de: Arnošt Váňa, Milan Zvara, Vladimír Němec, Eduard V. Tvarožek, Martin Benka kaj aliaj. En la arkivo, pri kiu zorgas Ľubomír Fajth, estas pli ol 2.000 libroj kaj esperantaĵoj.

## Nuntempe

Slovakia Esperanta Federacio, SKEF, havas kolektivajn kaj individuajn membrojn. La kolektivaj estas membroj de regionaj organizoj (Esperanta Societo ESO, Okcidentslovakia E-Societo OSES, Nordslovakia E-Societo ESONO, Transmontara Esperanta Organizo TEO) kaj Esperanto-kluboj, nuntempe en Liptovský Mikuláš, Žilina, Martin, Považská Bystrica, Snina kaj Zvolen. La individuaj membroj aliĝas kaj pagas sian membrotizon rekte al SKEF.

Kiel sendependa interesorganizo kaj jura personeco SKEF estas registrita ĉe Ministerio de Internaj Aferoj de Slovakio. Ĝia sidejo estas ĉe la nuna prezidanto Stano Marček ([stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com)). Ĝia retejo: [www.esperanto.sk](http://www.esperanto.sk)

Slovakia Esperanta Junularo (SKEF) estas memstara civitana asocio de gejunuloj. Ĝi ekestis la 13-an de aŭgusto 2003. Ekde 2004 ĝi estas Landa Sekcio de TEJO.

En Slovakio havas juran sidejon ankaŭ la organizo E@I (Edukado ĉe Interreto aŭ Esperanto ĉe Interreto), [http://ikso.net/eo/pri\\_ecxei/index.php](http://ikso.net/eo/pri_ecxei/index.php), aŭ <http://eo.wikipedia.org/wiki/E@I>, kun multaj internaciskalaj aranĝoj kaj projektoj kiel [lernu.net](http://lernu.net) (<http://sk.lernu.net>), [aktuale.info](http://aktuale.info), [slovake.eu](http://slovake.eu), [vortaro.net](http://vortaro.net), Somera E-Studado, KAEST k.a., kun propraj salajrataj dungitoj en la urbo Partizánske.



Pri elstaraj slovakaj esperantistoj (ekz. Ľudovít Izák, Pavel Rosa, František Šatura, Eduard Vladimír Tvarožek, Ján Valašťan-Dolinský, Arnošt Váňa, Milan Zvara, Magda Šaturová-Sepová, Albert Škarvan) informas Vikipedio:

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:Slovakaj\\_esperantistoj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:Slovakaj_esperantistoj).

Esperantisto <http://esperantistoslovaka.esperanto.sk/> Slovaka (nun aperas kvaronjare, sub la redaktado de Peter Novotníček ([esperantistoslovaka@gmail.com](mailto:esperantistoslovaka@gmail.com))).

### Instruado

En Slovakio estas forta tradicio de Someraj Esperanto-Lernejoj – en Jasov, Sliač, Dedinky Mlynky kaj Košice (ligitaj kun la karmemora Milan Zvara), lastatempe Somera Esperanto-Studado en Pribylina, Modra, Piešťany kaj Nitra, kiun organizas [lernu.net](http://lernu.net) kaj Petro Baláž (<http://skej.esperanto.sk/arangoj.php?lingvo=eo&kio=156>).



*Stano Marček*





## Slovenia Esperanto-movado

Slovenia E-Movado festis en 2010 sian 100-jariĝon ĉar la unua E-societo en Slovenio, tiu de Maribor, fondiĝis en 1910. Tiucele la Maribora Societo eldonis libron pri la societa historio de la lastaj 30 jaroj (ĉar pri la unuaj 70 jam aperis libro de Ivan Bratoš en 1980). Estas fascianaj informoj en tiu libro pri la agado aparte en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj kiam la societo havis ĝis 400 membroj, gvidis en unuopaj jaroj ĝis 10 kursojn en 7 lernejoj kaj Pedagogia Fakultato kaj organizis aranĝojn kaj vojaĝojn de la societanoj. Tiutempe estis ankaŭ pinto de la tutslovenia movado, kiam ekzistis deko da registritaj societoj kun pli ol 2000 membroj. Kiam Slovenio ŝanĝis la politikan sistemon al la kapitalisma (en 1991), la ŝtata helpo al la societoj grave malboniĝis, en kelkaj urboj oni ne havis junan generacion kaj en 1995 kiam estis akceptita nova leĝo pri societoj pro kiu devis ĉiuj societoj reregistriĝi akceptante novajn statutojn, tion faris nur tri societoj: tiu de Ljubljana, E-societo Maribor kaj Fervoja E-societo Maribor. Slovenia E-Ligo povis elekti ĉu registriĝi kiel asocio de societoj aŭ asocio de individuaj mem-



broj. Ĝi elektis la ĉi-lastan eblon kaj nun estas asocio de individuaj esperantistoj de Slovenio kun kvindeko da pagataj kotizoj jare.

La E-societo de Ljubljana havis grandan problemon en la naŭdekaj jaroj kiam ties prezidantino sen demandi la societanan asembleon vendis la ejojn de la societo en la

centro de Ljubljana kontraŭ mizera prezo al iu entrepreno. La kazo ankoraŭ troviĝas ĉe la tribunalo kaj la societo samkiel la Ligo ne havas siajn ejojn kvankam antaŭ tio ili estis unuj el raraj esperantistaj organizoj kiuj posedis la ejojn. Ĉio tio kaŭzis ke la agado en Ljubljana sufiĉe lamis. Tamen la societo eldonis en la lastaj jardekoj kelkajn librojn (vortarojn kaj informlibrojn) kaj eldonadis sian informbultenon dulingvan, organizis prelegojn kaj kunvenojn. En la Filozofia fakultato de Ljubljana en la naŭdekaj jaroj eklaboris kiel profesorino sinjorino Sonja Klemenčič, kiu sukcesis enkonduki kursojn de Esperanto kaj ili povas okazi ankaŭ nuntempe, se anonciĝas sufiĉaj studentoj. Nun tie laboras plia persono, profesorino Marija Zlatnar Moe. Fervojistaj E-Societo en Maribor jam longe ne organizas E-kursojn, sed ĉiujare organizas aŭ iun aranĝon (pluraj skisemajnoj por fervojistoj) aŭ vojaĝon de siaj membroj al IFEF-kongresoj, kvankam ĝi ne plu jam longe akiris novajn membrojn.



La plej vigla estas E-Societo de Maribor, kiu ne nur havas daŭre tridekon da aktivaj membroj, sed okazigas ankaŭ konstante minimume unu-tri kursojn ĉefe por junaj mariboranoj kaj havas alfluan de junaj membroj. Ĝi okazigas prelegojn, informas publikajn mediojn kaj organizas partoprenon de la membroj en diversaj aranĝoj. Maribor havas ankaŭ iun alian specifecon. En ĝi agas por aŭ per Esperanto kelkaj entreprenoj kaj societoj kiuj ne estas esperantistaj. De 1992 en ĝi funkcias kaj aktivas entrepreno Inter-kulturo, kiun gvidas Z.Tišljar, kiu eldonis dekon da libroj en Esperanto kaj organizis tribunojn, kulturajn aranĝojn, eĉ festivalon de video-filmoj, E-seminariojn, kongresojn kaj kursojn de E. Dum deko da jaroj

iom da aktivado poresperanta havis ankaŭ entrepreno Hiško, kiun gvidis Danica

Obradović. En 1996 mariboraj esperantistoj fondis Asocion por Eŭropa Konscio kiu aktive organizas rondajn tablojn, prelegojn kaj diskutojn pri eŭropaj temoj (ofte agante por Esperanto) kaj en la jaro 2008 fondiĝis ZVIK (Kultureduka instituto), nun ZVIR, kiun gvidas Vesna Obradović kaj kiu same kiel Inter



kulturo organizas plurajn aranĝojn pri kaj en Esperanto. Ĝi interalie sukcesis ricevi monon por propedeŭtika eksperimento kiu estis plenumata de 2009-2011 kaj kiu inkluzivis edukadon de junaj instruistoj kaj instruadon en infanĝardenoj kaj unuaj klasoj por prepari infanojn lerni aliajn fremdlingvojn. Bedaŭrinde pro la manko de instruistoj kaj malsano de Vesna, la eksperimento ne estis finita. Inter-kulturo kaj Asocio por Eŭropa Konscio partoprenis kiel partneroj en pluraj Eŭropaj E-projektoj.

Kiam en la jaro 2005 estis akceptita la invito de la maribora urbestro Boris Sovič organizi Eŭropan E-kongreson en Maribor ekviglis la movado sufiĉe pli ol kutime kaj estis preparata bona kongreso. Tiutempe ekinteresiĝis pri la Movado vicprezidanto de la slovena parlamento d-ro Marko Pavliha, kiu akceptis la delegitaron de la organizantoj kaj promesis prezenti kelkajn proponojn pri Esperanto al Slovena Registaro kaj Parlamento kaj tion li faris dum tri okazoj en 2006 kaj 2007. Bedaŭrinde neniu el liaj proponoj estis akceptita. Krome en tiuj jaroj la mariboraj esperantistoj atingis kontakton kun slovena membrino de Eŭropa Parlamento Ljudmila Novak kaj tre bone kunlaboris kun ŝi kaj ŝi ne nur aktivis por E en la Eŭropa Parlamento, sed ankaŭ plurfoje en intervjuoj por radio, televido diris ke ŝi estas esperantistino kaj faris gravan reklamon. En 2008 la mariboraj esperantistoj organizis ekspozicion pri Esperanto en la reprezentejo de Eŭropa Parlamento en Ljubljana. En 2008 kiam Slovenio prezidis Eŭropan Union mariboraj esperantistoj eldonis monatan bultenon pri la slovena prezidado en Esperanto kaj per ĝi aperigis 3-5 retradukojn en malgrandaj eŭropaj lingvoj.



Sed okazis en 2007, kiam ĉiuj tiuj bonaj kontaktoj kaj preparoj por la kongreso ege bone evoluis, ke la tiama prezidanto de Sovenia E-Ligo deklaris ke la Ligo ne volas aliĝi al EEU kies kongreson Slovenio organizas. Ĉar sen oficiala Ligo ne eblis kontakti oficialajn instancojn de la lando kaj la menciitajn politikistojn, la mariboraj societoj decidis fondi alian tutlandan asocion, nome la Slovenan Asocion de Societoj por la Internacia Lingvo, kiu aliĝis al EEU kaj reprezentas slovenajn e-societojn en la eŭropa

E-organizo, dum la tradicia Slovenia E-Ligo estas asocia membro en UEA. Tial bedaŭrinde ekzistas du paralelaj organizoj, kiuj esence ne konfliktas, sed ankaŭ ne kunlaboras.

Ĉar intertempe la e-kursoj ege malkreskis (unu-du kursoj en la Filozofia Fakultato de Ljubljana kaj unu-du en la E-societo de Maribor) la novalvenanta generacio estas tre malmultnombra. Tamen iom pligrandigas tion la lernantoj de E pere de la retaj kursoj. Mi taksas ke nuntempe en Slovenio estas efektive ĉirkaŭ 100 aktivaj esperantistoj kiuj aperas fojfoje en diversaj aktivecoj, kaj sendube almenaŭ 1000 kiuj ankoraŭ scias la lingvon kaj uzas ĝin iam tiam en privataj rilatoj. En 2012 fondiĝis neformala grupo en urbeto Brežice kiu komencis funkcii tre vigle ene de la loka publika vivo, kio estas novaĵo rilate la lokan agadon. La grupon gvidas Anton Mihelič.

La prezidanto de la nuna Slovenia E-Ligo estas Janez Jug kaj de Internacia Asocio por Internacia Lingvo Danica Obradović.

La plej grava verkisto kaj tradukisto estas Vinko Ošlak, kiu dum lastaj 3 jardekoj eldonis kvinon da originale verkitaj libroj en E, tradukis kaj redaktis Antologion de slovena literatura prozo de la 20-a jarcento (Sur la Suna Flanko de Alpoj), eldonis dekon da slovenlingvaj libroj kiuj iel rilatas al Esperanto kaj tradukis multajn verkojn ĉu el Esperanto ĉu al ĝi.

En la historio la plej grava slovena esperantisto estis Rudolf Rakuša, grava ĉefe inter la du mondmilitoj, verkinto de lernolibroj kaj pedagogo kies libro Metodiko de Esperanto ankoraŭ nuntempe estas internacie uzata kaj aktuala. Post la dua mondmilito la plej grava estis Peter Zlatnar kaj poste Janez Zadavec. En Slovenio okazis du tutjugoslaviaj kongresoj, unu SAT kongreso en 1995, du ILEI-konferencoj en 1072 kaj 1974 kaj la plej granda IFEF-kongreso kun 700 partoprenantoj en Maribor en 1971.

Malgraŭ grava ŝrumpo de la movado, tamen la publikaj medioj ankoraŭ estas sufiĉe pozitivaj al Esperanto kaj aperigadis ĝis 2010 relative ofte raportaĵojn kaj artikolojn. Diversaj televidoj aperigis inter 2005 kaj 2010 dudekon da televidaj elsendoj kaj elsendetoj por ne paroli ke la gazetaro kaj radioj aperigis multe pli la artikoloj kaj elsendoj. Bedaŭrinde poste tio ŝanĝiĝis kaj nun la publikaj informrimedoj apenaŭ informas. Nur iom lokaj publikaj rimedoj.

Pli pri ĉio:

Slovenia E-Ligo: [www.esperanto.si](http://www.esperanto.si)

Asocio por Eŭropa Konscio [www.wix.com/dtislar/eŭropo](http://www.wix.com/dtislar/eŭropo)

Maribora E-societo: [www.esperanto-maribor.si](http://www.esperanto-maribor.si)

Inter-kulturo: <http://inter-kulturo.si/>

ZVIR: <https://www.facebook.com/gruntibugli>

*Zlatko Tišljar*

# Esperanto en Svedio

## Historio

Sveda Esperanto-Federacio naskigis en 1906 en Stokholmo. Jam en 1889 iu studento tradukis la Zamenhofan libron de 1887. Iu alia studento en Upsalo verkis lernolibron. Ĝi vekis intereson inter tre aktivaj studentoj kaj ili fondis Esperanto-klubon en 1891, la dua klubo en la mondo.

Paul Nylén interesiĝis kaj baldaŭ estis membro de la klubo en Upsalo, kie li renkontis Valdemar Langlet. Tiuj du personoj fariĝis ĵurnalistoj kaj ege aktivaj gvidantoj en la sveda movado. Langlet fariĝis la unua prezidanto de SEF. Nylén poste verkis lernolibrojn kaj vortarojn. Li ankaŭ fariĝis redaktoro de la internacia gazeto "Lingvo Internacia", kiu transprenis eldonadon kiam "La Esperantisto" devis ĉesi.

Nylén veturis al Boulogne-sur-Mer en 1905. En tiu unua kongreso oni fondis "Lingvan Komitaton" kaj Nylén estis elektita inter la 95 personoj.



Fine de 1907 Ahlberg skribis pri la "Delegitaro", ke granda grupo de plejparte lingvistoj kiuj volis tiutempe proponi iun internacian lingvon deklaris ke Esperanto estas la plej bona, sed iu komitato devus enkonduki kelkajn ŝanĝojn. Ahlberg tiam montris ke li volis subteni proponon pri ŝanĝoj. En la marta numero de "Esperantisten", Ahlberg aperigis grandan artikolon „Averto de Zamenhof“.

Aŭtune de 1908 aperis multaj artikoloj kun belaj vortoj por reformita Esperanto, Ido. Kaj la Stokholma klubo transiris al Ido.

## Blindaj esperantistoj multiĝas

La blinda Harald Thilander aperigis esperantan lernomaterialon per punktoskribsistemo. Li komencis redakti gazeton por blindaj esperantistoj ne nur en Svedio sed ankaŭ

en aliaj landoj. La edzino fariĝis eminenta esperantisto. Profesoro Cart proponis gazeton por blinduloj en 1904, kaj Thilander presis ĝin. Malgraŭ la intereso por Ido la plej multaj esperantistoj restis fidelaj al Esperanto.

Carl Lindhagen, urbestro de Stokholmo kaj parlamentano, proponis en la sveda parlamento la Internacian Lingvon en 1911. Li estis konata propagandisto por esperanto kaj partoprenis en la Universala Kongreso en Stokholmo 1934.

### **Propra gazeto en 1913**

Post 1907, kiam la Stokholma klubo transiris al Ido, SEF kunlaboris kun la dana Esperanto-gazeto gis la fino de 1912. Paul Nylén aperis kiel redaktoro almenafi trifoje.

Nylén fariĝis prezidanto de SEF kaj vicprezidanto de Akademio de Esperanto. La Espero fariĝis tre bona membrogazeto por SEF. Kiam la laborista organizo SAT en 1921 fondiĝis, en Svedio estis fondita SLEA (Sveda Laborista E-Asocio). Ĝi aperigis gazeton similan al La Espero.

SEF, SLEA kaj Instruista sekcio de ILEI fondis la Esperanto-Instituton, por aranĝi ekzamenojn por esperantistoj kiuj volas havi atestilojn.



### **Teatraĵoj de Strindberg**

Profesia aktoro Ivan Hedqvist iris al August Strindberg por peti permeson prezenti sceneje dramojn en Esperanto. Strindberg donis senkondiĉan permeson. Hedqvist kun tri kolegoj studis la rolojn kaj vojaĝis al Dresden por prezenti la dramojn Pario kaj Fraŭlino Julie antaŭ UEA-kongresanoj.

En 1934 alia teatra trupo volis ludi dramojn de Strindberg por la kongresanoj de Stokholma

Universala Kongreso. Poste la trupo ludis por esperantistoj en la Baltaj landoj.

### **Kooperativa eldonejo**

Eldona Societo Esperanto establiĝis en 1922. Ĝi eldonis ne nur la kutimajn lernolibrojn kaj vortarojn. Inter romanoj kaj dramoj elstaras du libroj. Aniaro de Harry Martinson. Ĝin tradukis la svedo Bertil Nilsson kaj William Auld. Grafika formo de Franko Luin.

Gunnar Gällmo interesiĝis pri romano Nemeza de Alfred Nobel. Li mendis kopion de manuskripto de la Regna Biblioteko. Li tradukis ĝin en Esperanton. La dramo neniam estis eldonita, eĉ en la sveda. Por vendi la libron al svedoj, oni presis ĉiun duan paĝon en la sveda, tiel ke eblas kompari Esperanton kun la sveda. Unu el la teatroj en Stokholmo faris teatraĵon el la dramo. La teatro montris ĝin dum unu monato en 2006.

### **Kursoj 1920-1930**

La nombro de kluboj kreskis kaj Esperanto-kursoj furoris. La statistiko de Laborista Kleriga Asocio montris ke Esperanto-kursoj venkis dum kelkaj jaroj.

Tiberio Morariu venis al Svedio en 1928. Li vojaĝis por viziti urbojn kaj urbetojn por fari reklamon por Esperanto-kursoj kaj mem gvidi ilin. Li estis specialisto pri Cseh-kursoj, kaj ofte gvidis kursojn starante antaŭ pli ol cent personoj. Jam en 1927 Andreo Cseh venis por instrui laŭ sia propra sistemo. SEF invitis konatajn prelegantojn ĝis komenciĝo de la milito. Post 1945 estis kutimo inviti eksterlandajn instruistojn kaj bonajn prelegantojn.

Tre aktiva periodo estis 1930 – 1939. Pli da kursoj kaj pli da kluboj. Alvenis Ferenc Szilagyí 1932 el Hungario. Humurplena samideano, kiu povis fari lernolibrojn, instrui, prelegi kaj verki romanojn. Li ankaŭ iĝis membro de la Akademio. Aliaj svedoj kiuj ĝis nun estis akademiaj membroj: K Söderberg, E Vilborg, P Nylén, Christer Kiselman kaj Bertilo Wennergren.

### **Post la dua mondmilito**

Post la dua mondmilito kluboj kaj membroj multiĝis ĝis la fino de la 50-aj jaroj. Tiam SEF havis 56 klubojn kaj iom pli ol 2500 membrojn. Troviĝis sekcioj de KELI, ILEI kaj Fervojistoj. En 1947 nia energia talento Ernfrid Malmgren eniris la UEA-estraron kiel Prezidanto.

Sveda Somera Semajno en Frostavallen fariĝis grava evento por konataj gvidantoj eĉ pluraj landoj. Estraranoj de UEA partoprenis, inter aliaj Ivo Lapenna.



La TEJO-kongreso en 1968 okazis en Tyresö, proksime de Stokholmo. Alia TEJO-kongreso okazis en 2003 en Esperanto-Gastigejo, semajnon antaŭ la UEA-kongreso en Gotenburgo.

Universala Kongreso en 1980 farigis sukcesa pro bonaj rilatoj kun la urba estro en Stokholmo kaj kun la Alta Protektanto, la Prezidanto de la Parlamento, Ingemund Bengtsson. Li studis Esperanton kiam li estis 18-jara. Li aperis inter la podianoj kaj bonvenigis la kongresanaron venintan al Svedio. Li ankaŭ venis al la konferenceto por invititaj ĵurnalistoj antaŭ la kongreso. Venis 45 invititoj por ricevi informojn pri Esperanto kaj la kongreso. Humphrey Tonkin prelegis pri UEA, Lindblom pri "Kio estas Esperanto-kongreso". Poste la ĵurnalistoj svarmis pleje ĉirkaŭ la Prezidanto de la Parlamento.

En 1987, la 100-jara jubilea jaro, I Bengtsson diris al SEF, ke la Jubilea kongreso devas esti en la plej bona loko, La Parlamentejo. Alia malnova esperantisto, parlamentano Daniel Tarschys, rakontis pri sia intereso por Esperanto en junaj jaroj. Li fariĝis Ĝenerala Sekretario de la Konsilio de Eŭropo en 1994.

## Aliaj kondiĉoj 2013

En 1958 estis 56 kluboj kaj 2500 membroj, minimume 20 000 svedoj lernis la lingvon. En 2012 estis 10 kluboj, 400 SEF-membroj, multaj lernis per la Reto.

La universitato de Stokholmo antaŭe arangis kursojn en Interlingvistiko, poste Esperanto-kursojn. Sed ili ne plu okazas nuntempe.

Ni ankoraŭ kredas ke indas labori por konvinki homojn pri la bezono de neŭtrala lingvo internacia.

*Roland Lindblom*

## La nuna stato

La sveda Esperanto-movado havas tre brilan historion. Unu el la plej unuaj Esperanto-kluboj en la mondo troviĝis en Upsala. Tre frue internacia gazeto estis redaktita en la sama sveda urbo kaj presita en Jalto.

Dum la unua duono de la 20-a jarcento Esperanto rapide kreskis, samkiel en plural landoj. La Sveda Esperanto-Federacio estis fondita en 1906. Krom la federacio kun siaj multaj lokaj membrokluboj oni fondis ankaŭ plurajn aliajn organizojn, laŭ la tiutempaj bezonoj. Plej gravis ŝajne la kooperativa eldonejo kaj la Sveda Esperanto-Instituto. Internaciaj organizoj ankaŭ fortis en Svedio, ekzemple Sennacia Asocio Tutmonda, kiu havis multajn membrojn, kaj aktivis ankaŭ landa laborista organizo SLEA.



Aliaj internaciaj organizoj kreis landajn sekciojn, ekzemple ILEI, la esperanta instruista organizo, kaj KELI, la kristanoj, kaj IFEF, la fervojistoj. Ĉiuj tiuj organizoj ankoraŭ ekzistas krom la fervojista.

La pinton atingis la sveda Esperanto-movado dum la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj.

Ingemund Bengtsson estis plurfoje socialdemokrata ministro kaj poste prezidanto de la sveda parlamento. Li pli frue estis laboristo en biciklofabriko kaj unu el multegaj laboristoj kiuj dum la 30-aj jaroj esperantistiĝis. Ilia kialo estis simpla kaj klara: homoj kun nur ses- aŭ sepjara baza edukado bezonis Esperanton por povi komuniki internacie.

Ingemund Bengtsson iam klarigis al mi kial Esperanto en Svedio komencis malkreski meze de la pasinta jarcento. Tiam la laborista movado, ne nur la registaro kaj parlamento, sed ankaŭ la popola kleriga organizo kaj la sindikatoj, decidis ke la tuta popolo devus havi eblecon lerni internacie uzeblan lingvon, do ne nur la alte edukitaj mez- kaj superklasuloj. Ni esperantistoj povas nur bedaŭri, ke oni tiam elektis la anglan. Ĝi nun estas la ĉefa fremda lingvo. Antaŭ la dua mondmilito la germana plej gravis en Svedio.



Ekzistas ja opinio, ke la rapida kresko de la angla lingvo en la mondo estas lingva imperiismo, brita aŭ usona. Sed Svedio fakte mem elektis la anglan.

Ankaŭ Ingemund Bengtsson eklernis la anglan en vesperaj studcirkloj kaj samtempe forlasis Esperanton. Li tamen, multajn jarojn poste, revenis al Esperanto. (Mia patro ankaŭ esperantistiĝis dum la 30aj jaroj. Li poste, en la 60-aj jaroj, treege strebis lerni la anglan en vesperaj studkursoj, sed li neniam sukcesis elparoli kompreneblan anglan. Li restis esperantisto, malriĉa paperfabrika laboristo, kun korespondamikoĵ tutmonde.)



Mi esperantistiĝis en 1994 kaj estis elektita vicprezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio la sekvan jaron. Proksimume tri jarojn mi bezonis por kompreni la movadan strukturon kaj problemojn. De tiam mi konstatas ke la "duoniĝtempo" de la movado estas dek jaroj.

Kelkaj problemoj por Esperanto estas internaj movadaj, aliaj dependas de la evoluo de la socio, laŭ mia kompreno.

Plej gravas por la movado eble ke ni estas tro malfortaj por modernigi la organizan strukturon, tiel ke restas tro da diversaj organizoj. Ne estas sufiĉe da aktivuloj por trovi taŭgajn komitatanojn, estraranojn kaj revizorojn por ĉiuj organizoj, kion oni taksis necesa antaŭ jardekoj. Ekzemple la Esperanto-Instituto, kies statuto enhavas plurajn taskojn el kiuj preskaŭ nenio plu aktualas. Ŝajne la nacia ekzameno iam estis grava afero, sed neniu plu memoras kiam laste okazis tia ekzameno. Ŝajne en la 80-aj jaroj.

La eldonejo tre malofte eldonas librojn. "Svedajn" librojn oni eldonas en Usono, Brazilo kaj Slovakio. La kooperativon finance savas Ido de bankroto. La sveda Ido-societo malaperis antaŭ longe kaj ĝi postlasis grandan fonduson ĉe komerca banko. Makulaturto povas esti "transdonita" al universitatoj kaj lernejoj internaciaj, kiuj nenion pagas, sed pagas la Ido-fonduso. Noveldonitaj libroj por vendado aperas malofte.

La fakto ke tro multas Esperanto-organizoj ne nepre signifas ke ili interbatalas. Sed klaras al ĉiu sveda esperantisto ke ili inter si ne povas bone kunlabori.

La sveda socio ne konas bezonon por la lingvo internacia, ĉar jam tiun rolon transprenis la angla. Laŭleĝe kaj dekrete la angla ne apartenas al modernaj fremdaj lingvoj en la sveda lernejsistemo. Ĝi estas nia dua propra lingvo. Kaj sendube veras, ke la plej multaj svedoj mezjaraĝaj kaj pli junaj havas internacian helplingvon, kiu sufiĉe bone taŭgas por ekzemple turismi eksterlande.

Nia ĉefa problemto kiel esperantistoj estas, ke ni proponas bonan solvon al la lingvo-problemo. Sed ni proponas solvon al nekonata problemto. Al preskaŭ neniu svedo

evidentas ke alia internacia lingvo ol la angla estas bezonata. Kiu homo ĝenerale akceptas solvon kiam li aŭ ŝi ne koncias pri la problemo?

Finfine mi ĝojas rakonti ankaŭ pri pozitivaj aferoj. La svedaj lernejoj konas diversajn kategoriojn da lingvoj: la svedan, la anglan, la modernajn fremdajn lingvojn (al kiuj ne apartenas la angla) kaj la gepatrajn (pli precize tradukite la patrinajn), al kiuj apartenas la araba kaj la turka kaj centoj da aliaj enmigrint-lingvoj, sed ne la sveda, angla aŭ modernaj fremdlingvoj. Kaj ĵus venis iu tute nova kategorio: la homa lingvo. Ĝi estu libere elektebla. Kaj jam komencis junaj, brilaj, entuziasmaj esperantistoj la preparlaboron por prezenti Esperanton kiel homa lingvo!

Alia bona afero estas ke venas al Esperanto junaj studentoj. Ili ne bezonas "duan lingvon", multaj jam konas plurajn, sed iel ili renkontis Esperanton kaj trovis ĝin interesa. La Stokholma Esperanto-klubo ekzemple longe serĉis junajn gvidantojn, kaj nun trovis! Sed kiom da junaj esperantistoj venas? Ni ne scias, ĉar kelkaj ne volas membriĝi al la organizoj kaj pagi kotizon. Aliaj junaj membroj jam forlasis la Federacion pro konflikto kun la "maljunuloj".

Estus kompreneble interese scii kiom da novaj esperantistoj venas, membroj aŭ nemembroj, kompare kun la maljunaj amikoj kiuj forlasis nin, sed tio dume ne eblas.

Kelkaj legantoj certe pensas ke mi estas pesimisma. Mi ne same pensas, mi kredas ke mi estas realisma. Kaj mi scias ke mi tamen estas honesta. Kial mi do donas tiel problemplenan bildon de la situacio de Esperanto en Svedio? Estas du kialoj. Unue, kvankam mi ne bone konas la situacion en aliaj eŭropaj landoj, mi kredas ke similaj problemoj ekzistas ankaŭ ĉe kelkaj niaj eŭropaj najbaroj. Due, mi certas ke multaj homoj ne emas ŝanĝi ion se ili ne konscias pri la problemo. Kaj ŝanĝi aferojn ni devos!

Ni devas demandi nin, ĉu niaj strukturoj kongruas kun la nuntempaj vivmanjero kaj teknika nivelo de komunikado. Kaj antaŭ ol oferti brilan solvon, ni devos difini la problemon solvendan. Tiu lasta certe varias de lando al lando, ni ja do devos repensi, kaj loke kaj internacie. Se ni ne povos tion fari, mi estas pesemisma pri la estonto.

La Sveda Esperanto-Federacio (SEF) antaŭ unu jaro havis proksimume 400 membrojn kaj probable daŭre malkreskis en 2011. Estas ankoraŭ deko da aktivaj kluboj, sed piuraj ne plu regule kunvenas dum la jaro. Plej multaj membroj estas pensiuloj.

Lastaŭtune SEF invitis ĉiujn esperantistojn en Svedio, sendepende de mebreco en ajna organizo, al kunveno por diskuti la krizan situacion.

La rezulto estis magra. Eble la plej grava rezulto estis ke granda parto de la junuloj forlasis la patrinan organizon. La rekte videbla kialo estis lingva kverelo. Ĉeestis kelkaj komencantoj kaj ankaŭ kelkaj svedlingvanoj kiuj multege laboras por la Esperantomovado kaj ses el ili ankoraŭ ne bone regas la lingvon. Kaj ĉar ĉiuj ĉeestantoj estis svedlingvanoj, la kunveno komence decidis ĉi-foje uzi la svedan.



Iom malfruis la junuloj, ne sciante la decion pri elekto de laborlingvo kaj komencis esperante paroli. Post kverelo pri tio pluraj junaj esperantistoj forlasis la kunvenon kaj poste ankaŭ malmembriĝis el la Federacio. Kredeble tiu malmembriĝo havis ankaŭ aliajn kialojn ol la malsamopinio pri laborlingvo. Malfacilas diri kiom da junaj esperantistoj estas, sed novaj daŭre venas.

Krom la neŭtrala Federacio kun membrokluboj restas ankoraŭ en Svedio unu laborista klubo en Stokholmo, ne tre granda. Ĝi kaj kelkaj unuopaj membroj dise en la lando formas laboristan landan organizon, SLEA.



Tre rare okazas ke unopaj esperantistoj memstare eldonas libron sen kunlaboro kun la supre menciita eldoneja kooperativo.

Ekde jam 15 jaroj funkcias kooperativo Esperanto-Garden aŭ Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors. Multaj aranĝoj okazas tie, ekzemple ĉiujare somera Esperanto-kurso. Plurfoje SEF tie havis sian landan kongreson. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj la Sveda

Esperanto-instituto regule aranĝis simpoziojn kun famaj internaciaj prelegantoj.

La junulara movado ankaŭ aranĝis tie Kulturan Esperanto-Festivalon kaj IJK. Lastsomere feris en Esperanto-Gastigejo ankaŭ Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF). Venontsomere okazos en E-G KER-ekzameno samtempe kun diversaj lokoj tutmonde. Multaj svedaj esperantistoj tre aktivis interrete. Ne eblas ne menci la tro frue forpasintan Franko Luin, veran pioniron kiu kreis la hejmpaĝaron de SEF kun la internacie fama Kiosko, per kiu legeblis la plej granda gazataro de la mondo. Krome en Svedio jam dum jardekoj agadas daŭre junularaj popularmuzikaj ensembloj. Antaŭe internacie populara ensemblo Persone kaj nun la ensemblo La Perdita Generacio kaj la duopo Ĵomart kaj Nataŝa.

*Bengt Nordlöf*